der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

18. Jahrgang Nr. 113/114 (3/4/1982) ISSN 001 4-0619 60 Pf

Pri la 10a Kongreso de Kulturligo

Bilanco en Dresdeno

La 17an kaj 18an de junio 1982 en la kultururbo Dresdeno kunvenis ĉirkaŭ 1 000 delegitoj kaj gastoj de la plej signifa socialisma kulturorganizaĵo de GDR, Kulturligo, por partopreni sian 10an kongreson. Tiu kongreso estis post la 10a partia kongreso (1981) la plej grava kulturpolitika evento en nia lando. La alta prestiĝo de la kongreso i. a. esprimiĝis per la fakto, ke inter la honoraj gastoj troviĝis altranga delegacio de la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (SUPG) sub la gvido de la CK-sekretario kaj membro de la politburoo *Kurt Hager*. Plue ĉeestis 3 ministroj (kulturo, sano, media protekto) kaj la prezidantoj de Akademioj, tiu por Scienco (prof. *Scheeler*) kaj la Agrikultura Akademio (prof. *Stubbe*). En sia salutmesaĝo al la Kongreso la ĝenerala sekretario de CK de SUPG kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro *Erich Honecker* tre alte taksis la laboron de Kulturligo substrekante, ke „Kulturligo de GDR kiel ampleksa amasorganizaĵo de kulture agantaj kaj interesitaj civitanoj ludas gravan rolon en la socia vivo de nia lando".

La prezidanto de Kulturligo, la mondfama ĉembalisto kaj ĝenerala intendanto de la Ŝtata Operejo Berlin, *profesoro d-ro Hans Pischner* (elp. Piŝner) substrekis la engaĝiĝon de la tuta organizaĵo en la batalo por la paco, kiun Kulturligo aparte gvidas ĉe la kultura-spirita fronto. Kompreneble dum la ĉefa referaĵo kaj dum la diskutkontribuoj oni bilancis la ĝisnunan agadon de Kulturligo kaj starigis novajn taskojn.

Ankaŭ Esperanto ludis neignoreblan rolon dum la kongreso. Jam en la presita raporto al la kongreso (kaj en ties grafika-statistika parto) inter la 9 elektitaj kampoj ĉiam troviĝis Esperanto (arto kaj literaturo, malgrandaj pentraĵgalerioj, naturo kaj homa medio, kultivado de kulturaj monumentoj, regiona historio, fotografio, filatelio, Esperanto, vivaristiko). Kaj en la libro „Kulturligo en la evoluinta socialisma socio 1977 – 1981", ankaŭ troviĝas bona ĉapitro pri Esperanto (p. 332 – 336). La kongreson partoprenis el preskaŭ ĉiu distrikto delegitoj, kiuj membras en la Esperanto-asocio. La prezidanto de la Esperanto-Asocio, *Hans Heinel*, sidis en la kongresa prezidio kaj estis elektita membro de la Prezidia Konsilantaro de KL, la plej alta gvidorgano de la organizaĵo. De aparta signifo estis la fakto, ke unuan fojon kulturligan kongreson partoprenis eksterlandaj gastoj, delegitoj de la partneraj kaj amikaj organizaĵoj el la

socialismaj kaj el kelkaj aliaj landoj (Bulgario, ĈSSR, Pollando, Rumanio, Hungario, Vjetnamio Finnlando, Grekio kaj Aŭstrio). Al la eksterlandaj gastoj ankaŭ apartenis reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj el Bulgario *(prof. d-ro Vasil Peevski)*, ĈSSR (ĈEA: *d-ro Jaromir Jermař*, AESSR: (*Edvard Tvarožek*), Hungario (*d-ro Imre Pethes*), Pollando *(Stanislav Swistak)*, Rumanio *(d-ro Cezar Apreotezei)*, Sovetunio *(prof. d-ro Boris Kameŝkov)*.

La Esperanto-asocio ne nur havis la plej multajn reprezentantojn, tiu eksterlanda grupo ankaŭ tre bone agadis dum la kongreso kaj funkciis plej ekonomie, nome per nur unu interpretisto (d-ro Detlev Blanke).

Dum la du akceptoj ĉe la prezidanto de Kulturligo parolis d-ro *Imre Pethes*, vicprezidanto de HEA kaj prezidanto de MEM kaj prof. *d-ro B. Kameŝkov*, la reprezentanto de ASE kaj de SSOD.

Rimarkinda estis la fakto, ke altaj reprezentantoj de Kulturligo sufiĉe ofte havis kontakton kun la esperantistaj delegitoj, inter ili la vicĉef-sekretario de Kulturligo *d-ro Gerhard Mertink*, kiu respondecas pri la internacia laboro de la organizaĵo. La prezidanto de Kulturligo, *prof. Hans Pischner*, eĉ sufiĉe longan tempon babilis dum ŝipekskurso kun la gastoj malkaŝante, ke li ankaŭ, dum la 20aj jaroj, iom eklernis la internacian lingvon. Entute tre simpatia kaj multflanka interparolado.

Post la kongresaj tagoj, kiuj cetere okazis en la luksa dresdena kulturpalaco, la eksterlandaj gastoj renkontiĝis sabate, la 20an de junio, kun esperantistoj el Dresdeno kaj informis pri la agado de siaj asocioj. Elstaris la prelego de *d-ro Pethes* pri la signifo de la engaĝiĝo de la esperantistoj en la pacbatalo kaj pri MEM.

Entute la kongreso donis abundajn impulsojn por la estonta agado de la organizaĵo, al kiu ankaŭ apartenas kiel malgranda sed tre aktiva kaj ŝatata elemento la Esperanto-Asocio. La esperantistoj de GDR volonte aliĝas al la vortoj de prof. Pischner: „En la dialektiko de la vivo, de la progreso: ĉion por la reala socialismo! Ĉiuj por la paco – por la paco ĉion!“

Dum la kongreso:
de maldekstre dekstren:
prof. d-ro Boris Kameŝkov (USSR),
d-ro Detlev Blanke,
d-ro Imre Pethes (Hungario)

Okaze de la 60-a datreveno de la fondiĝo de USSR kaj de la 65-a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio

Movado modela ankaŭ por hadiaŭ

Pri SEU dum 20-aj kaj 30-aj jaroj

Dum la jaro 1982 la multnacia sovetia popolo festos la 60-an datrevenon de la fondiĝo de la Unio de Socialismaj Sovetrespublikoj. Kaj la jubileon de la Oktobra Revolucio. La Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko elkore gratulas al la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj okaze de tiuj gravaj jubileoj kaj deziras al la soveta popolo, al ĉiuj sovetaj esperantistoj pluajn sukcesojn en la konstruado de socialismo, por la sekurigo de la paco kaj por plua malstreĉiĝo. GDREA deziras aparte al ASE fruktodonan agadon por la estonto.

Retrorigardante la historion de Soveta Unio oni povas prave diri, ke ankaŭ la sovetiaj esperantistoj donis sian originalan kaj efikan kontribuon al la konstruado kaj firmigado de sia ŝtato tiel, ke ĝi dum la jubilea jaro povas noti konsiderindajn sukcesojn. Ĉiuj progresemaj esperantistoj, tiel ankaŭ la esperantistoj en GDR, ĝis hodiaŭ sentas la postefikojn de la klaskonscia, politike kaj fake modela agado de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj. Multaj germanaj laboristaj esperantistoj kiel la jam forpasintaj *Rudi Graetz, Otto Bäßler,*

Walter Kampfrad aŭ la ankoraŭ aktivaj kiel *Ludwig Schödl, Erich Würker, Werner Habicht* kaj aliaj edukiĝis al fidelaj komunistoj kaj antifaŝistoj ankaŭ helpe de la firmaj kontaktoj kun sovetuniaj laboristaj esperantistoj. Sed ankaŭ la fakto, ke antaŭ 50 jaroj (21. 8. 1932) en Berlin fondiĝis la *Internacio de Proleta Esperantistaro*, al kiu sovetiaj kaj germanaj esperantistoj donis la plej grandan kontribuon, estu kaŭzo por rememorigi pri SEU. SEU, kiu jam provizore fondiĝis en la jaro 1921 kaj plenefike ekagadis en la jaro 1925, dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj evoluigadis mirinde multflankan, modelan kaj tre efikan agadon, kiu estis respektata en la tuta tiama progresema Esperanto-movado kaj devis esti agnoskata eĉ de kontraŭuloj de la Soveta Ŝtato. Tiu agado ĝis hodiaŭ restis senprecedenca. Tutcerte sovetiaj esperantistoj estos pli kompetentaj resumi tiun gravan agadon. Sed oni permesu al eksterlanda amiko de USSR kaj ties esperantistaro, tralaborinto de multaj fontmaterialoj, almenaŭ subjektivan supraĵan superrigardon, eble resumeblan en jenaj punktoj:

1. Kiam en la jaro 1925 sovetaj aŭtoritataj institucioj proklamis la neceson konscie kaj laŭplane gvidi la eduklaboron por la laborulaj amasoj kaj 1928, aldone, substrekis la neceson studi fremdajn lingvojn, la Esperanto-movado en Sovetunio ricevis fortajn stimulojn. Subtenate de klerigaj instancoj, de la sindikatoj, en la Ruĝa Armeo kaj de aliaj sociaj fortoj tre rapide kreskis la amasa bazo, tiel, ke 1930 oni skribis pri 10 000 membroj de SEU[1]). Dum la sekvaj jaroj la procentaĵo de laboristoj en SEU tre kreskis kaj en 1935 atingis eĉ 45 %[2]). La sovetia Esperanto-movado sendube konsistigis la plej klaskonscian revolucian parton de la tutmonda esperantistaro kaj fariĝis la gvida motoro en la internacia laborista Esperanto-movado. La tuta movado estis firme organizita, centre gvidata kaj karakteriĝis per forta dinamismo. Estis je la dispono bone funkciantaj centra oficejo kaj eldonejo.

2. Sian ĉefan celon la sovetiaj esperantistoj vidis en sistema, kontinua kaj altkvalita informado de la tutmonda esperantistaro, aparte de la labo-

rista, pri la konstruado de socialismo en la juna ŝtato. Gravan rolon en tio ludis la esperantlingva komponento en la laborista-kamparana korespondado, Esperkor. Miloj kaj miloj da leteroj estis interŝanĝitaj kun la eksterlando. Ekzemple la Instituto pri Sociala eduko en Kremenĉug ricevis 9645 leterojn el 456 lokoj de 27 landoj nur dum la unuaj 6 monatoj de 1932, el tiuj 5180 leteroj el 165 germanaj lokoj.[3])

En la monate aperantaj organoj de SEU „Meždunarodnyi jazyk“ kaj „Bulteno de CK de SEU“ kaj poste en „La nova epoko“ kaj „Sur Posteno“ (ĉiuj revuoj troviĝas en la Leninbiblioteko de Moskvo) oni tre bone stimulis kaj subtenis tiun kolektivan kaj individuan korespondadon. Sed ankaŭ aperis libroj, broŝuroj kaj faldfolioj pri teoriaj temoj de marksismo-leninismo, pri ateismo kaj pri praktikaj problemoj de la socialisma konstruado. Ekzemple aperis broŝurserio „Komunisma Biblioteko“ (pli ol 20 titoloj). La soveta-germana eldonkooperativo EKRELO (kun presejo en Moskvo kaj administrejo en Leipzig) eldonis ĝis 1933 pli ol 60 titolojn. Tiu entrepreno tre grave helpis al SEU venki valuto-barierojn. Sed ankaŭ menciindas la faldfolia serio „La vero pri Sovetunio“ kun eldonkvanto de 20 000 ekzempleroj kaj jare pli ol 12 numeroj.

La laboristaj esperantistoj el diversaj landoj tradukis la materialojn nacilingven kaj aperigis ilin en la progresema nacilingva gazetaro. Ankaŭ radio-stacioj, inter ili Moskvo, Charkov, Leningrado, Minsk, Odessa, Rostov, Dnepropetrovsk, Lugansk, Krasnodar, Barnaul k. a. regule disaŭdigis Esperanto-programojn[4]).

3. Senprecedenca estis la libroproduktado. Ĝis 1934 SEU aperigis pli ol 200[5]) titolojn, inter ili ankaŭ beletraĵojn kaj gravajn verkojn pri interlingvistiko kaj esperantologio (aparte de E. K. Drezen). Krom la menciitaj organoj de SEU oni ankaŭ dum multaj jaroj redaktis „Sennacieca Revuo“ (aŭ „La nova epoko“), „La nova etapo“ kaj „Internacia Literaturo“. Ĉiuj revuoj distingiĝis per alta teoria nivelo kaj la konsekvenca klopodo apliki la marksismon-leninismon je Esperanto en teorio kaj praktiko. Ankaŭ multajn lernilojn SEU eldonis. Inter 1924 kaj 1930 estis venditaj entute pli ol 175 000 lernolibroj[6]).

4. Tre firman lokon SEU havis en la internacia Esperanto-movado kaj tie tre dinamisme kaj respondecplene agis. La progresemaj laboristaj esperantistoj en SEU havis seriozan kaj fortan partneron. Dum la kongresoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) ofte sovetiaj reprezentantoj vigle kaj celkonscie partoprenis la debatojn. Ĉirkaŭ ⅓ de la membroj de SAT estis el Sovetunio kaj la dua triono el Germanio. Granda kulmino sendube estis la 6-a SAT-Kongreso 1926 en Leningrado, kie la organizan komitaton, cetere, gvidis la unua viceprezidanto de ASE, la tiam juna *S. N. Podkaminer*. Dum tiu kongreso, laŭ la oficiala protokolo (Sennaciulo, novembro 1926, ekstra numero), *Anatoli Lunačarski*, la iama popolkomisaro por klerigado, diris pri la laborista Esperanto-movado: „Tiu-ĉi movado vastiĝos kun nerefutebla potenco kaj transformiĝos je unu el la plej seriozaj fenomenoj de la moderna socia vivo. Oni ne povas ankaŭ nei, ke la adeptoj de Esperanto, konsciante sin konduktoroj de la ekstreme progresivaj formoj de la homa interkomunikado, sentas certan proksimecon al la granda komunista movado kaj ke inter la komunistoj iufoje tutaj organizaĵoj aliĝas al la movado esperantista. Mi tutanime deziras al Esperanto pluan pliproksimiĝon kun la avangardaj formoj de la batalo laborista kaj pluajn sukcesojn.“

5. Grandan kontribuon la sovetia Esperanto-movado de la 20-aj kaj 30-aj jaroj donis al la pluevoluigado de la teorio pri internacia lingvo ĝenerale kaj pri Esperanto aparte. Elstaras ĉi-rilate la pli ol 50 verkoj (artikoloj kaj libroj) de Ernest Karlovič Drezen pri la historio de la internacia lingvo kaj de la Esperanto-movado, pri la evoluo de la lingvo mem kaj pri politikaj kaj organizaj problemoj de la praktika movado. Li ankaŭ fariĝis unu el la plej gravaj teoriistoj de lingvo-normigado en Sovetunio. Sed ankaŭ menciindas la kontribuoj de *Demidjuk, Izgor, Nekraksov, Spiridovič, Varankin, Sevak* kaj aliaj.

6. Ĝis hodiaŭ multaj iamaj membroj ankoraŭ aktivas kaj donas sian riĉan spertaron al la nova organizaĵo ASE, ĉar tiuj spertoj ne estas kabinetaj kaj abstraktaj sed ĉerpitaj rekte el la vivo, el la praktiko de SEU, ili estas aparte gravaj kaj valoraj. Entute la sovetia movado disponis pri aro da elstaraj aktivuloj, kiuj estis kaj bonaj terriuloj kaj praktikuloj. Iliaj verkoj, ankaŭ tiuj de la poetoj kiel *Miĥalski*, efikadas ĝis la nuntempo. La dudekaj kaj tridekaj jaroj ne estis facilaj. La kapitalismo troviĝis en profunda krizo. Konkeris en Eŭropo la potencon la faŝismo. Kreskis la militdanĝero.

   La cirkonstancoj por la Esperanto-movado pro tio ege malboniĝis. (sed en USSR ankaŭ pro subjektivaj eraroj de Stalin).

   Bedaŭrinde ankaŭ la nuntempo estas karakterizata de la profunda krizo de kapitalismo, ekstrema agresemo de la imperiismo kaj daŭre kreskanta militdanĝero.

   En tiu tempo la spertoj de SEU, akiritaj dum preskaŭ 20 jaroj, helpu nin pliefikigi nian agadon. Ĉar — movado, kiu ne konas sian historion estas kvazaŭ homo sen memoro. Ni lernu el la sukcesoj kaj ankaŭ el la eraroj de la pasinteco por pli bone majstri la nunon kaj la estonton.

Notoj

[1]) Bulteno de CK de SEU, Moskvo, 1931, n-ro 1, p. 3
[2]) Sur Posteno, Moskvo. 1935, n-ro 31—32 (167—168), p. 130
[3]) Meždunarodnyi jazyk, Moskva, 1932, n-ro 11/12, p. 314
[4]) Internaciisto, Berlin, 1931, n-ro 8, p. 62
[5]) Sur Posteno, Moskvo, 1936, n-ro 1—2
[6]) Internaciisto, Berlin, 1934, n-ro 4, p. 30

(Pli detale vidu i. a. la kontribuojn de D. Blanke en la volumo „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", Budapest 1978 kaj la tie menciitajn fontojn)

Detlev Blanke

*

Antaŭ 50 jaroj fondiĝis IPE

La 25-an de aŭgusto 1932 en Berlin fondiĝis grava internacia esperantista organizaĵo: La Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). Ĝi estis fondita de la klaskonscia opozicio en Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu kreiĝis pro la devojiĝo de SAT de klasbatalaj internaciismaj pozicioj. Per sia Proleta Korespondservo, la organo „Internaciisto" kaj la libro-eldonejo EKRELO (Eldon-Kooperativo de Revolucia Esperanta Literaturo) IPE grave kontribuis al la batalo kontraŭ faŝismo kaj milito, por la amikeco kaj defendo de Sovetunio. Dum la fonda kongreso IPE kunigis pli ol 13 000 laboristajn esperantistojn el 18 landoj. La ekrego de la faŝismo en Germanio kaj la malboniĝinta historia situacio en Eŭropo pli kaj pli malhelpis al IPE agadi, tiel, ke ĝi dissolviĝis 1939. Ĝiaj mesaĝo kaj tradicioj tamen vivas. —e

La 15a en Jerevano

Kiel konate ĉiujare la reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj renkontiĝas por interŝanĝi spertojn pri la komuna esperantista agado kaj por pridiskuti sian partoprenon en la internacia pacmovado.

Ĉi-jare la 15a Konsultiĝo okazis de la 24a ĝis 29a de aprilo laŭ invito de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj en Jerevano. Delegacioj alvenis el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Vjetnamio. Partoprenis el GDR la prezidanto de la Esperanto-Asocio Hans Heinel kaj la sekretario d-ro Detlev Blanke. Post kelkhora restado en Moskvo la delegacioj flugis al Jerevan kaj tie estis kore akceptitaj de la Armenaj Filioj de SSOD (Unio de Societoj por amikaj kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando) kaj de ASE. Bedaŭrinde ne plu estis eble renkonti la elstaran armenan esperantiston prof. Sevak en sia hejmlando. Li mortis antaŭ nelonge. La armenaj gastigantoj superŝutis la eksterlandajn delegitojn per varmkora gastamo kaj montris al ili sian belan respublikon. Tiuj tagoj, aparte la internacia kulturvespero, restos neforgeseblaj kaj la delegacio de GDR ĉi-loke tre kore dankas al Susanna Maĉkalova, prezidantino de la Armena Filio de ASE Tina M. Belousova, respondeca sekretario de la Armena Filio de ASE kaj al Avetis Patatjan, kiuj pleje gvidis tra la respubliko kaj klarigis al la gastoj la historion kaj nunon de Soveta Armenio. Aparta danko ŝuldiĝas al la prezidantino de Armena Filio de SSOD (AOKS) Nora Akopjan kaj Arsen Kakosjan, vicprezidanto de AOKS, kiuj kelkfoje akceptis la delegitojn kaj entute donis la eblecon por la okazigo de la konsultiĝo. Al la prezidanto de ASE, prof. Isajev kaj la funkciuloj de SSOD el Moskvo G. A. Kolobova, Galina N. Matkovskaja kaj la respondeca sekretario de ASE Anatoli V. Berjoza, kiuj ĉiuj havis sian meriton pri la konsultiĝo same iras kora danko. Dum la restado en Jerevano kaj Moskvo oni traktis multajn gravajn demandojn. Kun atento la delegitoj aŭskultis prelegon de prof. M. Isajev pri la 60a datreveno de la fondo de Soveta Unio. La delegitoj firme subtenis la sovetiajn proponojn por malarmado kaj esprimis sian esperon, ke la progresemaj fortoj sukcesos atingi daŭrigon de la malstreĉiĝo, fundamente grava por la plua sukcesa evoluo de la Esperanto-movado.

Post la tagoj en Jerevano en Moskvo ankoraŭ estis ebleco renkontiĝi kun kelkaj eminentaj sovetiaj esperantistoj kaj kun la Moskva klubo .Entute la konsultiĝo estis grava evento.

✶

Nekonata sorto de Lenin-verkoj

„Elektitaj verkoj de V. Lenin. 12-voluma kolekto. Estas eldonota de EKRELO dum la j. 1932 en traduko de plej bonaj sovetiaj esperantostilistoj".

Tiun anoncon oni povis legi 1931 en kelkaj sovetaj kaj alilandaj laboristaj Esperanto-revuoj (i. a. en Mezdunarodnyj Jazyk, 5/1931). 1933 la oficejo de EKRELO en Leipzig estis likvidita de la faŝistoj, kvankam EKRELO ankoraŭ iom vivis en Amsterdam. Ĉu pri la Lenin-manuskriptoj neniu ion scias. La gvidinto de EKRELO ĝis 1933, Walter Kampfrad, mortis 1981. Li nenion sciis pri la manuskriptoj. Sed 12-voluma kolekto (manuskripte) ne povas malaperi. Kiu ion scias pri ili? Kiuj el la „plej bonaj sovetiaj Esperanto-stilistoj" tradukintaj ĉapitrojn el la aldonata verkaro ankoraŭ vivas kaj scias detalojn? Ili estas petataj skribi al la redakcio de „der esperantist".

Esperanto en oficialaj interŝtataj kontraktoj

Rezulte de la propono de Kulturligo de GDR la kunlaboro de la esperantistoj estas menciita en la kulturkontraktoj USSR – GDR kaj ĈSSR – GDR por la jaroj 1981 ĝis 1985.

En „Kulturkontrakto inter Germana Demokratia Respubliko kaj Unio de Socialismaj Sovetrespublikoj por la jaroj 1981 – 1985“ (ekvalidiĝinta la 27an de januaro 1981) oni legas

Artikolo 113: „Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko kaj la Unio de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando *evoluigas la kunlaboron inter siaj asocioj por Esperanto* kaj inter la komisionoj resp. sekcioj por fotografio, aparte la interŝanĝon de ekspozicioj kaj de spertoj pri la praktika agado. La konkretajn formojn kaj la amplekson de ĉi-tiu kunlaboro oni senpere interkonsentos.“

Kaj en la „Kulturkontrakto inter Germana Demokratia Respubliko kaj Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko por la jaroj 1981 – 1985“ (ekvalidiĝinta la 1an de januaro 1981) oni trovas sub artikolo 59: „Ambaŭ flankoj akcelas kaj subtenas la kunlaboron inter Kulturligo de GDR sur unu flanko kaj

– . . . .

– la Ĉeĥa kaj Slovaka Esperanto-Asocioj aliflanke . . . .

Ili subtenas la kunagadon de ĉi-tiuj organizaĵoj en la internaciaj neŝtataj organizaĵoj“.

Jen do nova tre grava oficiala kadro por pliprofundigi la kunlaboron inter niaj asocioj.

Interkonsento pri amikeco kaj kunlaboro.

Inter la Esperanto – Asocio en Kulturligo de GDR Distrikta Estraro Schwerin kaj Estona Filio de ASE.

La supre nomitaj E-organizaĵoj decidas, uzante la internacian lingvon, kunlaboripor pliprofundigi amikajn interrilatojn, strebadi alproksimiĝon de la popoloj kaj kulturan interŝanĝon. Tiucele la kontraktantaj E-organizoj:

1. direktas sian agadon al subtenado de paco, internacia kunlaboro, malstreĉiĝo kaj malarmado.
2. strebadas pli vastajn amikecajn rilatojn inter niaj homoj.
3. subtenas individuajn kaj kolektivajn kontraktojn inter la membraro kaj la organizoj.
4. plivigligas kulturan interŝanĝon, disvolvas pli bonajn kaj vastajn kontaktojn inter la E-junularo kaj fakuloj.
5. konatigas reciproke spertojn de la E-agado.
6. publikigi interesajn artikolojn en la distriktaj aŭ landaj gazetoj aŭ ĵurnaloj.
7. direktas sian agadon por subteni la historian esploradon de la iama laborista E-movado.

La subskribintaj flankoj rekomendas anologan kunlaboron inter lokaj E-organizoj.

Por la Estona filio de ASE
F. Eisen prezidanto

Por la Distrikta Estraro Schwerin
H. Diedrich prezidanto

Nikola Aleksiev

Kune kun Georgi Dimitrov

Omaĝe al la 100a datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov (1882 – 1982) la konata ĵurnalisto kaj esperantisto, Honora Prezidanto de MEM kaj Honora Membro de UEA, Nikola Aleksiev el Bulgario priskribas en broŝuro[1]) kelkajn flankojn de la personeco kaj batalo de Georgi Dimitrov. Ni represas parton pri tiu tempo, kiam Nikola Aleksiev mem partoprenis la agadon por liberigi Dimitrovon.

. . . La patrolando de Georgi Dimitrov ne povis resti flanke de la amasa movado por savo de la germanaj kaj bulgaraj komunistaj gvidantoj, false akuzitaj pri krimaj agoj absolute neakordigeblaj kun iliaj politikaj konceptoj kaj revolucia taktiko.

Tiutempe mi laboris kiel redaktoro de gazeto „Edinstvo“ (Unueco), centra organo de la revoluciaj sindikatoj en Bulgario, nomataj oficiale Sendependaj Laboristaj Profesiaj Unuigoj. Samtempe mi estis sekretario de la Centra Komitato de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) kaj redaktoro de ties eldonaĵo „Laborista-Kamparana Korespondanto“, komence dusemajna, iom poste semajna, bulgarlingva ilustrita gazeto, tribuno de la laboristaj esperanto-korespondantoj.

Baldaŭ post la incendio formiĝis en Sofio Tutlanda Komitato defende al la jugatoj en Lejpcigo, konsistanta el elstaraj aktivuloj de la progresemaj rondoj. La komitato decidis komisii al mi fondi kaj redakti specialan gazeton kiel ties organon. Respondeculo antaŭ la polica cenzuro estis juna tabaklaboristo. La vizitantoj de la bonege aranĝitaj salonoj de Muzeo „Georgi Dimitrov“ en Lejpcigo povas inter la ceteraj eksponaĵoj rimarki grandan fotokopion de la fronta paĝo de tiu gazeto — „Kontraŭfaŝisma Fronto“, n-ro 1-a de 15-a de junio 1933, Gi aperis precize en la antaŭvespero de la Internacia protestsemajno kontraŭ la Lejpciga proceso (17.—25. 6. 1933), organizita laŭ decido de Antifaŝista Laborista Kongreso en Parizo (4.—6. julio 1933). Mi rakontos iom pli sinsekve kiel evoluis la afero lige kun la aperigo de gazeto „Kontraŭfaŝisma Fronto“.

Antaŭ ĉio, la tuta preparlaboro devis esti farata sekrete antaŭ la policorganoj. En kontraŭa kazo, la gazeto estus tutcerte konfiskita kaj la redaktoro enkarcerigota, kaj verŝajne eĉ jugota, malgraŭ ke la gazeto ne trafus la manojn de la legantaro.

Ĉi foje mi sukcesis trovi presiston, malnovan amikon de Georgi Dimitrov el la periodo de ilia kuna metilernado. Kvankam religiulo, li deklaris, ke por la defendo de Dimtrov li konsentas, presi kaj transdoni al mi la tutan kvanton sen anticipa permeso de la cenzuro.

La ĉefartikolon verkis mi. En ĝi mi defendis la bazan postulon de la momento: „Ni savu la juĝotajn Dimitrov, Tanev, Popov, Thälmann kaj Torgler! Ni eltiru ilin el la ungoj de la sanga faŝismo! Ni malfermigu la pordegojn de la arestejoj kaj koncentrejoj! Aligu ĉiuj aktive al la unueca luktopreta kontraŭfaŝisma fronto!

Sur la fronta paĝo mi lokis grandan fotomuntaĵon de la talenta bulgara proleta pentristo Aleksandro Jendov. Tiu ĉi esprimplena verko prezentas prizonkradon, malantaŭ kiu vidiĝas la aŭdaca vizaĝo de la gvidanto de GKP Ernst Thälmann, kontraŭ kiu oni organizis apartan proceson. Tamen post la dolora leciono, kiun la faŝistoj ricevis de Dimitrov en Lejpcigo, ili ne kuraĝis publike juĝi Thälmann-on kaj simple mortigis lin en la arestejo sen ia ajn jugproceso kaj sen formala kondamno.

Sur la maldekstra flanko de la fotomuntaĵo mi lokis la portretojn de Dimitrov kaj Popov, sur la kontraŭa — tiujn de Torgler kaj Tanev. La portretojn mi prenis el la bulgaraj burĝaj gazetoj.

Dum renkontiĝo kun membro de CK de la eksterleĝa BKP mi eksciis kie trovi ekzempleron de speciala franclingva eldonaĵo defende al Dimitrov kaj liaj kamaradoj. El ĝi mi tradukis leteron de Elena, la plej juna fratino de Dimitrov. En mia kvalito de sekretario de BuLEA mi havis sufiĉe vastajn korespondajn ligojn kun germanaj laboristaj esperantistoj. Mi skribis leterojn kaj atente petis informojn pri la aktuala stato de Germanio. Miaj korespondantoj trovis tre sagacan manieron trompi la viglan faŝistan cenzuron: ili sendis al mi informojn en formo de stencilita reklamo pri sportboatoj . . .

Tiamaniere mi preparis la numeron por presado kaj transdonis la manuskriptojn al la presisto. Li poste transdonis al ni la tutan eldonkvanton kaj pere de la Sofia organizaĵo de la Internacia Laborista Helpo oni disvastigis ĝin tra la tuta lando.

Sed iu ekzemplero trafis la manojn de la polico. La policesploristo ordonis, ke

oni arestu la respondecan redaktoron. Mi eksciis pri tio kaj ĉiuokaze kaŝiĝis. Oni sukcesis informiĝi, ke mi estas la fakta redaktoro kaj komencis urĝe serĉi min. Ĉar tio ne sukcesis, oni arestis la presiston kaj la sekretarion de la Komitato de Laborista Helpo.

Tiu manovro de la polico estis malbonŝanca por la interesoj de la laborista movado. Se la presisto daŭre restos arestita, ĉiuj presistoj ekrifuzos presi materialojn de la progresemaj laboristaj organizaĵoj, timante trafi la arestejon. Ni devis entrepreni ion por liberigi almenaŭ la presiston. En tiu momento min vizitis respondeca kamarado el la Centra Komitato de la Sendependaj Sindikatoj kaj rekomendis al mi aperi antaŭ la policesploristo, por ke la presisto, eĉ se eblus — ankaŭ la sekretario de Laborista Helpo — estu liberigitaj. Miaj klarigoj tamen ne devis doni pretekston al la esploristo aresti min.

Mi agis tiamaniere kaj insistis antaŭ la esploristo, ke mi havas nenion komunan kun simila eldonaĵo, kiun eĉ mi ne estas vidinta. Tamen li ordonis, ke oni arestu kaj sendu min al la Sofia Centra Malliberejo, malice rikanante kaj flustrante: „Tion vi rakontu al la juĝistoj!". Mia konsolo estis, ke tamen oni liberigis la presiston kaj la sekretarion . . .

★

Jam trian fojon mi devis resti inter la cementaj muroj de la Sofia Centra Malliberejo. Pasis multaj semajnoj kaj monatoj, sed la dato de nia juĝproceso ne estis fiksita.

Intertempe komenciĝis la proceso en Lejpcigo.

Nature, inter ni en la malliberejo ekzistis granda intereso al tiu proceso. Ni sekvis kun streĉita atento la svingon de la lukto por liberigo de la akuzitoj kaj la pasadon de la proceso mem. Kun granda ĝojo kaj fiero ni legis pri la kuraĝa sinteno de Dimitrov antaŭ la Imperia Tribunalo, precipe pri liaj streĉaj dueloj kun Göring kaj Goebbels. Eĉ burĝaj bulgaraj gazetoj, kvankam iom hezite, devis rekoni, ke nia eminenta kunlandano aŭdace defendis la bulgaran popolon kontraŭ la kalumnioj de la faŝistaj gazetoj en Germanio.

Inter la politikaj arestitoj estis iu junulo nomata Ljubĉo Baramov, filo de la plej aĝa fratino de Dimitrov. Li estis 19-jara gimnaziano, altstatura, fortika belulo kun sentima kaj vireca karaktero, klera, bonega komsomolano. La trajtoj de lia vizaĝo havis multon komunan kun la portretoj de Dimitrov el lia juneco. Por ni tiu fizika simileco prezentis vivan ligon inter Ljubĉo kaj lia onklo el la periodo de la junaĝo de Dimitrov. (1944 tiu admirinda Ljubĉo pereis kiel partizano per la morto de la bravuloj.)

Oni konfidis al mi zorgi pri la funkciado de konspira kanalo, per kies helpo ni ricevadis elekstere la laboristan gazetaron, faciliganta nin informiĝi sisteme pri la evoluo de la lukto en Lejpciga tribunalo kaj pri la defenda mondkampanjo. Ni disponis ankaŭ per la bulgara traduko de „Bruna libro" — tiu fama dokumentaro, kiu senmaskigis la organizantojn de la bruligo de germana parlamentejo.

Por ni, politikaj malliberuloj en Bulgario, devontaj aperi antaŭ la faŝista tribunalo, havis grandan politikan signifon ĉio ĉi, kion ni observis sur tiu siaspeca monda scenejo, en kiun transformiĝis laŭ la volo de la personeco de Dimitrov la Imperia Tribunalo en Lejpcigo. Ni lernis el la ekzemplo de Dimitrov kiel konduti antaŭ la faŝistaj juĝistoj, kiel defendi niajn politikajn konceptojn kaj revolucian honoron. Longa estas la nomaro de tiuj herooj, kiuj pruvis, ke ili estas indaj adeptoj de sia kunlandano kaj partia gvidanto. Gloron al la memoro de tiuj abnegaciaj dimitrovanoj!

★

La politikaj arestitoj renkontis jubile la malkondamnan verdikton por kamaradoj Dimitrov, Tanev kaj Popov. Niaopinie, Marinus van der Lube prezentis el si senkonscian instrumenton en la manoj de hitleranoj. Ni daŭre timis pri la sorto de karmemora Ernst Thälmann

La vasteco de la konceptoj, defendataj de Dimitrov dum la tribunalkunsidoj, lia transformiĝo de akuzato en brilantan akuzanton, faris fortegan impreson al ĉiu honesta persono, eĉ ne dividanta la idearon de Dimitrov. En sia famkonata ferma parolado li traktis ekskluzive gravajn principajn demandojn: la eraroj de Bulgara Komunista Partio dum la faŝista renverso en 1923, ne prisilentante ankaŭ siajn proprajn erarojn; la nacia fiereco de la komunistoj kaj la neceso ĝuste pritaksi la pozitivajn farojn en la historio de la popolo; estimo antaŭ la progresema scienco kaj kliniĝo antaŭ ties herooj kaj martiroj; grandega amo kaj respekto al Sovetunio — efektiva kriterio de la proleta internaciismo. Krome, li manifestis perfektajn konojn pri la historio, jurisprudenco kaj kulturo de la germana popolo.

El kio ŝprucis tiu vasta klereco?

Kiu foje vizitis la Nacian Muzeon Georgi Dimitrov en Sofio, vidis tute konkrete kiel, jarojn antaŭ sia aresto de faŝistaj policanoj Dimitrov lernis la germanan lingvon — la lingvon de Marx kaj Engels. Lin helpis tiudirekte lia vivkunulino Ljuba Ivoŝevič-Dimitrova, treege talenta kaj inspirplena proleta poetino.

En lia hejma biblioteko — impona laŭ la nombro de la volumoj kaj elekto de la aŭtoroj, oni vidas en originalo aŭ en

bulgara traduko dekon da libroj kaj gazetoj de germanaj marksistoj kaj de verkistoj, filozofoj kaj politikistoj de Germanio.

En lia biblioteko ni vidis unualoke la fundamentajn verkojn de Marx kaj Engels. Krome, en la katalogo ni rimarkis diversajn eldonaĵojn de Goethe, leterojn de Wagner, la unuan volumon de Büchner-verkaro, naŭ volumojn de Wilhelm Wundt, sep volumojn de Nietzsche, kvar — de Schopenhauer, same tiel verkojn de pluraj aliaj aŭtoroj en germana originalo. Nur la simpla elnombrado jam sufiĉe karakterizas la vastecon de la kulturaj kaj sciencaj interesoj de Dimitrov. Ne tiel facile li elkreskis el ordinara presista laboristo al la pinto de la plej erudiciitaj mondfamaj politikaj verkistoj. Lia propra verkaro en bulgara lingvo ampleksas dekkvar solidajn volumojn.

Mirigas en plej alta grado lia amo al kulturo kaj scienco, speciale al la germana historio kaj bel-literaturo, eĉ en la ekskluzive peza kaj por mensa laboro malfavora cirkonstancaro de Moabit-malliberejo. Esti tagnokte ŝlosita en mankatenoj, kaŭzantaj akrajn dolorojn dum ĉiu moviĝo; esti false akuzita pri faro de monstra krimo, prezentante perfektan nuligon de la senco de lia revolucia agado; esti izolita de kamaradoj kaj parencoj; esti senrajtigita elekti propravole sian juran defendanton, kiun rajton garantias eĉ la valida germana ŝtata juro... Kaj malgraŭ tio mobilizi siajn fortojn por koncentriĝi en legado kaj studado de miloj da paĝoj el la monda kaj precipe el la germana klasika literaturo pri historio, juro, filozofio, legi la germanajn klasikulojn Goethe, Lessing, Herder, Wieland kaj alinaciajn — Homer, Cervantes, Shakespeare, Byron. Nur pri la historio de Germanio li tralegis dum unu monato kelkmilojn da paĝoj...

Kaj ĉio ĉi — ne simple por pasigi la tempon kaj forigi la molestan arestejan enuon, sed por forĝi akran armilon por defendi „siajn ideojn, siajn komunistajn konceptojn", por entute refuti la falsajn akuzojn de la prokuroro, finfine — por ĉerpi personan kuraĝon por la antaŭstarantaj kruelaj kunpuŝiĝoj kun la akuzantoj de la faŝista klasa „justico"!

Ni rememoru nur la faman aforismon
de la granda Goethe:
„Se vi perdis posedaĵon —
malmulton vi perdis,
se vi perdis honoron —
multon vi perdis,
se vi perdis kuraĝon —
ĉion vi perdis!"

Al tiuj senmortaj strofoj la katenita Dimitrov aldonis la trafajn liniojn de Danton: „Jes, tute prave — kuraĝon, kuraĝon kaj konstante kuraĝon! Kaj tutvaporo antaŭen — malgraŭ ĉio!"

En sia historia duelo kun la faŝisma justico kaj obskurantismo Dimitrov sin bazis sur la korifejo de la germana kaj monda literaturo, prenis por siaj aliancanoj la plej brilajn poetojn de ĉiuj epokoj. Dum Göring aplombe kaj kun policministra aroganteco deklaris publike, ke aŭdante la vorton „kulturo", li tuj kaptas sian revolveron, Dimitrov elforĝis el la kulturo de la homaro venkodonan armilon kontraŭ la faŝisma barbareco. Kaj li venkis!...

*

Mia persona konatiĝo kun Dimitrov origine devintus okazi en 1932 aŭguste, dum la Monda Kongreso Kontraŭ Imperialisma Milito en Amsterdamo. En ĝia organizado li partoprenis tre aktive, kvankam tio ne estis publike manifestita. Mi devis certigi mian ĉeeston en la kongreso por renkontiĝi kun Dimitrov. Tiutempe mi estis redaktoro de la centra organo de bulgaraj revoluciaj sindikatoj — la semajna gazeto „Edinstvo" (Unueco). Mi ricevis la taskon konigi detale al Dimitrov la situacion en Bulgario kaj la batalojn de la sindikata movado, informiĝi pri liaj konsiloj kaj direktivoj. Tamen la polico en la lasta momento malhelpis mian forveturon. Fakte mi konatiĝis kun Dimitrov nur post 14 jaroj, kiam li revenis al Bulgario post 22-jara elmigrado.

Tiam mi denove redaktis la centran organon de la unuecaj bulgaraj sindikatoj — la semajnan gazeton „Standardo de la laboro". En mia kvalito de sindikata funkciulo kaj ĵurnalisto mi jam havis pli oftajn kontaktojn kun Dimitrov. Post du jaroj venis la momento, kiam ni devis transformi la semajnan organon en ĉiutagan gazeton „Trud" (Laboro). Malgraŭ sia grandega okupateco kiel ministroprezidanto kaj partiestro, Dimitrov interesiĝis pri la kreo de nova organo. Tio estas tute komprenebla, se oni havus antaŭvide, ke en Bulgario unuafoje en la historio de la sindikata movado devis aperi ĉiutaga sindikata organo. Simila gazeto havos grandan signifon kiel por plifortigo de la sindikatoj mem, tiel por la publika opinio en la lando, travivanta malfacilajn momentojn pro la senĉesaj intrigoj kaj provokoj de la malica burĝa opozicio kaj pro la manovroj de la angla-usona imperiismo. Dimitrov invitis en sian hejmon la redaktan komitaton de „Trud", detale informiĝis pri niaj planoj kaj donis al ni valorajn konsilojn. Kiel sperta sindikata publicisto li fakte „akuŝis" la naskiĝon de la nova ĉiutaga gazeto, verkante fakte ties ĉefartikolon, kiun ni estis skizintaj. La bulgaraj sindikatoj jam disponis pri propra ĉiu-

taga tribuno — fenomeno ne tiel ofta eĉ en la monda sindikata praktiko.

La Duan Kongreson de bulgaraj sindikatoj (1948) ĉeestis delegitaro ankaŭ el posta GDR, frunte kun la tiama prezidanto de Liberaj Germanaj Sindikatoj (FDGB) kamarado Hans Jendretzki. Dum tiu kongreso ni havis la plezuron aŭskulti unu el la plej brilaj paroladoj de Dimitrov — „Sen la laborista klaso ne ekzistas kaj ne povas ekzisti popola demokratio". Ĝi daŭre konservas sian aktualecon ankaŭ hodiaŭ. post kelkaj jardekoj, ĉar bedaŭrinde ankaŭ nun troviĝas „ideologoj" pretendantaj esti marksanoj, kiuj predikas „demokration" sen la partopreno de la laborista klaso, eĉ ignorante ties ekziston . . .

Antaŭ kelkaj jaroj mi denove vizitis GDR lige kun la preparo de scenaro por dokumenta filmo „Georgi Dimitrov kaj la sindikatoj", kiun mi devis verki. Parto el la dokumentoj troviĝis en GDR kaj Okcidenta Berlino. Interalie mi renkontiĝis kun kamarado Jendretzki, ankoraŭ prezidanto de la parlamenta grupo de FDGB. En la Parlamentejo ni havis agrablan interparolon kaj emociite rememoris la imponan figuron de la gvidanto de l'internacia laborista revolucia movado. Ni amike konversaciis pri Dimitrov, kies saĝeco lasis daŭrajn spurojn ĉe ĉiu, kiu havis la feliĉon renkontiĝi kaj labori kun li . . .

---

1) Nikola Aleksiev: Georgo Dimitrov. Pri Esperanto-movado kaj pacbatalo. Skizoj kaj rememoroj dediĉitaj al 100-jara Dimitrov-jubileo. BEA, Sofia 1982, 38 p., 9 fotoj.

E. Miĥalskij

Al Dimitrov

Tra tuta mondo flamaj vortoj sonis
de kamarad' Dimitrov bolŝevik';
ne la, sed li per malhonoro kronis
la tribunalon de l'naci-svastik'.

Ne helpas fals-atesta diligento,
nek plej malnobla trompa artifik',
nek aĉ-minaca prem', nek promto
de agentoj,
nek prokuror' de „alta kvalifik'".

Per ĉiu son' de saĝa, klara vorto,
Dimitrov batis falson per logik',
perforton li refutis per la forto
de bolŝevika rekta politik'

Kaj tuta mondo vidis, kiel maskon
forŝiris li de l'pseŭdo-aŭtentik'
kaj la proces' alportis nur fiaskon
al hokokruca bruna fanatik'.

Sed por jugita klas', prolet-amaso,
ĝi estis pruv', ke ĝia solamik',
ke ĝia defendant', ke ĝia voj-kompaso
nur estas la parti' de tiu bolŝevik'.

(El „Sur Posteno", Moskvo, n-ro 149, p. 3)

★

Esperanto-Weltkongreß in Ungarn 1983

In Präzisierung der in Nummer 2/82, S. 42, gegebenen Informationen über die Esperanto-Weltkongresse der UEA und TEJO teilt der Zentralvorstand mit:

1. **Der 68. Esperanto-Weltkongreß findet vom 31. 7. — 6. 8. 1983 in Budapest statt (Preis ca. 1000 — 1600 Mark über Reisebüro).**
2. **Der 39. Internationale Jugend-Kongreß des Esperanto-Weltbundes findet vom 23. — 30. 7. 1983 in Debrecen statt (Preis ca. 500 — 700 Mark über Reisebüro).**

Für beide Kongresse ist die Teilnahme von DDR-Bürgern möglich. Das Reisebüro der DDR bietet organisierte Fahrten an, über deren Einzelheiten der Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes informiert. Es ist jedoch auch möglich, an diesen Kongressen unabhängig vom Reisebüro teilzunehmen. Die Reise hat dann jeder Interessent selber zu organisieren. Alle Interessenten, unabhängig davon, ob sie über das Reisebüro oder privat an den Kongressen teilnehmen wollen, müssen sich umgehend beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes formlos melden. Der ZV liefert in Abständen an die Interessenten die erforderlichen Informationen, die eine Vorbereitung auf den Kongreß und eine erfolgreiche Teilnahme erleichtern sollen. Voraussetzung für die Kongreßteilnahme sind entsprechende Sprachkenntnisse.

Jeder Esperantist ist aufgerufen, die seltene Möglichkeit einer Kongreßteilnahme zu nutzen. Interessenten wenden sich an: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Zentralvorstand, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60.

Prof. D-ro HASZPRA Otto, gvidanto de la Scienca Eldoncentro de UEA, Budapeŝto:

LASTATEMPA STATO KAJ EVOLUTENDENCOJ DE LA APLIKADO DE ESPERANTO EN LA SCIENCOJ KAJ FAKOJ FINE DE 1981 *)

Parto I

1. Nova ekonomia vidpunkto pri la prolingvaj kostoj

. . . Oni pli kaj pli parolas nuntempe pri la **kostoj** de la internacia komunikado. Fakte, pri tio ankoraŭ neniu faris vere ĝeneralan statistikon. Se oni parolas pri la kostoj, tio ĉiam koncernas la senperajn kostojn, tiun de la tradukado-interpretado. Do se la koncernaj fakuloj konas la lingvon de la traktado, tiam oni konsideras, ke la lingvo ne kaŭzas kostojn . . .

Tamen mi devas diri, ke la vera kosto de la multlingveco estas ne en la senperaj kostoj de la tradukado. La veran koston signifas la tempokonsumo de la lernado de la lingvoj. Averaĝe inteligenta persono kutime devas dediĉi 2000 horojn, do tutan laborjaron al la lernado de fremda lingvo, ne parolante pri la stabiligo de la akirita scio. Se oni konsideras pro simpleco, ke la laborperiodo de la vivo daŭras 40 jarojn, tio signifas, ke el tiu periodo 2,5 procentoj estas dediĉitaj al lernado de unu lingvo. Mi opinias, ke en la malproksima estonto ĉiu homo devus scii komunan lingvon krom sia gepatra, pere de kiu li aŭ ŝi povas interkompreniĝi kun iu ajn loĝanto de la Tero. Se tiu komuna lingvo estus nacia lingvo, la produktado de la homaro estus 2,5 procentojn pli malalta, ol se oni ne perdus tempon per la lernado de dua lingvo. Sed se oni elektus Esperanton, por kies ellerno, laŭ mia propra sperto, 200 horoj estas abunde sufiĉaj, tiam la tempoperdo, t. e. la produktoperdo egalus nur 0,25 procentojn. Kaj se la tiel liberiĝantan tempon oni ne volas uzi por industrie produkti, oni povus ekzemple plilongigi ĉies jaran libertempon per 4—5 tagoj ĉiujare.

Mi nur menciu, ke la ellernado de fremda nacia lingvo fare de la tuta homaro (escepte la privilegiitan nacion) signifus produktoperdon egalvaloran al ĉ. 1000 miliardoj da dolaroj, kiu sumo egalas la nunan tutan nacian enspezon de Usono, kaj ĉirkaŭ trioblon de la militelspezoj de la nuna mondo. Eĉ nuntempe oni povas kalkuli ke la lernado de lingvoj far limigita nombro da homoj kostas ĉ. 10 miliardojn da dolaroj tutmonde, kiu jam tute ne estas neglektebla sumo. Ĉio ĉi simple pro la neestigitaj produktajoj. Estas evidente, ke la kostoj de la lingvolernado pleje koncernas la sciencistojn, kies labortempo estas la plej altvalora . . .

2. Sciencodirekta evoluo ene de la Esperanto-movado

Kvankam Esperanto ankoraŭ ne havas sistemigitan, ĝenerale akceptitan sciencan terminologion, tamen en tiuj sciencoj aŭ subbranĉoj de sciencoj, kie oni serioze uzis Esperanton, montriĝis, ke ekzistas nenia obstaklo kontraŭ evoluïgi ĝin en veran sciencan lingvon. Rajte konstatis la **Ahrenshoopa interlingvistika seminario en GDR en 1978:**

> „La ĝisnunaj spertoj kaj faktoj pruvas, ke Esperanto estas plej taŭga, kiel interlingvo ankaŭ por la scienco“ (13).

Tiu ĉi seminario havis tre gravan rolon en la nova evoluetapo de la aplikado de Esperanto por sciencaj celoj, ĉar siaspece ĝi estis unua kaj direktomontra. Kvankam izolitaj provoj, eĉ persistaj kaj ĝis hodiŭ daŭraj — kiel la Sciencaj Vesperoj en Budapeŝto — komenciĝis jam iom antaŭe, tamen tiu seminario estis la unua kunveno de plurnacia serioza fakularo, kiu sisteme okupiĝis pri la sciencaj taskoj koncernantaj la studadon de la internacia lingvo kaj pri la taskoj por ties scienca aplikado. La ĉeestintaj lingvaj kaj natursciencaj konstatis la neceson „disvastigi la aplikon de Esperanto je ĉiam pli multaj sciencaj kaj fakaj terenoj . . . (kaj) . . . kreskigi la proporcion de ĝia utiligo“. La komuniko pri la Seminario donis gravan puŝon al la organizado de esperantlingvaj natursciencaj konferencoj kaj aliaj agadoj.

Kvankam la interlingvistika scienca agado en GDR jam komenciĝis kelkajn jarojn antaŭe, kaj sub ties efiko eĉ la antaŭaj Konsultiĝoj de la gvidantoj de la socialism-landaj Esperanto-organizaĵoj jam akceptis kelkajn rekomendojn koncerne la sciencan studadon de Esperanto kaj de ties sociaj rilatoj, tamen — miaopinie — estis ĝuste la teoriaj diskutoj pri la estontaj farendaĵoj en tiu seminario, kiuj donis la fundamenton de tiuj tre detalaj kaj praktikaj rekomendoj pri la scienca aplikado de Esperanto, kiujn la sekva, 12-a, Konsultiĝo akceptis en 1979 (19, 20), kaj kiuj lastaj povas servi por la longa tempo, kiel direktivoj por ĉiuj sciencocelaj agadoj, miaopinie ne nur en la socialismaj landoj, sed ankaŭ en la tuta Esperanta

*) Prelego prezentita en la fondo-konferenco de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, en majo 1981, kaj poste mallongigita kaj ĝisdatigita de la aŭtoro.

mondo. Intertempe la materialo de la seminario aperis en aparta volumo (13).

El la sciencaj aranĝaĵoj sekvintaj serie tiun de Ahrenshoop, elstaras la

Seminario: Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, Žilina, Cehoslovakio, 1978. Ĝi jam grandparte okupiĝis pri la aplikado de Esperanto en la natursciencoj kaj tekniko, kaj la sukceso (ĉirkaŭ 60 partoprenintoj) instigis organizi kaj plani pluajn en Ĉehosovakio kaj en aliaj landoj. La materialo de la prelegoj aperis en aparta volumo.

Kaj nun mi daŭrigu iom rapsodie per aliaj iom gravaj eventoj, aranĝaĵoj, organoj, kiuj pleje influis kaj karakterizis la rapidan evoluon de la aplikado de Esperanto.

Samtitola seminario, Ústí nad Labem, Ĉehoslovakio, 1980 kaj samtitola konferenco en Žilina, CS, 1981. La seminario organizita en la ĉeha respubliko de CS same okupiĝis pri faklingvaj demandoj kaj pri natursciencaj temoj, tamen ĉi lastaj ĉiuj rilatis al la biosfero aŭ al la homa vivmedio. La seminarion partoprenis jam 80 personoj, inter ili 12 eksterlandanoj.

La Konferenco de Žilina faris enviindan pluan antaŭenpaŝon, eĉ salton. Ĝi daŭris 3 tagojn, estis organizata en 3 paralelaj sekcioj, kie oni prezentis ĉ. 50 prelegojn pri natursciencaj kaj teknikaj temoj. Krome oni okupiĝis pri la necesaj konkretaj paŝoj por plua evoluigo de la aplikado de Esperanto por sciencaj celoj kaj formulis ĉi-rilate utilajn rekomendojn. La Konferencon ĉeestis 152 personoj kaj la materialo aperis post la konferenco en du volumoj. Estis okulfrape elsalta la elpaŝo de la komputilistoj, kiuj konsistigis la plej grandan samfakan grupon kaj estis la plej aktivaj, koncerne la prelegojn kaj diskutojn.

Internaciaj Medicinaj Konferencoj (IMEK), Krakovo, PL, 1977, Hódmezővásárhely, H, 1979 kaj Ruse, BG, 1981. La Krakova materialo aperis presita, la dua aperos baldaŭ en la Sciencaj Komunikaĵoj, verŝajne ankaŭ la Ruse-a aperos presita. La scienca nivelo de tiuj konferencoj montras daŭran plialtiĝon kaj la nombro de la prelegoj kaj la partoprenintoj estas impona (en Ruse 43 prelegoj por 220 partoprenantoj).

Sciencaj Vesperoj en klubo Konkordo, Budapeŝto, H, ekde 1972 regule aranĝiĝas dufoje monate kun hungaraj kaj eksterlandaj prelegantoj, plejparte pri natursciencaj kaj teknikaj temoj. La nombro de la Vesperoj jam proksimiĝas al 150 (9 jaroj!).

La Budapeŝta Informilo ĉiumonate enhavas 4—8 paĝan **Sciencan Rubrikon** kaj ĉiujare aperigas aldonkajeron **Sciencaj Komunikaĵoj** kun sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj kaj informaj kaj direktomontraj skribaĵoj. La menciita Scienca Rubriko egę riĉiĝis kaj pli kaj pli fariĝas internacia forumo kaj novaĵkolektaĵo de la scienca aplikado de Esperanto. La Sciencaj Komunikaĵoj ne aperis ekde 1980 pro fortomanko, sed unu numero estas preskaŭ prespreta kaj eble ekde 1982 ĝi denove regule eldoniĝos.

Nepre menciindas la **ĉiujare granda scienca vespero de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo,** kie ankaŭ provincanoj kaj eksterlandanoj prelegas kaj diskutas ekde 1973.

Nuntempe apartaj **komputista, medioprotektada, geologia, matematikista kaj ekonomikista grupoj** komencas memstare agadi en Hungarujo. Fine de decembro 1980 la matematikistoj, fine de decembro 1981 la ekonomikistoj aranĝis, kaj fine de 1982 la komputilistoj aranĝos internacikarakterajn fakajn seminariojn, ĉiujn en kunlaboro kaj kun helpo de neesperantistaj fakaj organizaĵoj.

Latinamerika scienca konferenco, Marilia, Brazilo, 1979, jam ŝajnigis, ke scienca agado reviviĝas en tiu kontinento, kaj poste en 1981 dum la UK oni povis sperti aliajn favorajn signojn.

Organiziĝo de sciencistoj-inĝenieroj kun energia gvidado sed ankoraŭ malforta membraro komenciĝis en **Usono.** Ankaŭ tie ni komencas vidi formiĝon de korespondaj kursoj pri diversaj sciencoj en la Universitato Comenius en Kalifornio. Forte agadas la komuna **Terminologia Centro de la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj de la Akademio de Esperanto** en **Kanado.** Nur antaŭ jaro ĝi aperigis la proveldonon de la Esperanta (Duden) Bildvortaro, kiun mi rekomendas al la atento de ĉiuj, fakuloin inkluzive.

Organiziĝo de la **sciencaj komisionoj ĉe preskaŭ ĉiuj socialismlandaj Eŭropaj Esperanto-Asocioj, inkluzive Sovetunion,** krome la fakto, ke la nova **Kuba Esperanto-Asocio rekte apartenas al la Kuba Scienca Akademio,** ofertas plurajn eblecojn ankoraŭ ne tute ekspluatatajn por pli efika disvolvo de la scienca aplikado de Esperanto. Estas ankoraŭ malhelpoj pro inerto kaj miskomprenemo de certaj oficialuloj, tamen la perspektivoj vastiĝis.

En la **Tria Mondo,** ĉefe en **Irano,** ekde kelkaj jaroj la lingvo disvastiĝas ĉefe en **universitataj rondoj progresemaj** kaj oni metas la emfazon al la **scienca-teknika aplikado.** Eĉ inter la nunaj cirkonstancoj foje-foje alvenas bonaj novaĵoj pri tio.

Ŝajne en la lastaj du-tri jaroj la forta centra direktado de la **Esperanto-Ligo en Cinio** iom mildiĝis, ĈEL iĝis membro

de UEA, kaj krom la plurloka reflorado de la Esperanto-movado anoncis sin **ankaŭ sciencistoj,** kiuj pleje emfazas la gravecon de la scienca aplikado de Esperanto (14). La El Popola Činio serie publikigas popularsciencajn kaj teknikajn artikolojn kaj startis jam eĉ scienca revuo (Entomotaxonomia), en kiu interalie ankaŭ Esperanto estas uzata. Aperis la unua scienca libro enhavanta 17-paĝan Esperantan resumon kaj ankaŭ la Plenan Gramatikon de Kalocsay kaj Waringhien UEA sukcesis presigi en Činujo.

En **Rumanio** la movado reviviĝis antaŭ 3 jaroj kaj forte evoluas en universitataj kaj akademiaj rondoj. De 1978 oni ĉiujare aranĝis **sciencajn tagojn** en Timisoara kaj oni laboras pri aperigo de literaturscienca revuo. Estas interesiĝo ankaŭ inter natursciencistoj.

Rapida evoluo okazas en **Sovetio,** kie jam antaŭe la **Interlingvistika grupo de la Scienca Akademio de SU** produktis gravajn sciencajn materialojn pri la aplikado de Esperanto (1), dum nun estas eldonata la dua studvolumo pri la problemoj de la internacia helplingvo (2). Organiziĝis ankaŭ **alia scienca grupo ĉe la Kibernetika Komitato de la Prezidio de la Scienca Akademio de SU** pri „Planaj lingvoj kaj dokumentoj". Oni nun diskutas pri celdifinoj kaj klopodas atingi apereblecon por E-lingva revuo, kiu verŝajne havos ankaŭ ian sciencan suplementon. Tamen tiu afero ankoraŭ ne estas solvita.

Ekde la fino de 1980 unu post la alia fondiĝas sciencaj grupoj en la lando, kiuj jam aranĝis sciencajn prelegkunvenojn kaj agadplanojn. Sperteblas aktiva terminologia agado kaj partopreno en tiu de aliaj landoj.

Pri kibernetiko oni okupiĝas ankaŭ okcidente, ĉefe en la **Instituto por Kibernetiko en Paderborn,** FRG, kiu faras organizan laboron, eĉ atingis, ke **unu el la oficialaj lingvoj de la Internacia Kongreso de Kibernetiko** aranĝita en Namur, B, 1980, **estu Esperanto** apud la ĝisnunaj angla kaj franca, kaj kiu aperigis unu el la studvolumoj de la konferenco en Esperanto. Tiu materialo estas bone utiligebla en sciencaj rondoj. Same la Paderbornanoj aranĝis internacian sciencan konferencon plurlingvan en sia urbo en 1981, kiu bone servis kaj la internajn bezonojn de la esperantista sciencistaro, kaj same efikis, kiel bona propagando al la eksteraj fakuloj.

En la **Someraj Universitataj Kursoj** en Liège, B, de pluraj jaroj oni aranĝas **plursemajnajn sciencajn prelegseriojn** kaj eldonas ties materialon en formo de notoj. Cetere tre multekoste, kaj mia opinie tio estas obstaklo kontraŭ pli rapida evoluo. Nu, tiuj notoj signifparte aperis el la plumo de japanaj sciencistoj ja en **Japanujo multaj sciencistoj, ankaŭ junuloj, favoras Esperanton, aperigas librojn.**

Surbaze de la numeroj de La Espero el Koreujo oni povas konstati, ke ankaŭ en **Suda Koreio** oni dediĉas atenton al scienca kaj teknika aplikado de nia lingvo. Instruado de la lingvo Esperanto enpenetris iome eĉ teknikajn universitatojn.

En **Vjetnamio** dum la liberiga milito oni relative multe eldonis en Esperanto, inter ili ankaŭ **popularsciencajn librojn** pri la popoloj, geografio, historio, ekonomio de Vjetnamio. Espereblas, ke nun dum la jaroj de la landkonstruado oni plu utiligos Esperanton helpante ĝian disvastigon ankaŭ en Laoso kaj Kampuĉio, el kiuj lastaj jam aperis la unuaj signoj pri kontaktiĝemo ĝenerale.

Oni devas konsideri grava evento, ke la **Kemia Fakultato de la Varsovia Teknika Universitato** aranĝis en aprilo 1980 renkontiĝon de la estintaj studentoj, kies slogano estis **„Esperanto en la scienco kaj tekniko".** En ĝia scienca sesio inter aliaj sciencaj prelegoj, 200 personoj aŭskultis pollingvan informprelegon pri Esperanto kaj poste esperantlingvan teknikan prelegon de eksterlanda profesoro, kiu vekis tre grandan interesiĝon. Fakte tiu eksterlanda profesoro estis mi. Cetere tion mi ripetis ankaŭ en Sofio por tute faka aŭskultantaro de 8 profesoroj kaj 50 studentoj, sed ĉikaze kun interpretado de frazo al frazo. Poste mi respondis kaj diskutis alparolojn, kio montris, ke Esperanto estas vere viva lingvo, kapabla esprimi eĉ sciencaĵojn. Tiaspecaj prelegoj estas laŭ mia opinio unu el la plej efikaj metodoj por la enpenetrado en neesperantistajn mediojn, se estas sekvitaj de bone organizitaj kursoj.

Ioma aktivado komenciĝis inter studentaro kaj profesoraro de kelkaj **teknikaj universitatoj** diverslandaj (hungara, nederlanda, slovaka, sovetia), kaj ankaŭ TEJO kaj opaj landaj junularaj E-sekcioj komencas agadi sur scienca kaj faka kampo. (Daŭrigo sekvas)

★

En bulgaraj lernejoj

Konsiderante la pozitivajn rezultojn de Esperanto-instruado kaj edukado en la lernejoj, la Ministerio de Popola Klerigo de Bulgario enkondukas ekde la nova lernojaro 1982—1983 fakultativan instruadon de Esperanto ankaŭ en la 10-ajn klasojn de ĉiuj mezlernejoj.

La bulgaraj esperantistoj kore dankas al la superaj ŝtataj klerigaj instancoj pro la manifestita kompreno de la grava rolo de Esperanto-instruado en la lernejoj por plialtigo de la lingva kaj ĝenerala kulturo de la gelernantoj, el kies vicoj en la bulgaran E-movadon venos novaj generacioj de esperantistoj.

La enkonduko de fakultativa lernado de Esperanto en la klasojn de la mezlernejoj estas nova grava akiraĵo por la bulgara E-movado. Ĝi kontribuos por plifirmigo de la lingvoscioj, akiritaj en la 9a klaso, kaj antaŭenpuŝos la disvastigon de la Internacia Lingvo en Bulgario.

Bruce Arne Sherwood (USONO)

Sintezo de Esperanta parolado far komputoro

En „Kontakto“ 66, Rudolf Fischer menciis miajn esplorojn pri sintezo de parolado en diversaj lingvoj, kaj mi nun aldonu kelkajn detalojn. Mi jam verkis programojn por transformi tajpitan tekston al parolado en Esperanto kaj en la hispana, itala, rusa, kaj angla lingvoj. D-ro C. C. Cheng kaj mi pritraktis la germanan kaj francan. La angla ja estas plej malfacile traktebla inter ĉi tiuj. Tre interese estas, ke ne temas sole pri la fame komplika kaj escepta literumado, sed ankaŭ pri la komplikega sonsistemo de la angla. Fakte, mi uzas fonetikan skribon por eviti literumajn problemojn, kaj tamen mia sinteza angla nete subkvalitas mian sintezan Esperanton, kiu fontas el tute normala literumado. Kiel Fischer raportas, personoj kiuj bone sed ne denaske regas la anglan apenaŭ komprenas tiun artefaritan anglan, sed la sintezan Esperanton oni facile komprenas. Mi multpli laboris pri la angla ol pri la Esperanta programo, dum la fabrikantoj de la uzata sintezilo (‘Votrax‘) kaj aliaj spertuloj taksas mian anglan inter la plej bonaj sintezoj per tiu aparato, kiu krome desegnatis ĝuste por la angla, tute ne por Esperanto. Kio okazas?

La angla havas dek du vokalojn, do distingetoj inter ili tre gravas kompare kun la larĝaj distancoj inter la kvin Esperantaj vokaloj. La angla emfazo kaj ritmo estas terure komplikaj kaj gravaj: maltrafo de tiuj aspektoj facile miskomprenigas. Sed en Esperanto estas tre simpla ritmo (mi elektas por ĉiu ne-emfazita vokalo la saman daŭron, kun 50-procenta plilongigo de emfazitaj vokaloj), kaj emfazo estas nur milda indiko de plusilaba vorto. Povas esti ankaŭ, ke la oftaj vokalaj finoj de Esperantaj vortoj helpas al la aŭdanto dispecigi la frazon en vortojn. Entute oni rajtas pro ĉi tiuj spertoj aserti, ke prononcaj eraretoj fare de sintezilo (aŭ de homo, supozeble) pli miskomprenigas la anglan ol Esperanton. Ĉio ĉi ankaŭ sugestas, kial studanto multpli facile akiras bonan prononcon en Esperanto ol en la angla (eĉ sendepende de la literumaj problemoj).

Estas vere, ke en laboratorioj oni jam sukcesis sintezi bonan anglan, eĉ uzante normalan anglan tekston. Sed tio postulas ege grandajn kaj komplikajn programojn, kun dispecigo de vorto en vorterojn, kun prononca vortarego, kaj sintakso trakto (ĉar multaj anglaj vortoj havas malsamajn prononcojn, depende de la sintaksa uzo en la frazo). Ke bonan Esperanton produktas simpla aparato kaj simpla, malgranda programo, estas spegulo de la simpleco de Esperanto por homoj.

Aliajn avantaĝojn havas Esperanto por sintezo. Preskaŭ ĉiam la unusilabaj vortoj estas nur gramatikaĵoj (kiel ankaŭ en la hispana kaj itala), do ne emfazitaj, sed en la angla (kaj la rusa), unusilabaj vortoj ofte estas gravaj.

Kiun silabon oni emfazu estas perpleksa demando ĉe la angla kaj la rusa (la regulo por la hispana estas iomete komplika, sed senescepta, kaj la itala mezas inter Esperanto kaj la rusa tiurilate). Demandoj kun falanta intonacio (‘Kiam vi iros?‘) facile distingatas de tiuj altiĝantaj, kun respondo jes/ne (‘Ĉu vi iros?‘), pro la ’ĉu’. Mi ankoraŭ ne provis, sed la gramatikaj finaĵoj de Esperanto, pro siaj indikoj de sintakso, ebligus facilan frazoritman plibonigon de jam sufiĉe bona sintezo.

Oni juste laŭdas la bonan literumadon de la hispana kiu estas frukto de tre longa strebado fare de la Hispana Akademio. Tamen notindas, ke nur

tri literoj ne bezonas specialan trakton (j, t, y). Ĉiuj aliaj havas kuntekstajn regulojn. Ekzemple, la litero c prononcatas k, s, aŭ, ĉ, depende de la sekva litero, kaj estas iom komplikaj 'alproksimigaj' reguloj por multaj sonoj. La reguloj estas senesceptaj, do programo povas sekvi ilin fidinde, sed oni vidas, ke eĉ la hispana bezonas konsiderinde pli komplikan trakton ol Esperanto (ankaŭ por homa lernanto).

En la bona spirito de Fischer, kiu malkonsilis troigon de la bonecoj de Esperanto, mi malkaŝu, ke la avantaĝoj de la larĝe distancaj vokaloj parte mankas ĉe la Esperantaj konsonantoj, kaj tion oni facile rimarkas ĉe neperfekta sintezilo. La sonoj c, s, ŝ, z, ĉ, ĵ, kaj ĝ tro ete distingatas unu de la alia: prononcaj eraretoj detruas tiujn diferencetojn (por azianoj estas problemo ĉe i/r, kaj por ĉinoj inter p/b, t/d, k/g). Estas ankaŭ problemoj ĉe iuj konsonantaj sinsekvoj, kiel sc-, str-, aŭ kv-. Ni ne rajtas aserti, ke Esperanta prononcado estas ideale facila por ĉiuj. Oni povas bone argumenti, ke la prononce tro vasta konsonanta sistemo necesas por reprezenti vortojn pruntitajn el multaj lingvoj (kaj eĉ la tre 'moderna' artefarita lingvaĵo Loglan enhavas la samajn sonojn). Pli radikale tamen oni argumentus, ke provoj forigi la supersignojn estas mistrafaj banalaĵoj oni prefere forigu kelkajn konsonantajn sonojn entute, tiel ebligante uzon de malpli granda alfabeto! Bedaŭrinde tio verŝajne ne eblas ne nur pro respekto pri netuŝebleco sed pro la interplektitaj rilatoj inter la ekzistantaj radikoj. Oni ankaŭ agnosku, ke eĉ se Esperanto ne havas ideale simplan prononcon, la sonsistemo notinde pli simplas ol tiuj de la plejparto de la naciaj lingvoj, kaj nur iom da atento kutime sufiĉas por instrui adekvatan prononcadon.

(Kontakto, revuo de TEJO, n-ro 69 N-ro 1/1981), p. 18

★

Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko 1982
Ĉeské Budĵovice 1982-08-13/15

Deklaro de la partoprenantoj

La 72 partoprenantoj, devenantaj el 8 landoj, de la Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko en Ĉeské Budĵovice aŭskultis prelegojn pri la ĉefa temo de la Seminario „Energio — la tutmonda problemo". En la prelegoj estis pritaksataj problemoj ligitaj al la produktado, racia kaj ŝpara uzado de la energio. La problemo „Energio" restos daŭre en la sfero de intereso de la esperantistaj fakuloj ankaŭ pro tio, ĉar Esperanto celas ŝpari al la homaro energion de la plej alta rango, energion de la homa cerbo, kiu estas nun — en la tempo de la konfuza multlingveco — tiel neracie disipata.

La partoprenantoj proponas:

— ke pro graveco de la problemo kreiĝu intensa internacia kunlaboro, plejeble en la formo de internacia laborgrupo por energio;
— ke la faka agado de UEA, SEC kaj ISAE unuiĝu por akceli uzon de Esperanto sur la scienca kaj teĥnika terenoj;
— ke la revuoj regule diskonigu informojn pri la entreprenataj agadoj, tiel ni evitos duoblan aŭ eĉ pluroblan laboron en la movado;
— ke la Scienc-Teknika Sekcio de ĈEA daŭrigu aranĝadon de la seminarioj dediĉitaj ĉiam al iu grava ĝenerala temo;
— ke UEA en la sfero de sia faka agado subtenadu la agadon de sciencaj kaj fakaj aplikoj de Esperanto ne nur morale, sed ankaŭ materie.

Ĉeské Budĵovice, la 15an de aŭgusto 1982

Raporto pri rezultoj de sociologia esploro de sintenoj al Esperanto, farita de Ĉeha Esperanto-Asocio[1])

Kiu lernas kial?

La sociologia esploro de sintenoj al Esperanto estis realigita en februaro 1981. Ni prezentas al vi kelkajn interesajn rezultojn de la esploro.

La esploro celis akiri informojn pri sintenoj de membroj kaj ankaŭ nemembroj de CEA al Esperanto kiel interkompreniga lingvo. Gi estis farita per enketa metodo, enketiloj estis dissenditaj perpoŝte. Ili estis koncizaj, enhavantaj nur 20 demandojn, por ke ilia longeco ne malinteresigu la respondontojn. Pro tio la esploro havis la karakteron de sondo pri la problemaro de sintenoj al Esperanto.

La tuta grupo de 2 200 demandiloj estis dividita en tri subgrupoj:

1. eksmembroj de ČEA 600 personoj
2. estantaj membroj de ČEA 600 personoj
3. komencantoj — nemembroj 1000 personoj.

La reveno de la enketiloj ĉe la unuopaj grupoj estis diferenca. Ce neniu grupo venis malpli ol 40 %, entute revenis 56,4 % de ĉiuj enketiloj.

1. Demografia karakterizo:

Koncerne la aĝon oni povas diri, ke pri Esperanto interesiĝas du grupoj, okulfrape diferencaj laŭ aĝo. Temas pri junaj homoj ĝis 25 jaroj kaj personoj pli aĝaj ol 55 jaroj. Tio signifas, ke ČEA havas multe malpli da mezaĝaj memebroj. Tiu ĉi stato povas esti kaŭzita aŭ de tio, ke mezaĝaj homoj, kiel en profesio tiel en la familio, estas pli okupitaj ol la homoj de aliaj aĝkategorioj. Tial ili malpli dediĉas sin al eksterlaboraj kaj eksterfamiliaj interesoj. Aŭ povas ĉi tie efiki la 18 jara interrompo de la ĉeha Esperanto-movado, t. e. en jaroj 1951—1969.

Ĉe unuopaj subgrupoj aperas ne gravaj diferencoj, sed entute la prezentita karakterizo validas por ĉiuj tri esploritaj subgrupoj.

Laŭ la vidpunkto de sekso estis konfirmite, ke ČEA havas multe pli da virinoj ol viroj t. e. 56,5 % da virinoj kaj 43,5 % da viroj.

La plejparto de la esploritaj personoj, preskaŭ duono, finis mezlernejon kun abiturienta ekzameno. Relative alta estas ankaŭ la nombro de metilernintoj (preskaŭ kvarono).

Inter la membroj de ČEA estas multaj seninfanaj personoj, pli ol 40 %. Estas malmulte da tiuj, kiuj havas pli ol du infanojn. El tio rezultiĝas, ke estas ĝusta la supozo, ke plurinfanaj familioj ne donas al la gepatroj tempon por dediĉi sin al hobioj. Koncerne la profesion de la demanditoj, la plej ofta estas la administracia laboranto, kio koincidas kun la akirita lerneja edukiteco. Inter la membroj estas ankaŭ multaj laboristoj kaj teknikistoj. En la subgrupoj n-roj 1 kaj 2 estas multnombre pensiuloj kaj en la 3-a subgrupo studentoj.

La divido de demanditoj laŭ la loĝloko montras, ĉu la esperantistoj loĝas pli en vilaĝoj aŭ en urboj. La respondantoj en la subgrupoj n-roj 1 kaj 2 estas ĉe e urbanoj, inter komencantoj superas la nombro de tiuj, kiuj loĝas en malgrandaj vilaĝoj, en kiuj loĝas maksimume 500 loĝantoj.

Proponiĝas la demando, ĉu ĉi-tiu fakto ne estas kaŭzita de klopodo de tiuj homoj ligi kontaktojn ekster la loĝloko, kie estas malmulte da ŝancoj de diversa agado.

2. Libera tempo:

Dum libera tempo ĉiuj tri subgrupoj dediĉas sin precipe al legado de libroj. Multaj plibeligas sian vivmedion, t. e. laboras en ĝardeno, aranĝas sian loĝejon k. t. p. En tio koincidas la subgrupoj n-roj 1 kaj 2. La 3a subgrupo notis ofte vizitadon de teatroj, koncertoj, ekspozicioj kaj dediĉas sin al diversaj hobioj. Tiu ĉi rezulto povas signifi, ke la membroj de Asocio havas multajn interesojn. La 3a subgrupo interesiĝas apud la legado de libroj kaj hobioj ankaŭ pri sporto, kio rezultiĝas el tio, ke temas pri relative junaj homoj.

La feriadon ĉiuj tri grupoj travivas sammaniere, t. e. enlanda kaj eksterlanda vojaĝadoj.

3. Sinteno al Esperanto:

Unu el celoj de la esploro estis ekkoni la opiniojn pri Esperanto ĉe ĉiuj tri subgrupoj. El la proponitaj respondoj la demanditoj plej ofte elektis jenajn:

— Esperanto estas la plej facila interkompreniga lingvo.
— La Esperanta movado helpas al interkomprenigo inter nacioj kaj subtenas porpacan strebadon.
— La scio de Esperanto ebligas kontaktojn kun eksterlando, eĉ sen scio de fremdlandaj lingvoj.

Diferenco estis nur emfazado de certaj variantoj ĉe unuopaj subgrupoj. La eksmembroj emfazas la facilecon de Esperanto kaj la eblon interkompreniĝi en la eksterlando sen scio de la lingvo de la koncerna lando. Estantaj membroj kon-

sideras la plej grava kvalito de Esperanto tion, ke ĝi helpas al interkompreniĝo inter nacioj kaj subtenas la pacmovadon. La facilecon de Esperanto kaj eblon interkompreniĝi en eksterlando ili metas nur je la duan lokon. La subgrupo n-ro 3 ne opinias Esperanton facila (facileco estas je la 4a loko), sed emfazas la eblecon de kontaktoj kun eksterlando sen scio de fremdaj lingvoj kaj interkompreniĝo inter nacioj (= 32 % de ĉiuj respondoj).

Respondante la demandon, ĉu la ĝenerala scio de Esperanto estus utila, ĉiuj tri subgrupoj konsentas preskaŭ unuanime. Nur 9 personoj respondis negative. Tamen nur 71 % de la estantaj membroj kaj nur 45 % de la eksmembroj kaj komencantoj skribis, ke ĝi estas „tre" utila.

4. Kaŭzo de la eksmembriĝo:

Unu el la ĉefaj celoj de la enketado estis ekscii la kaŭzojn de tio, kial multaj membroj ĉesigas sian membrecon en CEA. La demando estis prezentita sole al la subgrupo n-o 1, t. e. eksmembroj, kaj tekstis jene:

„Ĉu vi ankoraŭ nun memoras, pro kiu kaŭzo vi ĉesigis vian membrecon en CEA?"

1. Ĝi okupis multe da mia tempo	59 resp.	24,2 %
2. Ĝi ne donis al mi sufiĉan kontentigon	29 resp.	11,9 %
3. Parencoj, amikoj, konatoj detenis min de tio	6 resp.	2,5 %
4. Mi havis alian hobion	36 resp.	14,8 %
5. Io alia, kio?	114 resp.	46,7 %

Unuavide surprizas granda nombro de respondoj numero 5 (io alia). Do evidentiĝas, ke la kaŭzo de eksmembrigo estas nek perdo de intereso, nek manko da tempo, sed io alia. La kaŭzoj estis preskaŭ ĉiam personaj, ekzemple: pro malsano, pro alta aĝo, pro laboraj kaŭzoj, geedziĝo, translokiĝo k. t. p. Pli precizan respondon alportos detala analizo de la respondoj.

Estas taŭge mencii ankaŭ, kiel esperantistoj mem taksas, kion donas al ili Esperanto.

Plej oftaj respondoj estis:

— Esperanto peras al mi kontakton kun eksterlando.
— Esperanto estas por mi amuzajo.

Ĉi tiu demando estis pro kompreneblaj kaŭzoj prezentita nur al la subgrupoj n-roj 1 kaj 2. La eksmembroj skribis, ke Esperanto estas por ili amuzaĵo. Kaj la estantaj membroj emfazas, ke Esperanto peras por ili kontakton kun eksterlando.

---

1) Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto. Ceha Esperanto-Asocio (Jilská 10, 110 00 Praha), Praha 1981, 58 p.

Bernard Golden

VOLAPUKO - LA INTERNACIA LINGVO, KIU NE VOLAS MORTI

En 1979 kelkaj ĝisvivintaj adeptoj de Volapuko, kiuj ankoraŭ uzas kaj propagandas tiun lingvon, solenis la centjaran jubileon de ĝia naskiĝo. Volapuko estis la unua sukcesa internacia lingvo tutmonde uzata, kaj la historio de ĝia movado komenciĝis preskaŭ unu jardekon antaŭ tiu de Esperanto. Okaze de la datreveno, estas konvene reliefigi kelkajn rilatojn inter Volapuko kaj Esperanto, ĉar dum mallonga tempo ambaŭ kunekzistis kiel rivalaj internaciaj lingvoj.

En la 1870-aj jaroj du homoj komencis dediĉi sin al la kreo de internacia lingvo. Unu estis Johann Martin Schleyer, mezaĝa romkatolika pastro oficanta diversloke en Badenio, Germanio; la alia estis Ludoviko Zamenhof, adoleska gimnaziano en Varsovio. La unua kreaĵo de la badenia kleriko, kiu celis faciligi homan interkomunikiĝon, estis universala alfabeto publikigita en 1878. Samjare, Ludoviko, nur 19-jara, debutigis la unuan formon de Esperanto, kiun li nomis *Lingwe Universala* La 31-an de marto en la sekva jaro Patro Schleyer ricevis revalacion instigantan lin krei planlingvon. Li tuj eklaboris kaj post unu monato publikigis

magazinajn artikolojn enhavantajn skizon de la strukturo kaj leksiko de la lingvo, kiu poste ricevis la nomon *Volapük* (mondlingvo). En 1879 Zamenhof devis interrompi laboron super sia lingvoprojekto por entrepreni medicinajn studojn en Moskvo. Li povis reiri al sia laboro nur en 1881, kiam li denove estis en Varsovio. Intertempe, Schleyer, kun rimarkinda rapideco, finpretigis sian lingvon kaj komencis eldoni publikigaĵojn.

La unua gramatiko de Volapuko estis eldonita en 1880, kaj en la sekva jaro aperis la unua vortaro; ambaŭ verkoj estis destinitaj al germaneparolantoj. Dume, Zamenhof, unue kiel universitatano en Varsovio, poste kiel kuracisto praktikanta diversloke ekster Varsovio, radikale refaris sian unuan lingvan projekton, ĉar la originalaj dokumentoj de *Lingwe Universala* estis detruitaj de la patro Marko Zamenhof dum la restado de lia filo en la rusa ĉefurbo. Kiam Zamenhof eksciis pri Volapuko, antaŭ ol lia propra lingvo estis finita, li skribis, ke li estas preta forlasi sian projekton kaj akcepti tiun de Schleyer, se ĝi povus funkcii kiel internacia lingvo. Sed post profunda analizo de Volapuko, li tiris la konkludon, ke Volapuko havas tro da malfacilaĵoj por ebligi facilan lernadon kaj uzadon. Tiun opinion li esprimis en longa traktaĵo titolita „Esperanto kaj Volapük", publikigita en 1889 kaj 1890 en *La Esperantisto*. Tiu plurparta artikolo neniam estis finita, ĉar jam en tiuj jaroj estis evidente, ke la volapuka movado, atinginte sian apogeon en 1889, komencis disfali kaj ne minacos Esperanton.

Tamen, ne ĉio, kio rilatas al la volapuka movado kaj lingvo estas negativa. Ĝia maldaŭra sukceso estis nur relativa. Dum unuflanke ĝi estis tute eklipsita de Esperanto, kiu rapide gajnis la teritorion perditan de la ŝlejera lingvo, aliflanke komparo de la atingoj de la volapukistoj kun tiuj de adeptoj de aliaj planlingvoj rivelas surprizajn faktojn. Ekzemple, Volapuko dum nur *unu* jardeko pli rapide disvastiĝis tra la mondo, estis instruata kaj uzata pli grandskale, kaj havis pli da publikigaĵoj ol la laŭte distrompita *Interlingua* (IALA) post *tri* jardekoj da sencela vegetado.

La vera kialo de la dekadenco de Volapuko ne estis la konkuro de Esperanto kiel rivalo, sed la skisma batalo ene de la Volapuka movado inter progresemaj volapukistoj kaj Schleyer. La lingvo ne povis rezisti la senĉesan reformadon de la sekvaj jardekoj spite al la aŭtoro de la lingvo, kiu ne permesis al sia lingvo evolui nature. La Akademio de Volapuko transformiĝis por fariĝi la Akademio de aliaj lingvoprojektoj: unue *Idiom Neutral*, poste *Latino sine flexione*. Tamen, kiam Schleyer mortis en 1912, ne ĉiuj apogantoj de lia movado sekvis lin en la tombon. Dum la 1920-aj jaroj en Svislando Jakob Sprenger, eks-sekretario de Schleyer en Konstanco, provis teni Volapukon viva, ĉefe per eldonado de la gazeto *Nüniel*. „Informilo". En 1931 d-ro Arie de Jong, nederlanda kuracisto, publikigis gramatikon kaj vortaron de sia reformita Volapuko. Ekde tiu tempo d-ro de Jong kune kun siaj sekvantoj gvidis la renaskitan volapukan movadon, kiu ankoraŭ ekzistas hodiaŭ. Laŭ mia enketo, oni povas nombri la adeptojn per la fingroj de ambaŭ manoj. Ili montris pli da aktiveco en 1979 por festi la jarcentan datrevenon de la kreo de sia lingvo. Ili deziris ankaŭ atentigi la publikon pri la kontribuaĵo de J. M. Schleyer al la internacilingva movado. Se ilia propagandado vekos sufiĉe da interesiĝo, kaj se unu el la relative junaj volapukistoj atingos sian celon — roli kiel ĉenero inter la volapukistoj de la pasinteco kaj tiuj de la estonteco — Volapuko ne estos forgesita, nek en 1987, kiam la esperantistoj celebros la centjaran feston de sia lingvo, nek en la jaro 2 000, kiam la plej lastaj adeptoj portos la torĉon trans la jarcentsojlon, kantante *„menad bal pük bal"* („unu homaro unu lingvo"). Dum ankoraŭ restas sentimentalaj kaj emociaj ligiloj inter la lingvo kaj ĝiaj adeptoj, Volapuko ne formalaperos.

IFER '82 - strec̆a kaj multflanka

La Internacia Foiro Esperantista Renkontiĝo okazis ĉijare inter 12a kaj 14a de marto 1982 en Leipzig sub la ĉeftemo:

Goethe — Faust — Leipzig.

Estis anoncitaj 140 personoj el ok landoj kaj el GDR (el ili 3 de Aŭstrio, 98 el ČSSR, 1 el Francio, 3 el FRG 84 el GDR, 16 el Hungario, 1 el Irako, 2 el Pollando, 1 el Svedio). Nur malmultaj anoncitoj ne aperis, sed anstataŭe kaj aldone, kelkaj aliaj venis, precipe kiel partoprenantoj de nur seminarioj kaj fakaj kunvenoj. Sekve ni povas taksi entute 150 partoprenintojn, el ili unu triono el la eksterlandoj. Renkontejo de IFER '82 estis la Klubo de la Intelektularo de Kulturligo de GDR, bone taŭga kaj por grandaj vesperoj kaj por paralelaj seminarioj.

Paralele al la programeroj, preskaŭ ĉiam malfermita kaj forte frekventita estis la librobazaro por multspecaj novaĵoj kaj oldaĵoj. Kompreneble ne mankis filatelaj tutaĵoj, porokaza poŝtstampo k. t. p. Jam dum la sinanonco en akceptejo kiel unua programero startis la gvido en la grandiozan novan koncertejon „Neues Gewandhaus", plena da belaĵoj. Ĉiĉeronis M. Behr.

Post vespermanĝo, la 12an de marto je la 19a horo okazis la solena malfermo de IFER '82 far grupeto de pioniroj sub la gvido de H. Birnbaum kaj fare de la parolistino Wera Dehler. Sekvis la afablaj salutvortoj de kulturligaj instancoj kaj de la eksterlandaj reprezentantoj. Dum tiu interkonatiĝa vespero, la diversaj programeroj alternis kun muziko, interparoloj kaj dancado. Gaja kaj aplaŭdita skeĉo de Leipzig-a klubo „Kontakto" alportis bonan humoron. Kiel surprizon, la geedzoj Hirsch el FRG montris belajn diapozitivojn el la kongresa urbego Brasilia. Tombolo favora al la solidareco, dum kiu multaj pagintoj gajnis la premiojn donacitajn de Leipzig-aj esperantistoj, alportis la porsolidarecan sumon de 300 GDR-markoj. La posta dancemo de la publiko pruvis, ke la interkonatiĝo estis sukcesinta.

La sabato, 13a de marto, estis strec̆a, sed enhavriĉa tago. Neplanita, sed despli interesa, estis la filmo de s-ro Hirsch pri la lasta UEA-kongreso, 1981 en Brazilio. Kiel unua preleginto inĝ. Jan Werner (CSSR) donis tre valoran superrigardon pri neceso kaj enhavo de „Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo". La multaj postaj privataj diskutoj kun li montris la aktualecon de la temo. Sekvis du paralelaj prelegoj por diversaj interesoj. D-ro Schüler (GDR) parolis pri „Reciprokaj aplikoj de komputado kaj Esperanto" kaj vekis diskuton. D-ro Rusin (ČSSR) prelegis pri „Socialaj aspektoj de ekologia problemo" laŭ ekzemplo el sia hejmlando.

La sabata posttagmezo estis dediĉita al la ĉeftemo kaj konsistis el tri vere altnivelaj partoj.

Sub la temo „Kion vi ankoraŭ ne sciis pri la tragedio Faust de Goethe?", kvin geesperantistoj el Leipzig (S. Fiedler, D. Pfeifer, d-ro R. Fiedler, J. Hamann, A. Hoenigk) celebris prelegon kun recititaj ŝlosilscenoj. Kulmino de tiu 70-minuta prezentado (kompilita de M. Behr) estis la du Kantoj de Margareta far la artstudentino Dorothea Pfeifer, Leipzig, kiu unuafoje kaj grandsukcese kantis en Esperanto. Ŝi ŝajnas talento nepre flegenda. Laŭenhave tiu programparto fare de Leipzig-aj esperantistoj formis la esencan punkton de IFER. D-ro Schulze (GDR) pruvis per sia prelego „La aventuro de Faust-traduko", ke li ne nur sukcesis traduki tiun, laŭ amplekso kaj komplikeco gigantan verkaĵon de Goethe. En la prelego li eĉ majstre resumis siajn spertojn dum tiu traduko kaj ĝeneraligis ilin. Tiu altvalorac̆o aperos en la GDR-numero de Paco 1982.

D-rino Erfurth (GDR) prelegis pri „Faust-similaj figuroj de la mondliteraturo". Ŝi kondukis la aŭskultantojn al aŭtoroj kaj verkaĵoj, grandparte nekonataj al la nefakuloj, sed interesegaj laŭ la aspektoj de la pluevoluigo aŭ inverso de Goethe kaj ties Faust (ekz. H. Heine, H. de Balzac, Lunaĉarski (!), H. Eisler). Kiel literatursciencistino ŝi sentigis al ni, ke la bazaj pensoj ĉirkaŭ Faust-figuroj apartenas ankaŭ al la futuro de la homaro. Treege interesa estis la aldona diskuto far d-ro Jáki (Hungario) pri la hungara majstroverkaĵo „La tragedio de l'homo" de Madach, laŭ la traduko de K. Kalocsay (kp. KEI 2/82). Paralele al tiuj prelegoj, la estraro de Medicina Fakrondo kunsidis kaj decidis pri novaj farendaĵoj.

La kulturprogramo sabate vespere komenciĝis (post salutvortoj de nia gasto el Irako, s-ro Al-Amily) per koncerteto de virkoruso „Terra-Schuh" el Roßwein, kiu unue prezentis kvar kantojn laŭ diversaj tekstoj de Goethe, kaj due kantis du himnojn pri la necesegaj temoj „paco" kaj „libereco", kiuj ankaŭ grandioze estas formulitaj en la fina monologo de Faust. La koruso ĝojigis nin per freŝeco kaj esprimriĉo.

La dua parto de la kultura programo montris la tempon de Goethe de tute alia flanko. Temas pri la informigo de la tiamaj simplaj homoj pri aktualaĵoj per popol-kantistoj kaj -artistoj. Kaj jus tian unuecon de komikaj baladeskaj kantoj

kaj aktorado prezentis Eva Seemanova kaj la geedzoj Budinski el Prago en brila maniero. Per plena kaj longa aplaŭdo dankis la publiko por tia gaja kaj majstra fino de la kultura programo (kaj por la transdonitaj tekstoj!).
La lasta tago alportis samtempe traurban ĉiĉeronadon far I. Kolbe kaj G. Böttcher, kaj la fakajn kunvenojn de Fervojista, Komputista kaj Poŝtista Fakrondoj. Tagmeze okazis la oficiala adiaŭo per dankvortoj, enketeto pri IFER '82, ŝerc-premioj kaj anonco de IFER '83, kiu okazos 1983/03/11—13 sub la temo ligota al G. Dimitrov. La menciita enketo montris, ke el la partoprenantaro, unu kvardekono estis nekontenta, du trionoj estis kontentaj kaj unu triono estis tre kontenta pri IFER '82. Krome el ĝi sekvas, ke la duono deziras pli multe da tempo por societemo kaj por kulturprogramoj; kaj ke la plimulto deziras kiel novan ĉeftemon — historian (!).
Du tagojn post IFER '82 aperis en Leipzig-a Popolgazeto konciza, 31-linia, sed tonege formulita raporto pri IFER.
Gratulon kaj dankon al la Organiza Komitato, kaj precipe al ties ĉefo, Rolf Beau, por la eksterordinare bona laboro! MB

Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj Budapeŝto, 1982. 19.—28. 3.

La Esperanta Kulturo havis gravan feston inter la 19a kaj 28a de marto 1982 en Budapeŝto: enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo okazis Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj kun entute dek du teatraj prezentadoj fare de aktoroj el kvar landoj: Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetio.
Tiun ĉi Renkontiĝon fakte iniciatis kaj financis Hungarlanda Turisma Oficejo, konforme al la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo, okazinta antaŭ tri jaroj en Manilo. Ci-sube vidu kronikon de tiuj dek tagoj:
Unua tago: „Profeta premiero"
La 19an de marto je la sepa horo vespere estis plenplena la Budapeŝta Teatro „Miklós Radnóti". Esperantistoj plenigis ĝin, por ĉeesti la premieron de la teatrajo „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto" de János Elem. (La teatrajo aperis ankaŭ libroforme, en dulingva — hungara-Esperanta-eldono. Gi mendeblas ĉe ĉiuj libroservoj.)
Tiu prezentado de „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?" estis vera premiero, ja ĝi verkiĝis en la hungara lingvo, tamen ĝi ne aperis ankoraŭ sur hungaraj scenejoj: ĝi surscenigis la unuan fojon nun — en Esperanto. Gi ĉerpas sian temon el la medio turismo kaj interkompreniĝo. Jen koncize la intrigo: Fantazia turisma entrepreno organizas ekskurson al dezerto, kaj kontraŭ alta pago ĝi disponigas al la partoprenantoj „kompletan turisman malkomplekseon", t. e. oni lasas ilin por du semajnoj meze de la dezerto, kun nutrajoj kaj tendoj, sen ia ajn programo. La ĉiĉerono, kiu cetere ne komprenas nur parolas (!) la lingvon de la turistoj, adiaŭas ilin jene: „Se plaĉos al vi, proklamu vin reĝoj, boru tunelon tra la dezerto seksperfortu, eĉ amu unu la alian, buĉu vin mem kaj viajn gekunulojn, kreu novan ŝtatoformon, blasfemu, ignoru la aliajn aŭ provu komprenigi vin al ili . . ." El tiu situacio kompreneble kreiĝas kaj konfliktoj kaj amuzaj scenoj, sed ne mankas ankaŭ lanĉo de filozofiaj demandoj, ekzemple: „Kion oni faru, estante libera?" La rolojn de diversaj turistaj tipoj plenumis elstaraj hungaraj aktoroj.
Dua tago: „Ĉu Dio bojas?"
„La Krizalido", Teatro Internacia de Akvitanio prezentis tiun ĉi pensigan teatrajon de la franca dramisto Boyer. En la teatrajo temas pri kretenino, kiu en la bojado de hundoj supozas aŭdi Dian averton pri tertremo. La aŭtoritatoj sendas sian solan oficiston, kiu en unu persono estas policisto, juĝisto kaj preĝisto (pastro), por ke li silentigu la knabinon, kies delirajoj povus kaŭzi panikon ĉe la logantaro. Sed venkas ne li, la sendito de la socio, sed ŝi, en kiu ankoraŭ ne subpremiĝis la naturaj ecoj.
Tria tago: „In memoriam Kálmán Kalocsay"
Tiu ĉi literatura-muzika podia programo okazis en la Sukerajejo Korona, tradicia ejo de altkvalitaj literaturaj vesperoj en la hungara kaj aliaj lingvoj. La „dommastrino" de la vespero estis aktorino Lilla Mikes.
Aparte altkvalita estis la muzika programo: krom kantoj, tradukitaj de Kalocsay, estis prezentita ankaŭ komponajo de la granda versmajstro: ĝin li verkis por la poemo „Maud" de Tennyson.
Kvara tago: sovetianoj kaj polino
En la kvara vespero Jadwiga Gibczynska el Pollando prezentis „Slavajn fabelojn" de Lesmian, tre emocie, kun riĉa artista arsenalo. Du aktoroj de Leningrada Esperanto-Teatro prezentis podian koncizigon de la Ŝekspira „Hamleto" en formo kuraĝe eksperimenta kaj impresa.
Kvina tago: „Zamenhof" kaj ripeto
La 23an de marto Jadwiga Gibczynska prezentis — premiere — sian monodramon „Zamenhof". Ŝi bildigis por la publiko la luktoplenan vivon de la aŭtoro de Esperanto per la vivigo de tri virinoj, tre proksimaj al li: la patrino, edzino kaj filino.

Sesa tago: „Profeto“ ripetiĝas
Ankaŭ ĉe la dua prezento de „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?“ la spektejo estis plenplena. Sed ĉifoje ĝin plenigis ne nur esperantistoj, teatraj fakuloj kaj jurnalistoj, sed ĉeestis ankaŭ ĉ. 40membra grupo de diversnaciaj turismaj fakuloj, inter ili pluraj altrangaj funkciuloj de Monda Turisma Organizo (WTO). Dum tiu prezentado funkciis por la elitaj gastoj sinkrona peraŭdila interpretado de la teatrajo en la anglan kaj francan.

Sepa tago: Triumfo de artismo
La teatrajo de B. Vasilev: „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj“ antaŭ ĉ. 10 jaroj furoris en multaj teatroj de Eŭropo. Spektintoj de ĉiuj signifaj prezentadoj firme asertas, ke la Budapeŝta prezentado estis unu el la plej bonaj. Ĝi estis ludita ĉ. 300-foje. Kaj nun la sama teamo de geaktoroj kaj reĝisoro revivigis tiun prezentadon de antaŭ ok jaroj. Sed pri kio temas la teatrajo mem? (Fragmento el ĝi aperis en Hungara Vivo n-ro 1/1982.) Dum la dua mondmilito ie malantaŭ la fronto, en la soveta landinterno ĉefserĝento Vaskov — vundita esploristo — komandas kelk-kapan gardistaron de ne tre grava militbazo. Ĉar mankas bataltaskoj, la soldatoj perdas disciplinon, drinkas, ĉasas virinojn. Vaskov daŭre petas de sia ĉefo soldatojn, kiuj ne drinkas kaj virinumas, ĝis fine tiu sendas al li kvin soldatinojn, kaj post kelkaj tagoj eĉ sesan, eksamatinon de iu kolonelo. La ursa ĉefserĝento ne scias kiel rilati al la virinoj, kaj el tio kreiĝas pluraj amuzaj scenoj. La leĝeran etoson tamen de tempo al tempo rompas la soldatinoj kaj ankaŭ la ĉefserĝento mem: klariĝas, ke ili ĉiuj havas animajn vundojn. La tragedio disvolviĝas el hazarda malkovro: Rita, kiu ĉiunokte elŝteliĝas el la bazo por viziti sian fileton en la najbara vilaĝo, en la arbaro renkontas du germanajn soldatojn. Ŝi raportas al Vaskov, kiu decidas kapti la du malamikajn soldatojn. Sed poste, jam malfrue, evidentiĝas, ke estas ne du, sed dek ses germanaj soldatoj, kaj ĉiuj kvin knabinoj mortas. La reĝisoro, István Iglódi, faris bravajon: sur malgranda scenejo li kapablis sorĉi marĉon, arbaron aŭ militbazon, sen rekvizitoj kaj dekoracioj. La sola rekvizito estis grandega reto, kiu en ĉiu momento servis pli efike la draman efekton, ol du kubaj metroj de perfektaj armeajoj.

Sceno el „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?“. De maldekstre: Denise **Kárpáti** (Kristina), Levente **Moravetz** (Adamo), Csilla **Herceg** (Jeva), Kálmán **Szabó** (Ernestro). Foto de Z. Fejér

Oka tago: „La Evento“
La dua prezentado de „La Krizalido“ estis Esperanta premiero, de „La Evento“ de la franca dramisto Foissy. La amuzaj scenoj, rezultantaj el paneo de televid-aparato, daŭre ridigis la spektantojn, tamen ankaŭ pripensigante ilin pri la osceda piteco de la vivo de geedzoj Pito. La elekto de tiu teatrajo estis plentrafo de Solen kaj Arno Lagrange.

Naŭa tago: „Amatoraj trupoj
Posttagmeze en la Kulturdomo „Lang“ la amatora Teatra Trupo „Garabonciás“ el la hungara urbo Kecskemét prezentis la verkon de Béla Balázs: „La kastelo de la blubarba princo“, tradukitan de Márton Fejes.
La Teatra Trupo „Gorgó“ el Budapeŝto prezentis la erotikan komedieton „La naskiĝo de la relikvo“ de Pietro Bambi.
Vespere en la Teatro „Miklós Radnóti“ trian fojon oni ludis la „Profeton“. La sukceso ripetiĝis.

Deka tago: Sukcesoj
Posttagmeze rikoltis merititan sukceson la internacia konata esperantista pupartisto per sia „Pup-cirko“. La lerte kunmetita kaj majstre prezentita programo katenis ĉies atenton, eĉ tiun de komencantoj, ĉar la lingvajo de la spektaklo estis rimarkinde facila.
La nur 20-minuta „Li trosalis“ de Cehov en la plenumo de Oleg Popov kaj Raŝid Hajrullin (Leningrada Esperanto-Teatro) estis majstra perado de karakterize rusa humoro al internacia publiko. Vespere ripetiĝis „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj“.

Finaj diversajoj
Fine de tiu ĉi iom tre longa kroniko staru citajo el luksa kajero ‚kiun eldonis Hungarlanda Turisma Oficejo pri la Budapeŝta Printempa Festivalo '83: „Kompreneble ni ripetos venontjare la plej sukcesajn aranĝojn, kiel la Internacian Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj . . .“
Estas notinde, ke ĉiuj programeroj de la Renkontiĝo estis registritaj sur magnetofon-kasetoj. „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?“ kaj „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj“ estis registritaj ankaŭ sur video-kasetoj nigre-blankaj. Do, la vortoj kaj bildoj ne forflugis, sed konserviĝis por la estonto . . .

(Laŭ materialo ricevita de HEA)

34a IFEF-kongreso en Balatonfüred

La 34a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazis de la 2a ĝis la 8a de majo 1982 en la konata hungara banloko Balatonfüred sub la aŭspicioj de ĉefdirektoro de MÁV (Hungaraj Ŝtatfervojoj), Zoltan Szúcs. Partoprenis 605 fervojistoj el 22 landoj, inter ili 13 gekolegoj el GDR. La fervojista fakgrupo de nia Esperanto-Asocio estis tiamaniere nombre relative forte reprezentita.

Jam la situo de la konferencloko apud Balatono, kiu sin prezentis en printempa beleco, promesis kaj agrablajn kaj fakinteresajn tagojn dum la kongreso, kaj oni povas vere diri, la kongresanoj hejmenveturis tute certe ne senluziigitaj.

Kio estis la ĉefa faka enhavo de la fervojista kongreso? Tipaj fakaj aranĝoj estis ekz. la laboro de la diversaj komisionoj: speciale de la terminara, fakprelega kun sciindaj informoj pri fervojaj novaĵoj kaj la historia.

La lerta traktado, karakterizita de fakesprimoj de alta lingva kaj faka scioj, estis por niaj reprezentantoj ne nur interesa, sed donis samtempe la eblecon mem kontribui al la sukcesa laboro. La ĉefprelego de la kongreso, prezentita de la prezidanto de LKK, traktis la tre aktualan temon „La estonto de la eŭropaj fervojoj kaj la rolo de la hungaraj ŝtatfervojoj". Poste oni prezentis kolorajn diapozitivojn pri la fervojo el diversaj historiaj kaj estontaj vidpunktoj.

Ne taksebla, sed ege valora estis memkompreneble la ofta spertinterŝanĝo kun alifervojaj gekolegoj pri fakaj kaj asociaj demandoj.

Krom la fakaj kunsidoj, prelegoj kaj disputoj distingiĝis la kongreso per abunda kultura, amuza kaj turisma programo, ekzemple

- altnivela muzikprezentado de fervojista orkestro
- uniformparado de partoprenintaj diverslandaj fervojistoj, inter ili unu kolego de DR
- granda filatelista ekspozicio pri la temo „La historio kaj evoluo de fervojo kaj disvastiĝo de Esperanto en la mondo"
- temperamentplenaj dancaranĝoj kaj festaj kongresbaloj
- vespera ŝipveturado sur Balatono
- ekskursoj al Tihany-duoninsulo, Veszprem-Herend kaj al Badacsony - Keszthely - Heviz.

Krome funkciis radioamatora stacio kaj estis eldonita speciala poŝtstampo kaj poŝtkarto pri la 34a IFEF-kongreso.

La socian rekonon de la (fervojista) Esperanto-movado montriĝis inter alie per tio, ke

- (kiel jam menciite) la ĝenerala direktoro de MAV akceptis esti Alta Protektanto de la kongreso kaj ĉeestis ties anstataŭanto
- partoprenis oficiale sindikatoj, urbaj kaj aliaj sociaj reprezentantoj (ne nur dum la inaŭguro, en kiu cetere la kongreson salutis Achim Meinel por la Faksekcio de la fervojistoj ĉe GDREA
- la urbestro de Balatonfüred akceptis la IFEF-estraron kaj la prezidantojn de landaj asocioj
- la veturo inter Budapeŝto kaj Balatonfüred kaj reen okaze de la alveturo/forveturo de la kongresanoj okazis senpage per speciala trajno.

Finfine restas nur la agrabla devo danki al la hungaraj gekolegoj, precipe al la laborema LKK, por la travivriĉaj, sukcesplenaj kongrestagoj kaj por la agrabla restado en belega Balatonfüred mem.

Achim Meinel

Fakgrupo komputistoj

Ekde 3a de oktobro 1981 ekzistas Fakgrupo de Komputistoj en GDR, ĝis nun konsistanta el 13 membroj. La plej gravaj taskoj de la Fakgrupo de Komputistoj estas:

- Spertinterŝanĝo kun esperantistaj samfakuloj eksterlandaj
- Studado de la esperantlingva fakliteraturo
- Terminologia laboro (precipe laboro pri Slipara Vortaro)
- Preparo kaj partopreno en internaciaj fakaranĝoj.

La Fakgrupo serĉas pluajn kunlaborantojn. Benvolu skribi al la gvidanto: M. Behr. 7113 Markkleeberg, Koburger Straße 83.

Laborulprotektado

Estas ellaborata fakvortlisto pri protektado de laboruloj kontraŭ malsanoj kaj akcidentoj. La iniciatinto de la vortaro, inĝeniero pri maŝintekniko kaj pri laborulprotektado serĉas nun kunlaborantojn, kiuj povas helpi en la kontrolado de la vortaro. Interesiĝantoj bv. skribi al: Inĝ. Helmut Hofmann, DDR - 8800 Zittau, Carpzovstr. 9 c.

Meteorita katalogo

„Katalogo de 230 meteoritaj krateroj" en Esperanto estas havebla kontraŭ 10 markoj ĉe la aŭtoro J. Classen, Sternwarte Pulsnitz, 8514 Pulsnitz.

Medicinistoj aranĝis sian III-an

En la kvara jaro de sia ekzisto la Medicina Fakrondo de GDREA Ĉifojeĝ okazigis sian IIIan konferencon en Potsdam. Neniu loko povis pli konveni ol la historia kastelo Cecilienhof. Estis 55 esperantistoj-fakuloj, kiuj samcele kunestis de 26a ĝis 28a de februaro 1982. Jam ĵaŭde vespere la partoprenintoj povis ĝui interesan lumbildprelegon de d-ro Ferenczy pri Brazilio. La alta takso de la aranĝo esprimiĝis per la ĉeesto de d-ro Heinz Rupp, unua kulturliga sekretario de la distrikto Potsdam, kaj de d-ro Detlev Blanke, sekretario de CE de GDREA.

Korajn kolegajn salutojn transdonis en la nomo de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) d-ro Imre Ferenczy. Kaj en la nomo de niaj samprofesiaj rondoj en eksterlando salutis Katalin Faragó (HEA), d-ro Stefano Grenda (AESSR), d-ro Josef Hradil (ČEA) kaj prof. d-ro Kirill Popov (BEA). Samĝoje estis akceptitaj la leteraj salutoj de d-ro S. Yamazoe el Japanio, ĝenerala sekretario de UMEA, de d-ro Marian Laba, prezidanto de Medicina Sekcio de PEA kaj de nia vicprezidanto Helmer Koch, nuntempe laborante en Mongolio. Kiel reprezentantoj de alifakaj rondoj de GDREA partoprenis la ligoamikoj Rolf Beau, Michael Behr, d-ro Erich-Dieter Krause, Achim Meinel kaj Horst Theurich.

Estis kvazaŭ ne plenumebla intenco de la organizintoj sukcesigi la iom tro ampleksan programon. Ke tamen dum la labortago sukcesis kaj la prelega, la terminologia kaj la organiza partoj, estas merito de la laŭdinde disciplina kaj interesoplena konferencanaro. Dum la labortaga antaŭtagmezo, vendrede, 13 gekolegoj medicinistoj, fakrondanoj kaj eksterlandaj gastoj prezentis siajn prelegojn. Sekvis diskuto. Pleje kaptis pluraj prelegoj kun precipe scivoligaj temoj, ekzemple la kontribuoj de d-ro Klaus Bochmann pri „Manipula terapio, akupunkturo kaj neuralterapio“ kaj de d-ro Hans Eichhorn pri psikoterapia-medicina temo.

Ni ne denove celis pruvi, ke Esperanto perfekte taŭgas por uzadi ĝin en scienca medio. Sed ne pretervideblis: Tiuj ĉi raportoj kaj diskutoj estus povintaj forte impresi neinformitajn indiferentulojn.

Unuafoje oni dediĉis tutan konferencan parton al la faka terminologio, kiun inaŭguris Wera Dehler per enkondukaj konsideroj pri terminologio, donis informojn pri Terminologia Sekcio de SEC en Budapest kaj prezentis ses tezojn pri terminologio.

D-ro Josef Hradil kaj Katalin Faragó konatigis siajn pensojn pri la estonta vojo kiel daŭrigi la fakterminologian laboron. D-ro Giso Brosche kontribuis per siaj spertoj krei proponindajn veterinarajn terminojn. La eksplikojn de d-ro Erich-Dieter Krause oni sekvis kun granda atento, ĉar la valoraj instruaj konsideroj tre gravas por nia terminologia agado.

Pri siaj spertoj kaj intencoj raportis la ligoamikoj Michael Behr (komputistoj), Achim Meinel kaj Horst Theurich (fervojistoj) kaj Jürgen Hamann (poŝtistoj).

Antaŭ la baloto pri nova estraro de la Medicina Fakrondo d-ro Giso Brosche donis resuman raporton pri la fakrondo agado 1978 — 1982 uzante pozitivajn spertojn kaj ne ŝparante krtikojn. El la laborceloj de MFGDREA de 1982/83 i. a. menciindas:

— envicigi pli da membroj en la aktivan agadon,
— celkonscie evoluigi la priterminologian laboron,
— aktive kunlabori kun la Komisiono pri Scienco kaj Tekniko,
— prepari la aktivan partoprenon en IMEM IV, kiu okazos 1983 en Poprad,
— pliintensigi la kunlaboradon kun UMEA kaj kun la alilandaj, medicinaj rondoj,
— kunlaboradi kun aliaj fakrondoj de GDREA.

Kadre de la konferenco la prezidantoj de la landaj medicinaj rondoj debatis sub la gvido de d-ro Imre Ferenczy, Eŭropa Sekretario de UMEA, pri problemoj kaj demandoj de kunagado kaj pri la preparo de IMEK IV.

La sukcesa, enhavoriĉa sed strečiga tago finiĝis per vizito al la Potsdama kabareto, kiu kiel la cetera kadra programo dum la aliaj du tagoj, la vizitoj al la memorejo Cecilienhof, la filmmuzeo, la Nikolai-preĝejo kaj aliaj tre kontentigis la konferencanojn.

D-ro Giso Brosche

Aldono de Michael Behr:

Medicina Fakronda Konferenco kun grava efiko al aliaj fakrondoj

Laŭ la dankinda invito de CE de GDR-EA kaj de Medicina fakrondo la estroj de la aliaj fakrondoj povis partopreni la tre utilan IIIan Konferencon de Medicina Fakrondo ĉe CE/GDREA.

Mi taksas, ke la Konferenco alportis tri valorajojn al la alifakuloj:

a) Estis utile, ke ni travivis la fakajn prelegadon kaj diskutadon sur scienca nivelo kaj en internacia medio.

b) La persona spertinterŝanĝo pri la formoj de la laboro, pri la vortformigo, pri la akiro de novaj membroj k. t. p. sufiĉe gravas por ĉiuj partoprenantoj.

c) La ĉefa servo de la konferenco al ĉiuj estis la priterminologia postlagmezo. Temas pri la konsciigo de la neceso terminologie labori, kaj pri la ekkono de la laborŝtupoj kaj -formoj, ne kiel leĝoj, sed kiel rekomendoj:

1. Atingo de superrigardo pri ekzistantaj materialoj kaj pri la stato internacia.
2. Privortara laboro (eluzo de la materialoj, kreo de Slipaj Vortaroj, Vortlistoj kaj Difinaj Vortaroj).
3. Apliko de la terminoj en artikoloj kaj prelegoj (por ĵurnaloj kaj internaciaj fakarangoj).
4. Internacia kunlaboro (kun Terminologia Centro, kun aliaj eksterlandaj fakrondoj, per reciproka korektado, spertinterŝanĝo).
5. Nacilingva laboro (spertinterŝanĝo kun nacilingvaj terminologoj, skribado de resumoj en Esperanto por nacilingvaj fakartikoloj).

Estis jam delonge evidente, ke oni devas plibonigi, eĉ multrilate krei ian informan kaj kunordigan centron, kies agado malhelpas la superfluan laboron kaj helpas la pliefikigon sur la terminologia kampo.

Aperis kelkaj personoj en la movado, kiuj emas fari tiun kunordigadon en la kadro de la Scienca kaj Eldona Centro (SEC) de UEA. Sekve SEC decidis starigi Terminologian Sekcion (TeS de SEC), kies tasko estos kunlaborante kun la Terminologia Centro de ISAE kaj Akademio de Esperanto, kunordigi ĉiujn terminologiajn iniciatojn, kolekti, kompari kaj utiligi jam faritajn bonajn kaj malbonajn spertojn, ellabori metodologiajn kaj praktikajn rekomendojn kaj kolekti, evoluigi kaj sistemigi komunan fakan kaj sciencan vortotrezoron.

Kaj pri la konkretaj terminologiaj laboroj kaj pri la diskutoj koncerne tiles principojn SEC daŭre donos informojn en la Scienca Rubriko de la revuo Budapeŝta Informilo.

Ĉiuj fakuloj, kiuj ion jam faris aŭ pretas fari sur terminologia kampo, bonvolu sin anonci al la Scienca kaj Eldona Centro, Budapest, Pf. 193, H-1368, kaj al la provizora gvidantino de TeS, Wera Dehler, DDR - 1140 Berlin, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113—05.

Alvoko

pri kunordigo de terminologia laboro de Universala Esperanto-Asocio, Scienca kaj Eldona Centro, Budapest

Konekse kun la ĝojiga evoluo kaj disvastiĝo de la aplikado de Esperanto por sciencaj kaj fakaj celoj, ankaŭ la terminologia laboro, la kompilado-kreado de fakvortaroj multloke komenciĝas kaj pliintensiĝas.

Tamen pro la izoliteco (eĉ foje izoliĝemo) de la opaj vortarfarantoj multe da energio perdiĝas pro la nescio pri la jam farita laboro de la aliaj, pro la du- eĉ pluroble paralelaj laboroj pri la sama afero, kaj pro la senfrukta disputado, kiu komenciĝas kiam pluraj, plimalpli egale bonaj, tamen nesamaj solvoj aperas samtempe de diversaj vortarfarantoj. Tia situacio estas ne nur neutila, sed povas esti eĉ tre malutila, ĉar ĝi endanĝerigas la unuecon de la lingvo, almenaŭ sur fakaj terenoj.

Fachgruppe Kursusleiter gegründet

Auf ihrer letzten Sitzung beschloß die Methodik-Kommission beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes am 12. 5. 1982, eine zentrale Fachgruppe der Esperanto-Kursleiter zu bilden. Diese Fachgruppe wird sich in Zukunft systematisch mit der sprachlich-methodischen Weiterbildung aller der Bundesfreunde befassen, die in irgendeiner Form Esperanto-Kurse leiten, aber nicht unbedingt ausgebildete Fremdsprachenlehrer sein müssen.

Alle Leitungen des Esperanto-Verbandes werden daher aufgefordert, dem Zentralvorstand jeden neuen Kursus und dessen Leiter zu melden, damit alle tätigen Kursleiter erfaßt werden. Die Methodik-Kommission wird weiterhin ein fachliches Hilfsorgan des Zentralvorstandes sein und durch die Vorbereitung und Ausarbeitung pädagogisch-methodischer Materialien dazu beitragen, das Niveau des Esperanto-Unterrichts in der DDR weiter zu heben.

Litova diploma laboro

L. Stažnickas, studento el Vilnius (Soveta Unio), sukcese defendis sian diploman laboron „Tipologiaj aspektoj en litova, franca kaj esperanta lingvoj".

Doktoriga disertacio el Francio:
„Libereco aŭ aŭtoritata evoluo de Esperanto“

Tre ĝojinda estas la fakto, ke pli kaj pli aperas en la mondo doktorigaj disertacioj pri Esperanto. Do la lingvo farigas ĉiam pli ofte universitata esplorobjekto. Ĉi-foje temas pri la disertacio de la juna franco Francois Lo Jacomo (naskita 1954), kiu agregaciiĝis pri matematiko kaj studis lingvosciencon ĉe la mondfama André Martinet. Kvankam Lo Jacomo esperantistiĝis nur en la jaro 1971 li rapide atentigis pri siaj kapabloj en matematikistaj kaj esperantologiaj rondoj, defendis la 657-paĝan disertacion la 29an de junio 1981 kun la predikato „tre bone“.
Ĉar la pritraktita temo ŝajnas grava por la rilato de la lingvistoj kaj de la esperantistoj mem al Esperanto, ni publikigas la enhavtabelon de la disertacio.

Enkonduko/Unua ĉapitro:
Esperanto, vivanta lingvo

Esperanto kaj planlingvoj / La fonologio de Esperanto / La sintakso de Esperanto / La vorttrezoro de Esperanto

Tria ĉapitro:
Pliriĉigo, evoluo, (re)aktualigo, reformo

Pliriĉigo kaj evoluo / Eraro kaj evoluo / (Re)aktualigo, reformo / Kiel oni traduku „un ordinateur“ en Esperanto? / La seksa diskriminacio / La problemo „aliel“ / La konflikto -ata / -ita: tempoj aŭ aspektoj? / La akuzativo

Kvara ĉapitro:
La sinkronaj simptomoj de l'evoluo

Dinamiko, aŭ dinamika sinkronio? / La enketo / La principoj je balasto / Balasto kaj evoluo: la dinamiko de diskretaj unuoj / Priskriba vidpunkto kaj klariga vidpunkto: ĉu unu aŭ pluraj lingvistikoj?

Kvina ĉapitro:
Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto

Konkludo. Esperantlingva resumo. Bibliografio. Enhavtabelo. La adreso de la aŭtoro: D-ro François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, 75016 Paris, Francio. La disertacio espereble aperos ankaŭ esperantlingve.

Kibernetiko kaj la Internacia Lingvo

La jubilea, 10a Internacia Kongreso de Kibernetiko okazos de la 23a ĝis 28a de aŭgusto 1983 en la belga kongresurbo Namur. La kongreslingvo estos apud la angla kaj franca, la Internacia Lingvo Esperanto.
Dum la Kongreso funkcios kvar laborsekcioj (Kibernetika Ekologio; Kibernetika Ekonomio kaj Sociokibernetiko; Lingvokibernetikoj kaj Kibernetika Pedagogio), plenkunsidoj kaj kvar sekcioj, i. a. sekcio pri antropokibernetiko.

La Instituto pri Kibernetiko Berlin & Paderborn (la gvidanto: prof. d-ro H. Frank, adreso: Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn) serĉas fake kaj lingve kompetentajn partoprenontojn kaj gvidontojn de la planitaj simpozioj. Tiuj, kiuj pretus aktive partopreni la kongreson, estas petataj sendi proponojn de siaj prelegoj. La Internacia Lingvo estos laborlingvo de ĉiu simpozio kaj en la sekcio pri antropokibernetiko. Ĉar kibernetiko estas ponto inter diversaj disciplinoj, estos bonvenaj fakuloj de ĉiuj najbaraj sciencoj.

La Instituto pri Kibernetiko celas ĉefe trakti problemojn de la kibernetika pedagogio kaj lingvokibernetiko kaj daŭrigi eldonadon de la internacilingva fakliteraturo pri la kibernetika pedagogio kaj lingvokibernetiko, kiuj nerekte aŭ rekte reliefigu kunligon kaj kunefikon de kibernetiko kun la Internacia Lingvo.

La aliĝkotizo al la kongreso estos 3000 belgaj frankoj kaj prelegontoj ĝuos rabaton de 50 %.

Post nelonge ĉe Hungara Esperanto-Asocio kaj Instituto pri Kibernetiko vendiĝos protokolo de la pasinta, 9-a Kongreso de Kibernetiko kun la internacilingvaj kontribuaĵoj „Kibernetiko de la Homa Lingvo“.

Diplomlaboroj esperantologiaj

Fine de majo 1981 sukcese defendis sian diplomlaboron pri esperantologia temo Stanislav Košecký el Slovaka Socialisma Respubliko. Li prezentas 85-paĝan studon pri „La komparo de la morfema strukturo de la slovaka kaj Esperanto“ antaŭ la Katedro de la slovaka lingvo en la Filozofia Fakultato de la Universitato en Bratislava.

La studento de la Vilniusa Ŝtata Universitato (filologia fakultato) L. Stažnickas defendis la 29an de majo 1981 sian 64-paĝan diplomlaboron pri la temo „Kelkaj tipologiaj aspektoj en la litova, franca kaj Esperanta lingvoj“. Gvidis la laboron docento A. Skupas, recenzis A. Bartkus

La 20an de junio en la fakultato de fremdaj lingvoj de Samarkanda Ŝtata Universitato „Ališer Navoj“ Anatolo Ionesov eminente diplomiĝis pri la temo „Kelkaj specifaj trajtoj de la angla kaj Esperanta frazeologioj“. La scienca gvidanto estis la vicdekano de la universitato fremdlingva fakultato A. S. Ŝakirov. La diplomlaborajo ampleksas 42 tajpitajn paĝojn.

Studentoj konferencis en Samarkando

Inter la 20a kaj 25a de la aprilo 1981 okazis la XI-a Studenta Scienca Konferenco de Samarkanda Ŝtata Universitato je la nomo Alîŝer Navoj. Jam la trian jaron seninterrompe kadre de la konferenco funkcias sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ĉiujare ĉiam pli ampleksiĝas la temaro de la referaĵoj, altigas ilia scienca nivelo, multiĝas la kvanto da partoprenantoj. Ĉi-foje la konferencon oficiale partoprenis reprezentantoj de 14 superaj lernejoj el diversaj urboj de USSR (Samarkando, Taŝkento, Krasnojarsko, Novosibirsk, Kievo, Moskvo kaj Sverdlovsk). Entute estis traktitaj 25 temoj.

1. Mitan Holikulov (Samarkando): La rolo de prepozicioj en Esperanto
2. Jakov Samŝijev (Samarkando): Elstara majstro de Esperanta poezio: Nikolao Hoĥlov
3. Farida Alimova (Samarkando): Latinaj pruntaĵoj en Esperanto (laŭ materialo de latinaj verboj)
4. Olga Suŝko (Samarkando): Pazigrafiaj sistemoj de planlingvoj (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
5. Svetlana Kim (Samarkando): Latino kiel internacia lingvo (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
6. Inna Bulanova (Novosibirsk): La internacia planlingvo kiel reduktilo de elspezoj por tradukado (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
7. Olga Češkova (Novosibirsk): La komparo de elspezoj por lernado de fremdaj lingvoj kaj Esperanto (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
8. Anatolo Ionesov (Samarkando): La planlingva projekto Solresol
9. Oleg Kiseljov (Taŝkento): Esperanto kaj moderna lingvoscienco (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
10. Sergej Miĥajlin (Krasnojarsk): La scienca terminologio en Esperanto (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
11. Rita Dautova (Sverdlovsk): Esperanto kiel instrumento de internacia kunlaboro en la sfero de scienco (foreste)
12. Tatjana Iŝmurzina (Taŝkento): Problemo de paronimoj en Esperanto (foreste)
13. Svetlana Pogorelaja (Kievo): La rusa lingvo — lingvo de interpopola komunikado en USSR (foreste)
14. Andrej Peĉjonkin (Sverdlovsk): Analizo de kritiko kontraŭ Esperanto (honordiplomo de la urba komitato de komsomolo)
15. Jelena Zaznobina (Krasnojarsk): Esperanto — agado kiel specifa formo de internacia edukado de junularo (honordiplomo de la distrikta komitato de komsomolo)
16. Vladislav Laptev (Krasnojarsk): Esperanto kiel ilo de interŝanĝo per informoj inter medicinistoj dum la scienc-teknika revolucio (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
17. László Szilvási (Kievo-Budapeŝto): La kreskanta rolo de naciaj lingvoj kaj Esperanto en la scienco (honordiplomo de la regiona komitato de komsomolo)
18. Andrej Jakovlev (Moskvo): La planlingva projekto Panedo
19. Andrej Jakovlev (Moskvo): La sistemo de vokalaj fonemoj en Esperanto
20. Andrej Jakovlev (Moskvo): Neologismoj en Esperanto — nova rigardo al malnova problemo
21. Andrej Jakovlev (Moskvo): La evoluo de sistemo de pronomoj kaj pronomaj adverboj en Esperanto (honordiplomo de la urba komitato de komsomolo)
22. Marina Noskova (Krasnojarsk): La disvolviĝo de Esperanto-movado en Krasnojarska regiono (honordiplomo de Samarkanda Universitato)
23. Mardon Abbosov (Samarkando): Kelkaj specifaj trajtoj de la semantika strukturo de la vorto en dulingva vortaro (laŭ materialo de la angla lingvo kaj Esperanto)
24. Svetlana Pogorelaja (Kievo): La metodiko de Esperanto-instruado en elementa A-kurso.

Krome pri la temo „Pri la mezurado de sinkrona parenceco de lingvoj kaj dialektoj (laŭ ekzemplo de la angla lingvo kaj Esperanto)“ eksterprograme prelegis diplomita lingvisto Šaaĥmat Mutalov (Taŝkento). Dum la fina plenkunsido de la konferenco, kiun prezidis la scienca vicrektoro de Samarkanda Universitato prof. d-ro Soldatov P. K., la prezidanto de la universitata Studenta Scienca Konsilantaro, docento Kurbanov A. M. alte taksis laboron de la interlingvistika sekcio kaj enmanigis honordiplomojn al la premiitoj.

Anatolo Ionesov

Librooferto

Mi vendas al kolektantoj:

— „Plena Vortaro de Esperanto“, unua eldono SAT 1930 / — „En okcidento nenio nova“ de Erich Maria Remarque, eldono de Heroldo de Esperanto 1929 / — „La ora ŝtuparo“ de E. Phillips Oppenheim, Londono 1935 / — „La Nova Testamento“, tradukita de Zamenhof, Londono 1929, poŝeldono, presita sur silka papero / — „La Faraono“ de Boleslaw Prus, 3 volumoj, Varsovio 1957 / — „Bofilino“ de Georgi Karaslavov, Sofio 1959.

Ofertojn al: Helmut Lehmann, 1200 Frankfurt/O., Moskauer Str. 8/57, DDR.

3-a ILK-Seminario en Lodz

De la 19.—29. 11. 1981 okazis en Lodz la III-a Seminario „Internacia Lingva Komunikado (ILK).
Dum la seminario oni pritraktis jenan temaron:

1. Teorio pri optimaleco de la internacia lingva komunikado
2. Disputo pri „nova informa ordo" en la nuntempa mondo
3. Informado kaj misinformado kaj la amaskomunikiloj
4. Internacia lingva komunikado kaj eduk-klerigaj procesoj en la mondo
5. Internaciaj organizajoj kaj ties lingvaj problemoj
6. Interlingvistiko — la stato kaj direktoj de ĝia evoluo.

Partoprenis ĝin 42 personoj (studentoj, sciencistoj el diversaj universitatoj kaj Pola Akademio de Sciencoj). Oni enmanigis al ili presitajn materialojn de la IIa seminario (Miedzynarodowa Komunikacja Jezykowa [Materialy poseminaryjne], red. T. Ejsmont, Lodz, 1981, p. 180).

Post la prezentado de referajoj kaj diskuto evidentiĝis la bezono de metodologia difino de teorio pri optimaleco de internacia lingva komunikado. Oni ankaŭ postulis integrigon de esplorado respektante pluraspektan pritrakton. Dum la seminario manifestiĝis certa samopinieco rilate al soci-kultur-kleriga aspektaro de ILK. Tamen koncerne lingvan demandon rimarkiĝis malsamaj opinioj. Malgraŭ tio la partoprenantoj emfazis la bezonon daŭrigi la problemaron, pro la graveco de internacia lingva komunikado, traktatan kiel esenca faktoro de dinamika disvolvo de la mondo.
Postseminariaj materialoj aperos sub la titolo „Problemy Miedzynarodowej Komunikacji Jezykowej" (Problemoj de Internacia Lingva Komunikado), enhavonte resumojn en du lingvoj (Esperanto kaj diversaj aliaj).

Diplomlaboroj en Pollando

Laŭ informo ricevita de s-ro Tadeusz Ejsmont, diversaj polaj finintoj de Altlernejoj kaj universitatoj verkis sian diplomlaborajon pri temo rilatanta al Esperanto. Jen kelkaj ekzemploj:

— An Evaluation of three Esperanto textbooks
Edward Malewicz, XII. 1975j.
Instytut Lingwistyki Stosowanej Uniwersytetu Warszawskiego
— Dystrybucja morfemów w wyrazie esperanckim
Ryszard Rokicki, Warszawa-VI. 1974
Instytut Lingwistyki Stosowanej Uniwersytetu Warszawskiego
— Esperantyzm czynnikiem wychowania miedzynarodowego (Esperantismo la faktoro de internacieca edukado)
Tyburcjusz Tyblewski, Jelenia Gora - 1968
— Członkowie esperanckich klubów w Lodzi
Eugeniusz Zarzecki, Lodz - 1966
Uniwersytet Lodzki, Wydzial Filozoficzno-Historyczny
— Rola dzialalności esperanckiej w wychowaniu internacjonalistycznym studentów (tio ne estas preciza temo)
Elzbieta Michalak, Kielce - 1978
W S P Kielce

Tre imitinde!

Universitata disertacio

F-ino Eleonora Worsztynowicz, studentino pri libroscienco en la Universitato de Poznań, preparas sian licencian disertacion pri „Esperantaj bibliotekoj en la mondo". Ŝi volonte ekligos kontaktojn kun bibliotekistoj kaj serĉas informilojn pri Esperantaj bibliotekoj, katalogojn kaj bibliografiojn. Adreso: F-ino Eleonora Worsztynowicz, ul. Poznańska 26 m. 37, PL 63-100 ŚREM, Pollando.

Antaŭ docentoj pri fremdlingva metodiko

En la kadro de oficiala kvalifikiga serio, kiun Humboldt-Universitato organizis por docentoj pri metodiko de instruado de fremdaj lingvoj, d-ro Till Dahlenburg, prezidanto de la komisiono pri Esperanto-metodiko, prelegis la 25an de junio 1982 antaŭ 30 personoj pri la temo „Instruado de Esperanto — internacia situacio kaj aspektoj por la fremdlingva metodiko". La unuhoran prelegon sekvis tre intensiva unuhora diskuto.

Prelego antaŭ studentoj

La 27an de majo 1982 d-ro Detlev Blanke prelegis antaŭ 60 studentoj de germana kaj slava filologioj de la Pedagogia Altlernejo Güstrow pri la planlingvo Esperanto. La invitinto prof. d-ro Ernst Sommerfeld apartenas al la influhavaj germanistoj de GDR kaj estas prezidanto de la Distrikta Estraro de Kulturligo Schwerin.

Prelegoj en la Inĝeniera Altlernejo

Pri „la informado kaj la lingva bariero — interlingvistikaj aspektoj" d-ro Detlev Blanke prelegis la 6an de aprilo 1982 antaŭ 60 docentoj de la Inĝeniera Altlernejo Dresden. Vespere li havis duan prelegon, sed ĉi-foje antaŭ 50 studentoj en originala studenta kelo.

„Esperanto — ĉu utopio?"

Sub tiu titolo inĝ. Heinz Hoffmann el Radebeul, asistento ĉe la Trafika Altlernejo Dresden, prelegis la 4an de marto 1982 antaŭ 37 docentoj kaj studentoj de la altlernejo.

Wissenschaftliche Übersicht

Detlev Blanke: Esperanto und Wissenschaft. Zur Plansprachenproblematik. Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, Berlin 1982, 88 S. Mit einem Vorwort von Prof. Dr. Georg Meier und Beiträgen von Dr. Till Dahlenburg und Dr. Martin Schüler.

Soeben erschien die erste detailliertere Übersicht über Grundfragen der Interlinguistik und Esperantologie in der DDR. Die Broschüre enthält 7 Abschnitte: 1. Plansprachen (S. 7—16), 2. Interlinguistik — Forschung und Lehre (S. 17—27), 3. Die Plansprache Esperanto (mit einem Kapitel über den pädagogischen Wert des Esperanto-Unterrichts, von Till Dahlenburg), (S. 28—43), 4. Die Plansprache Esperanto in Wissenschaft und Technik (S. 44—73), Esperantosprachige Fachtexte (Kapitel 5, S. 74—77), Esperanto im Kulturbund der DDR (Kapitel 6, S. 78—79) sowie als 7. Kapitel (S. 80—88) ein Anhang mit einer Liste der wichtigsten Fachwörterbücher, Vorlesungstexte der Someraj Universitataj Kursoj (Liège) 1972 bis 1978, Vorlesungen der Internationalen Sommer-Universität 1950—1980, Fachzeitschriften und eine Auswahl nationalsprachiger Esperanto-Wörterbücher.

Über 200 bibliographische Anmerkungen ermöglichen eine breite Orientierung über die wichtigste Fachliteratur.

Die sauber gedruckte Broschüre kostet M 6,—, ist nur beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes erhältlich. Sie ist für Wissenschaftler und für wissenschaftlich interessierte Esperantisten gedacht.

Doktoriĝoj en Budapesto

Ĝojiga estas la fakto, ke interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj pli kaj pli fariĝas objekto por universitataj laborajoj diversnivelaj, ĉu ŝtatekzamenoj, diplomaj, magistraj aŭ doktoriĝaj. Ni raportis pri tio kelkfoje sur la paĝoj de „der esperantist“ kaj iom pli detale prezentis la strukturon de la disertacio de F. Lo Jacomo sur paĝo 74. Jam antaŭ kelkaj jaroj en la Budapeŝta Universitato defendis siajn doktoriĝajn disertaciojn la hungarinoj Mária Rózsa Szabó-Mátá (pri la semantika modeligo de la filozofiaj lingvoj), Judit Balógh (pri Esperanto kiel pontolingvo en la instruado de fremdaj lingvoj). Pri ambaŭ disertacioj oni bedaŭrinde nenion povis legi en la Esperanta gazetaro.

La 16an de oktobro 1981 la polino Alicja Michiewicz-Sakaguchi defendis sian disertacion pri la temo „La lingva modeligo en fremdlingva instruado kaj en interlingvistiko“ kaj sekvis la 19an de marto 1982 Zsuzsa Varga-Haszonits pri la temo „La tiel nomata 'naturalisma skolo' en interlingvistiko. Kritika analizo“. Ŝi estas do la kvara doktoriĝinto el la esperantologia fako de prof. d-ro István Szerdahelyi, kiu pro tio same meritas gratulon kiel la sukcesintoj.

INTERKOMPUTO-82

HISTORIA EVENTO!

Budapeŝto, 1982-12-27/1983-01-02

Se vi uzas iagrade komputilon, venu al la unua, sole por komputistoj organizita konferenco (la unuaj dek estis kunaranĝitaj kun aliaj fakoj) kaj samtempe al la unua Esperantlingva komputista konferenco, organizita fare de neesperantista faka asocio!
Internacian Komputo-sciencan Simpozion organizas la hungara landa Komputoscienca Asocio „Johano Neumann“ en Budapeŝto jarŝanĝe, sub aŭspicio de la Scienca kaj Eldona Centro de UEA. La oficiala lingvo estas Esperanto. La prezidanto de INTERKOMPUTO-82 estas akademiano Tibor VAMOS, prezidanto de la renoma Internacia Aŭtomatiga Asocio (kies konata angla mallongigo estas IFAC).
La prezidanto de la Organiza Komitato estas prof. d-ro Ottó HASZPRA. Limdato por preleg-alsendoj kaj aliĝoj estas la 10-a de septembro (poste la partoprenkotizo altiĝos). Eblas alveturi kune kun familio, por familianoj dumtage okazos aparta distra programo, ĉiuvespere esperantlingva teatro, dancado. Grandega internacia Silvestra balo! Tuj petu detalajn informojn (angle, Esperante, germane, hungare aŭ ruse) ĉe la asocio-organizanto: INTERKOMPUTO — NJSZT, H-1368 Budapest, Pf. 240, Hungario.

Foto und Esperanto

Esperantisten, die aktiv mitwirken in den Gruppen der kürzlich gegründeten Gesellschaft für Fotografie, Interesse am Fotografieren und Filmen haben und dieses Interessengebiet sinnvoll mit Esperanto verbinden möchten (z. B. Organisierung von Ausstellungen, Filmen von Esperanto-Veranstaltungen, Herstellung von Amateurfilmen mit Esperanto-Kommentaren u. ä.), werden gebeten, sich beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes (1080 Berlin, Charlottenstr. 60) zu melden. Es besteht die Absicht, eine entsprechende Fachgruppe zu bilden, die beide kulturbundeigenen Interessengebiete zusammenführen könnte.

Redaktionelle Information

Auf Grund eines technischen Defektes in der Druckerei Glauchau verzögerte sich der Druck von Nr. 2/82.
Um den Erscheinungsrhythmus von „der esperantist“ wieder herzustellen, erscheinen Nr. 3 u. 4 sowie 5 u. 6 als Doppelnummer.

La Centra Estraro de GDREA

1

2



3

4



5

6

7

8

9

10



11

12

13

14

15



16



17

18

19

20

21

22

23

24

25



26

27

28

29

30

31



32

33

34

35

36

37

38



39



40

41

42

43

44

45

Dum la fonda konferenco de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) fine de majo 1981 en Karl-Marx-Stadt elektiĝis 46-membra Centra Estraro (CE) kaj kiel honora membro Otto Bäßler. Intertempe forpasis la honora membro kaj Hella Sauerbrey el Berlin. Do entute al la CE nun apartenas jenaj 45 personoj:

1. Arnold, Manfred, Berlin, ekonomo, membro de la prezidio de GDREA, membro de la Distrikta Estraro Berlin
2. Beau, Rolf, Leipzig, inĝeniero, membro de la Distrikta Estraro Leipzig
3. Behr, Michael, Leipzig, matematikisto, prezidanto de la Distrikta Estraro Leipzig, prezidanto de la Faksekcio de Komputistoj
4. D-ro Blanke, Detlev, Berlin, sekciestro en Kulturligo de GDR, sekretario de GDREA, membro de la internaciaj komitatoj de UEA kaj MEM
5. Borgwardt, Hans-Joachim, Stralsund, inĝeniero, membro de la Distrikta Estraro Rostock
6. D-ro Brosche, Giso, Rückersdorf, veterinaro, prezidanto de la Faksekcio de medicinistoj
7. Burmeister, Rudolf, Karl-Marx-Stadt, oficisto, prezidanto de la Distrikta Estraro Karl-Marx-Stadt
8. D-ro Dahlenburg, Till, Brüel, fakinstruisto, prezidanto de la komisiono pri metodiko de Esperanto-instruado

9. Dehler, Wera, Berlin, laborterapiistino, vicprezidantino de la Faksekcio de medicinistoj, gvidantino de Terminologia Sekcio de la Scienceldona Centro de UEA (Budapest)
10. Dietrich, Hans, Schwerin, pensiulo, prezidanto de la Distrikta Estraro Schwerin
11. Dorner, Marita, Meißen, oficistino, membro de la Distrikta Estraro Dresden
12. Dungert, Klaus-Dieter, Magdeburg, ingeniero, gvidanto de la sonbenda servo de GDREA
13. D-rino Erfurth, Ingrid, Jena, scienca asistantino (literatur-sciencistino), membro de la Distrikta Estraro Gera, membro de la komitato de TEJO
14. Prof. d-ro Falkenhahn, Viktor, Berlin, emerita lingvisto, vicprezidanto de la Fakkomisiono interlingvistiko/esperantologio
15. Hahlbohm, Werner, Waltershausen, pensiulo, honora prezidanto de la Distrikta Estraro Erfurt
16. Hahlbohm, Rudolf, Berlin, muzea konservisto, vicprezidanto de GDREA, membro de la internacia komitato de MEM
17. Hamann, Jürgen, Leipzig, instruktoro ĉe Kulturligo Leipzig, membro de la prezidio de GDREA, prezidanto de la MEM-Komisiono, membro de la internaciaj komitatoj de MEM kaj de UEA
18. Heinel, Hans, Oederan, direktoro de partia lernejo, prezidanto de GDREA, membro de la Prezidia Konsilantaro de Kulturligo de GDR
19. D-ro Hußner, Hans-Joachim, Ilmenau, scienca supera asistanto (pedagogo), prezidanto de la Distrikta Estraro Suhl
20. Jasmann, Horst, Berlin, ingeniero, redaktoro de „Fervojistaj Novaĵoj“
21. Kelpin, Hans-Jürg, Dienstedt, pastoro, prezidanto de la Distrikta Estraro Erfurt
22. Knöschke, Linde, Berlin, ingeniero, membro de la prezidio de GDREA
23. D-ro Krause, Erich-Dieter, Leipzig, scienca supera asistanto (lingvisto)
24. Kulisch, Bärbel, Frankfurt/O., oficistino, prezidantino de la Distrikta Estraro Frankfurt/O.
25. Kurtz, Franz-Peter, Schwerin, oficisto, membro de la Distrikta Estraro Schwerin
26. Lennartz, Michael, Ludwigsfelde, laboristo/studento, prezidanto de la Junulara Sekcio, membro de la prezidio de GDREA, estrarano de TEJO
27. Levin, Renate, Halle, ekonomo, membro de la Distrikta Estraro Halle
28. Linke, Siegfried, Halle, historiisto, prezidanto de la Distrikta Estraro Halle, membro de la prezidio de GDREA
29. Prof. d-ro Georg Friedrich Meier, Berlin, lingvisto, prezidanto de la Fakkomisiono Interlingvistiko/Esperantologio
30. Meinel, Achim, Berlin, ingeniero, prezidanto de la Faksekcio de fervojistoj, membro de la Distrikta Estraro Berlin
31. D-ro Minkwitz, Günter, Dresden, docento, prezidanto de la Distrikta Estraro Dresden
32. Partecke, Richard, Eisenach, ekonomo, prezidanto de la Scienc-Teknika Komisiono, membro de la Distrikta Estraro Erfurt
33. Pfennig, Werner, Neubrandenburg, ingeniero, prezidanto de la Distrikta Estraro Neubrandenburg, membro de la prezidio de GDREA
34. Plate, Werner, Rostock, pensiulo, prezidanto de la Distrikta Estraro Rostock
35. Raabe, Karl, Jena, teknikisto, prezidanto de la Distrikta Estraro Gera
36. Röhner, Walter, Coswig, pensiulo, honora prezidanto de la Distrikta Estraro Dresden
37. Scheffs, Hanna, Potsdam-Bornstedt, pensiulino, prezidantino de la Distrikta Estraro Potsdam
38. Schödl, Ingrid, Potsdam, instruistino en partia lernejo, membro de la internacia komitato de MEM
39. Schödl, Ludwig, Neuruppin, pensiulo, membro de la internacia komitato de MEM
40. Schonert, Ernst, Hohen-Neuendorf, pensiulo †
41. D-ro Schüler, Martin, Kleinmachnow, matematikisto
42. D-ro Schulze, Karl, Berlin, pensiulo
43. Wegener, Hans, Berlin, ingeniero, prezidanto de la Distrikta Estraro Berlin
44. Wollenberg, Fritz, Berlin, instruisto, vicprezidanto de la Distrikta Estraro Berlin
45. Würker, Erich, Reichenbach, pensiulo

La prezidio konsistas el:

prezidanto: Hans Heinel (18)
vicprezidanto: Rudolf Hahlbohm (16)
sekretario: D-ro Detlev Blanke (4)
membroj: Manfred Arnold (1)
Jürgen Hamann (17)
Linde Knöschke (22)
Michael Lennartz (26)
Siegfried Linke (28)
Werner Pfennig (33)

Novaj membroj, kiuj ne apartenis al Centra Laborrondo: 14 personoj.

La meza aĝo estas 48 jaroj.

En la oficejo de la Centra Estraro de GDREA laboras s-ino Ruth Schonert

NGUYEN VAN KINH

Ideala samideano, homa homo.

Volante diri multon pri li, mi tamen ne povos citi ĉiujn liajn meritojn. VPEA ŝuldas sian naskiĝon al tiu unuaranga apostolo de la internacilingva ideo en nia lando. Plie, se ĝia freŝdata 25-jara Jubileo markis plej elstaran etapon el la gisnuna historio de la vjetnama E-movado, ĉiu en tio rekonas, kaj gardos kiel komunan heredaĵon, la orstampon de lia kompleta sindono, senriproĉa persisto, nevundebla fidelo.

NGUYEN VAN KINH helpe de franclingvaj lernolibroj esperantiĝis en la jaro 1932, ĉe la aĝo dek-ses. Kvar jarojn poste li iniciatis, asistate de certa Roberto la unusola kunmembro, sekcion de la Internacio de Proletaj Esperantistoj en Sajgono (nuntempa Urbo Ho Chi Minh). Tiu fakto, verŝajne neniom grava, elokvente signalis de la debuto la tendencon de tuta lia vivo. Portante per fervora koro ambaŭ torĉojn de komunismo kaj esperantismo, li komencis propagandi kaj diskonigi Esperanton, utiligante je tiu celo kelkajn jurnalojn kaj gazetojn, por kies redaktado lia ĵurnalista kariero konsiderinde kontribuis: **Dan chung, Avant-garde, Le Peuble . . .**

En aŭgusto de 1938, aperis sur la tagĵurnalo **Dan chung** (La Popolamasoj — organo iniciatita de Hindoĉinia Kompartio) anonceto pri senpaga koresponda kurso de Esperanto laŭ la adreso de Hoang Huy Nam (unu el liaj pseŭdonomoj). De 1935 ĝis 1945, kvankam streĉe persekutata de la francaj koloniistoj, kvar fojojn arestita, spertinte entute pli ol kvar prizonjarojn, kun unu verdikto al morto sur la kapo kaj poste unu al punlaboro por la tuta vivo, li neniam rezignis pri siaj plej altaj idealoj, ĉiam agadante por la nacia kaj klasa liberiĝo, kaj lernigante la lingvon de la homara unueco, foje eĉ al certaj kunĉenatoj.

Ne longe post lia liberiĝo, en aŭgusto de 1945, sur la sama organo **Dan chung,** denove oni povis legi alian anonceton pri kunveno tuj okazonta ĉe Nguyen Van Kinh — n-ro 34 I, str. Frère Louis, Sajgono — por la fondiĝo de „Koŝinĉina (Sudvjetnama) Esperanto-Grupo". Li rekomencis aktivadi por enlanda Esp-revigliĝo, kaj nun dum la plej malfacilaj jaroj de la Rezistado kontraŭ la franca agreso. Guste en plena makiso ĉe la Sudo, li sukcesis formi plej bonan kernon por fine en 1956, sur la liberigita Nordo en socialisma konstruado, veni al la fondo de tutlanda organizaĵo, al kiu li mem, kiel iniciatinto kaj prezidanto, donis la gloran nomon de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kaj kiun li senprokraste faris oficiala sekcio de Mondpaca Esperantista Movado. Tiu evento sola sufiĉas por atesti la klarvidon de Nguyen Van Kinh, tiel de leninisma revoluciulo kiel de epokfara Esp-pioniro.

Sub la influo de lia personeco (1), pluraj eminentuloj de la lando deklaris sin subtenantoj de VPEA, kiu dekomence sukcesis ĉerpi siajn fortojn el la diversaj tavoloj de la nova socio. De tiam, verdire ĝis siaj lastaj minutoj, li senlace prodigis por Esperanto kaj por la asociaj aktivecoj konsultadon kiel eble plej saĝan, prizorgadon des pli kortuŝan. Li premsekvadis la procezon de ĉiu nia laboro, ĉu pri la aperigo de lernolibro, de vortareto, de beletra tradukaĵo, ĉu pri la organizado de nova kurso, de kluba kunveno aŭ de gastakcepto, donante al ĉiu senescepte helpon kaj kuraĝigon. Liaj ekzemplodonaj sindonemo kaj abnegacio certe havis lokon en ĉiu nia sukceso, precipe dum la teruraj jaroj kiam la usonaj bombaviadiloj furiozis super ĉies kapoj.

Ĉirkaŭ la jaroj 30, Nguyen Van Kinh aliĝis al IPE kaj al Bohema E-adresaro (iniciata de Raoul Melo), kunlaboris kun „Torĉo de l'Edukistoj" (emisiita de k-do Boubou), „Infanoj sur Tutmondo" (redaktita de k-do Honoré de Bourguignon), foje verkis frontartikolon por „Sennacieca Revuo" pri „La vivo de la laboristoj en Hindoĉinio", . . . spite de ĉiaj minacoj kaj malhelpoj flanke de la koloniismaj regantoj. Ekde 1955, malfermiĝis por li nova periodo por starigi plej vastajn korespondadon kaj kontakton kun la mondo esperantista, en kiuj sendube montriĝis liaj kvalitoj de aŭtentika internaciisto, de sen-antaŭjuĝa kaj grandanima homarano ĉiam preta toleri kaj amikiĝi, kaj per kio li provis akirigi al la sialanda movado subtenon kiel eble plej larĝan kaj efikan. Dum pli ol dek jaroj de diplomata misio en Sovetio (2) kaj en la aliaj socialismaj landoj, li, kiel ordinara kaj fervora samideano, partoprenis en sennombraj renkontiĝoj kaj aranĝoj de la lokaj esperantistoj, ĉe kiuj forte impresis liaj modesta simpleco kaj gaja simpatio. En 1959, li por la unua fojo gvidis VPEA-delegacion al UEA-Kongreso, la 48a en Varsovio, sekve vizitis Bjalistokon, kie li kiel reprezentiva aziano komisiite laŭtlegis la solenan paroladon por la starigo de Monumento omaĝa al D-ro Zamenhof, ĉe la 100-a naskiĝdatreveno de la kreinto de Esperanto. Ĉe la IIa Konferenco de MEM, li estis unuanime elektita membro de la Internacia Komitato.

Ĉiam levante la ruĝan kaj la verdan standardojn por mondpaco, socialismo kaj nacisendependo, Nguyen Van Kinh ankoraŭ estis rigardata de nia popolo kiel unu

el la plej belaj simboloj de la vjetnama-soveta amikeco, tial ke, inspirate de lia sublima figuro, ĉiuj vjetnamaj geesperantistoj sciis kaj scias konsideri, kiel la angulŝtonon de sia vera internaciismo, la garantion por sia pacamo, la neŝancelebIan solidarecon kun la esperantistoj kaj popoloj de Sovetio kaj de la aliaj socialismaj frataj landoj. Ĉu ne estis feliĉa koincido de la eventoj, ke ni, ĉe liaj lastaj tagoj de grava malsaniĝo, povis kune kun li ĉirkaŭbraki korvarme, sur la hejma tero, la amikojn el Delegacio de Soveta Esperantista Asocio vizitanta nian lancon, ke tuj sekve, li kiel malnova amiko revenis Moskvon, kie li fine faris la lastan spiron tute apud Lenin, la 26an de oktobro 1981, surtere de la unua patrujo de socialismo, remparo de la monda paco.

Cetere, tre notinde estas, ke tiu mondskala pacbatalanto riveliĝis, en siaj ĉiutage vivo kaj intimaj rilatoj, **vera homo** laŭ la plej larĝa senco de tiuj vortoj. Li estis el inter tiuj raraj, kiuj siaflanke observis severan moralan memkontrolon, male prodigis al la aliaj plej facilajn toleremon kaj pardonemon. Kontrastis lia tipe sobra, preskaŭ stoika, rigore ŝparema kaj laborema vivo kun la pretiĝo, faciiecco doni aŭ senkondiĉan helpon al tiu, aŭ prunton sen deviga redono al alia, kaj ĉiam simplamaniere, ĉiam kun neta sento pri frateco kaj egaleco. Neniam postulante por si mem ian ajn rajton, avantaĝon aŭ privilegion, kiujn li eĉ ofte rifuzis kiel troaj por sia strikta bezono, ĉiam preta cedi la pli bonan parton al aliaj, tia estis li — ne nur dum la mizeraj tagoj de la revolucia lukto, sed ankoraŭ pli reliefe dum la glora vivofazo, kiam destino al li jam ridetis. **Homa homo,** estus dirinta Kaloscay, krom **ideala samideano** kiel nomis lin ni ĉiuj, mirinda, senmakula revoluciulo, kiu ĉiam kapablis resti **li mem** spite de ĉiaj elprovoj kaj koruptaĵoj de sia tempo. Neelĉerpeblaj estas la ekzemploj, kiujn liaj plej proksimaj karuloj povus citi, — ja tio nepre necesos — por ankoraŭ pli komplete redoni la veran bildon de unu el tiuj humile sinforgesemaj gigantoj, kiuj tamen per siaj realaj vivoj kaj aktivecoj anticipe anoncis la venon de la plej belaj homrilatoj sur nia planedo, ĉu en ne malproksima, ĉu en tre fora estonto.

Fakte Nguyen Van Kinh mortis fine de 1981, bedaŭrata kaj funebrata de la tutaj Partio, Stato kaj popolo, kiel modela komunisto kaj nacia heroo, kies ĉerko estas por ĉiam solene portita en la vjetnaman Panteonon, signo de lia eterna viveco.

Pri li ĉiu vjetnama esperantisto ĉiu eksterlanda samideano kaj amiko povus fieri.

Hanojo, januaro 1982
DAO ANH KHA

---

(1) Ĉe la II-a Partia Kongreso de 1951, li estis elektita membro de la Centra Komitato, reelektita ĉe la III-a Kongreso de 1960. Dume li prizorgis plurajn partiajn funkciojn, ĉefe sur la socia kaj kultura kampoj.

(2) De 1957 ĝis 1967, li estis plenrajtigita ambasadoro en Moskvo. Reveninte la landon, li fariĝis prezidanto de la Vjetnama-Soveta Amikeca Asocio, ĝis 1980, poste ĝis la morto, ĝia vic-prezidanto.

Kondolenco de GDREA

Kun profunda ŝoko la esperantistaro en GDR, kore ligita al Vjetnamio eksciis pri la forpaso de Nguyen Van Kinh (oktobro 1981), prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. La forpasinto estis eminenta komunisto, ŝtatfunkciulo kaj esperantisto. Tiuj tri ecoj harmonie kunfandiĝis en lia milda personeco.

Multaj esperantistoj el GDR jam konatiĝis kun la forpasinto 1953 en Varsovio. La delegacio de GDREA havis la ĝojon persone konatiĝi kun Nguyen Van Kinh okaze de la 13a Konsultiĝo de la Esperanto-Asocioj de la socialismaj landoj 1979 en Hungario.

Antaŭ certa tempo oni solene celebris la 25-jaran jubileon de VPEA. Ceestis ankaŭ k-do Kinh, kiu rajtis fieri pri la sukcesoj de VPEA, ĉar parto da ili estas ŝuldata ankaŭ al li.

Bedaŭrinde, ne pasis longa tempo kaj k-do Kinh lasis la vjetnaman esperantistaron kaj siajn multnombrajn amikojn tra la tuta mondo funebri pro sia morto.

Ni kliniĝu antaŭ la karmemora kamarado kaj amiko, aminda homo kaj ŝatata esperantisto Nguyen Van Kinh.

Centra Estraro de Esperanto-Asocio
en Kulturligo de GDR

Letero el Ho-Chi-Minh-urbo

S-ro Ngô Chân Lý kun siaj gekursanoj

Kun granda ĝojo mi informas vin pri Esperanto-movado ĉe mia urbo en la jaro 1981 (la unua jaro de mia sepjara plano „de 1981 ĝis 1987“).

De 15. VII. 1981 ĝis nun, mi organizis oficiale ĉe ŝtata Kulturdomo de unua kvartalo de urbo Ho Chi Minh — Vjetnamio:

1. Tri Esperanto-kursojn por 55 gekursanoj,
2. Du prelegojn (kun ekspozicio) pri monda Esperanto-movado por pli ol 200 aŭskultantoj,
3. Fondas „Esperanto-klubon“ kun tri ĉefaj celoj:
   a) Propagandi kaj instrui Esperanton,
   b) Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto,
   c) Plifirmigi la amikecon inter la geesperantistoj tutmonde.

Por atingi bone miajn celojn, mi petas vin bonvolu helpi mian „junan Esperanto-klubon“ per

— Sendado de viaj Esperantaj propagandiloj, revuoj, lernolibroj, legolibroj k. t. p.
— Publikigo de mia koresponddeziro en via interesa revuo. Jen mia koresponddeziro: Mi kaj miaj geklubanoj deziras korespondi kun geesperantistoj tutmonde p. ĉ. t. Skribu al: s-ro Ngó Chân Lý, 539/TK 2/20, Tran Hung Dao, TP. Ho Chi Minh, Vjetnamio.

Kun bondeziroj por 1982 kaj koraj salutoj. Esperanto-klubestro ĉe urbo Ho Chi Minh Ngó Chân Lý.

S-ro Ngô Chân Lý (staras)

Nova antaŭenpaŝo en Vjetnamio

Lastatempe en Hanojo pluraj lingvistoj kaj beletristoj aparte interesiĝis pri interlingvistiko kaj esperantologio post serio de tiutemaj prelegoj far Dao Anh Kha, la konata E-poeto, ĉe ambaŭ institutoj Filologia kaj Beletra. Sekve de tio, la estraro de la Filologia instituto aprobis projekton laŭ kiu ĝi starigos, en proksima estonto, novan fakon pristudontan la novajn problemojn.

La konata lingvisto kaj direktoro, profesoro Hoang Tue, kiu delonge estis honora vicprezidanto de VPEA, decidis ellerni la lingvon internacian Esperanto, por ke li mem gvidu la fondotan interlingvistikan studrondon. Ankaŭ tiucele, nun estas funkcianta vigla Esperanto-kurso por la interesatoj, sub la zorgo de Dao Anh Kha.

Lingvistoj kaj esperantologoj en diverslandoj estas petataj helpi al la establiĝo de la nova fako en Vjetnamio, per ĉiaj dokumentoj, materialoj rilataj al la temo, kiujn ili povos sendi perpoŝte al: Viên Ngôn Ngu Hoc Viêtnam, 20 Ly. Thai. Tô, Hanoi, Profesoro Hoang Tuê.

Lerniloj estas bezonataj en . . .

VJETNAMIO

Esperanto-Kurso en Kultura infana domo, Nhá ván hoá thiêu nhi, Hanôi, Vietnam, petas materialon por desegnado kaj pentrado, interŝanĝi infandesegnaĵojn, PK, PM.

Adreso: VPEA-sekcio, K-do Nguyen Dô Khanh, 173-A, Vo-van-Tân-quân 3, T. P. Ho Chi Minh, Vietnam.

KAMPUĈIO

K-do Navouth, v.ministre, Ministére de l'Education nationale, PHOM-PENH Republique populaire du Campuchea petas Esperanta-Kamboĝa vortaron de UEA, eldonitan en Budapeŝto, kaj francan, anglan, Esperantajn vortarojn, lernolibrojn (Esperanto 1), E-informilojn en franca, angla, rusa kaj germana lingvoj.

LAOLANDO

K-do Waterinsak, Direction des pays socialistes, Ministére des Affaires étrangeres, VIENTIANE, LAOS (Asie) petas multajn internaciajn E-lernolibrojn (Esperanto 1, Premier Manuel, The Esperanto Teacher ktp.), E-aĵojn, E-informilojn en franca, angla, rusa kaj germana lingvoj.

Letero pri Dimitrov

La Distrikta Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio en Šumen (p. k. 69, 9700 Šumen) kune kun la Packomitato kaj tiu de la Patrolanda Fronto eldonis 4-paĝan publikan leteron pri la agado kaj vivo de Georgi Dimitrov.

Serĉata

La Armena Sekcio de ASE serĉas la esperantlingvan tradukon de „Abu Lala Mahari" de A. Isahakjan. La tradukon faris Gurgen Sevak. Ĝi aperis 1926.
Informojn kaj ofertojn oni sendu al: Armenia Filio de ASE, Str. Abovjan 3, 375 000 Erevan.

Krasnodara Radio

La Krasnodara Radio-Komitato dissendis la 30. 1. 1982 pere de radio programon „Esperanto". La raportisto parolis pri geesperantistoj de la urbo Krasnodar kaj intervjuis esperantistojn el Krasnodar kaj gastojn.
En la etero sonis Esperanto-kantoj, kiujn prezentis geesperantistoj sub la akompano de siaj gitaroj.
Partoprenantoj de la dissendo estis la kamaradoj A. Ivasenko, V. Baŝilov, G. Pavelev, .A Čistjakov k. a., kiuj bone parolis en la Internacia Lingvo Esperanto. Kun humuro ili respondis la demandojn de la radiokorespondanto kaj tre interese donis komentariojn pri la vivo de la Krasnodara Esperanto-organizaĵo (je la nomo de) E. A. Bokarev.
Multe da aŭskultantoj skribis al la adreso de la Krasnodara Radio Komitato kaj petis ripeti la dissendon. Aleksej Nikulin, USSR 350 028 Krasnodar, Seleznjova, 176-41.

Omago al Goethe en Berlin

Kvankam Goethe ne tre ŝatis la berlinanojn, la Berlinaj esperantistoj opiniis, ke ankaŭ ili ne povas rezigni pri omaĝo al tiu multflanka homo okaze de lia memorjaro.
Tial la Distrikta Estraro Berlin okazigis „Goethe-vesperon" meze de junio 1982.
La kvar agintoj — sinjorino Dehler kaj sinjoroj Arnold, Mittag kaj Wollenberg — prezentis programon, kiu pruviĝis ege sukcesa. Per diapozitivoj kaj tekstooni informis pri gravaj stacioj en la vivo de Goethe. Per versaĵoj (ekz. „Elfreĝo", „Trovita") oni honoris la faman poeton, same kiel per kantoj germanlingvaj, kiujn oni aŭskultis de sondiskoj. Krome la agintoj legis scenojn el la dramo „Faŭsto" — interparolojn inter Faŭsto, Mefisto kaj Margarete —, kiujn la ĉeestintoj aŭskultis kun plezuro. Ankaŭ la raporto de Willi Bredel pri „Faŭsto"-prezentado en Hamburga popolteatro antaŭ multaj jaroj amuzis la aŭskultintojn.
Tiamaniere la Berlinaj esperantistoj travivis kaj seriozan kaj serenan Goethe-vesperon, por kiu la aranĝintoj meritas laŭdon kaj dankon.

Barbara Schulze

Kuba Esperanto-Asocio skribis al ni:

Pli ol mil lernantoj

La prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio (apartado 314, La Habana 1), ing. Andrés Rodriguez, skribis al nia asocio kaj donis en sia letero (de 31. 12. 1981) tre interesajn informojn pri aktualaj aktivecoj de KEA. Ni represas parton el lia letero kaj samtempe alvokas ĉiujn grupojn de GDREA ekligi kontaktojn kun KEA, asocio en lando konstruanta la socialismon kaj frate ligita al la nia.

. . .

Nia lernejo estas firme establita en granda lerno-centro situanta en la centro de Havano (kontraŭ la Centra Parko). En ĝi troviĝas la plej granda lingvolernejo de nia lando. En la venonta kurso, kiu komenciĝos la 8an de februaro 1982, en tiu lernejo funkcios 22 grupoj de unua nivelo, 8 grupoj de dua nivelo kaj 6 grupoj de tria nivelo. Ĉiu grupo ricevas unu klason ĉiusemajne po 1½ horo. La grupoj estas distribuitaj de lundo ĝis vendredo de la 6a ĝis la 9a vespere.

Nia E-lernejo havas sian direkciejon kaj en ĝi laboras knabino pagata de la Asocio mem. Ni propagandas la matrikuladon per la plej gravaj ĵurnaloj de nia lando kaj en ĉiu kurso matrikuliĝas pli ol mil personoj. Nia kurso estas rekonita de la Centro de Kubaj Laboristoj (sindikato) kaj de la aliaj oficialaj organizoj de nia lando.

Jam en aliaj provincoj funkcias similaj kursoj orientitaj de ni. Estas konvene, ke kiam venas esperantistoj al nia lando, ili demandu pri Esperanto, pri nia asocio k. t. p. Jam multege da homoj en nia lando konas ĉi tiun aferon.

Ankaŭ estas konvene, ke ili kontaktu nin kaj vizitu nian lernejon. Nia lernejo estas konata per la nomo „Manzana de Gómez" kaj troviĝas en la strato Zulueta kaj Neptuno en Malnova Havano. Ĝin oni povas viziti de lundo ĝis vendredo de la 6a ĝis la 9a vespere. Ankaŭ oni povas demandi pri ni en la biblioteko „Máximo Gómez" kiu situas en Prado 205 i/Colón kaj Trocadero en Malnova Havano. La Delegito de UEA en Havano nomiĝas Fernando Paredes — Tel. 62 2440 (o)

Alia grava afero pri kiu ni ankoraŭ povis fari nenion estas pri la interlingvistiko. Ni bezonas sciencistojn esperantistojn dezirantajn kunlabori en tiu scienca branĉo. Ankaŭ ni bezonas librojn aŭ aliajn materialojn pri tiu temo.

Se iam venus germana sciencisto esperantisto okupiĝanta pri interlingvistiko, tiu nepre devos kontakti nin.

KEA en televido

En la programo „Revuo de la Mateno" de la Kuba televido ĉiun liberan sabaton Kuba Esperanto-Asocio informas pri Esperanto kaj esperantista agado.

(laŭ Kuba Bulteno, aprilo 1982)

Lazura tajgo-6

En siberia urbo Tjunenj, jam sesan fojon kolektiĝis 42 reprezentantoj de 10 urboj en kadro de tradicia Novjara renkontiĝo nomita „Lazura tajgo", kiu estis organizita de la 31a de decembro 1981 ĝis 3a de januaro 1982 pere de Tjumena E-klubo „Revo".

Interese, ke plej juna reprezentanto estis 3jara Anton Zaharov el Neftejugansk kaj plej matura — 47jara Revoanino.

La renkontiĝo delonge jam gajnis popularecon inter esperantistoj de siberia kaj urala regionoj. Dank' al siaj riĉenhavaj koncertaj programoj, novjaraj belomaskaradoj, gaja kaj humora atmosfero.

Ĉijara „Lazura tajgo" krom kutimaj programeroj ankaŭ enkluzivis oficialan parton — konferencon de aktivuloj, kie estis pridiskutataj demandoj pri organizaj momentoj de Sovetia E-movado kaj pri organizo de tutsovetia E-tendaro apud urbo Tjumenj en aŭgusto de 1982j. Memorante pri bonkoreco kaj gastamo de afablaj mastroj, gastoj revenis hejmen plenaj da impresoj kaj pretaj por plia E-agado.

A. Knjazev, prezidanto de E-klubo „Malaĥeta stelo", u. Miass

Denove ĉe Moscow News

La sovetia MEM-sekcio denove esperantigis gravan materialon, kiu aperis kiel suplemento de la revuo Moscow News. Ĉi-foje temas pri eltiroj el la grava libro „De kie venas minaco kontraŭ paco", eldonita 1981 de la armea eldonejo de la Ministerio pri Defendo de USSR. La suplemento apartenas al n-ro 10 (februaro) 1982 de la revuo kaj ampleksas 16 paĝojn. La deokumento estas ricevebla senpage ĉe la Distriktaj Estraroj de GDREA.

Letervespero en Gulbene

Esperanto-Klubo „Floreto" el la Latvia urbo Gulbene organizas letervesperon sub la devizo „Esperanto servu al la paco kaj al la tutmonda sekureco". Ni petas sendi diversajn materialojn: bildkartojn, turismajn prospektojn, nacilingvan gazetaron, insignojn k. t. p.

Ĉiu sendinto ricevas specialan bildkarton kun subskriboj de ĉiuj partoprenantoj kaj insignon de la urbo.

Nia adreso: Sovetunio, 228 700 Gulbene, Latva SSR, Kultura Domo, Esperantoklubo „Floreto".

5a renkontiĝo de iamaj membroj de GLEA

Denove la iamaj membroj de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) renkontiĝis, ĉifoje de la 15a ĝis 17a de aprilo en Leipzig. Ĝi estis la 5a fojo. La pli ol 50 gekamaradoj kolektiĝis jam vespere la 15an, interkonatiĝis kaj komune kantis. La 16an oni havis abundan programon. Omaĝo al la forpasintoj, i. a. Otto Bäßler, Frieda Bäßler, Albert Weinhold, Walter Kampfrad,. Willi Zimmermann; rememoro pri Rudi Graetz kun lia sonbenda voĉo, poemoj prezentitaj de Erich Würker kaj Reinhold Gallien.

Aparte interesaj estis la kontribuoj de Ino Kolbe kaj Gerhard Böttcher pri la evoluo de GLEA en la distrikto Okcidenta Saksio (hodiaŭ Leipzig + ĉirkaŭaĵo), kiu entenis multe da nekonataj faktoj, ĉerpitaj el dokumentoj kaj gazetoj. Jen valora esplorlaboro jam farita kaj daŭrigata. Sekvis kontribuoj de Johannes Dittrich pri siaj internaciaj ligoj kaj de Werner Habicht pri Walter Kaufmann. Paul Thomas lingve tre bone prezentis interesan prelegon pri la pacbatalo de Hector Hodler, fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Detlev Blanke resumis kelkajn atingojn kaj mankojn en la agado de GDREA.

Posttagmeze la partoprenintoj vizitis la muzeon de la Iskrapresejo kaj vespere renkontiĝis por rigardi lumbildprelegetojn. Tiu 5a renkontiĝo distingiĝis per kolektiva programpreparo kaj -realigo kaj estis bona sukceso. La 6a okazos 1983, la loko ankoraŭ ne estas decidita.

Memore al Oskar Kaufmann

La 9a numero de Turingia Informilo (speciala numero), organo de la Distriktaj Estraroj de GDREA Erfurt, Gera, Suhl, aperigis artikolon kaj fotojn pri la laborista esperantisto Oskar Kaufmann el Waltershausen, kiu estis mortpafita de la polico dum demonstracio kontraŭ malsato la 20an de majo 1932.

Ĉi-jare do 50-jariĝis la morto de tiu esperantisto, kies kunbatalinto Werner Habicht estas nuntempe la honora prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA Erfurt.

Betrifft: Die Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung

Der Zentralvorstand sammelt alle Materialien zur Geschichte der Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bewegung und bittet um Zusendung. Es werden auch Fotokopien und Abschriften angefertigt und Originalmaterialien auf Wunsch zurückgesandt.

In Leipzig wurde eine Gruppe zur Erforschung der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im ehemaligen Bezirk Westsachsen (Leipzig und Umgebung) gebildet.

Alle Esperantisten, die Materialien besitzen oder Angaben machen können, wenden sich bitte an Frau Ino Kolbe, 7021 Leipzig, Dessauer Straße 35 a, die Interessenten ein Merkblatt mit genaueren Fragen zusendet.

Kiu konis L. Wellward?

Kamarado Hristo Kanev (str. D. Poljanov 12, 1504 Sofia) kiel iama membro de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BulEA) korespondis dum la 30aj jaroj kun la germana komunista esperantisto, studento L. Wellward. Tiu loĝis unue en Karlsruhe kaj 1933 transloĝiĝis al Stuttgart. Ĉu iu konis lin aŭ ion scias pri lia sorto? Se jes, li/ŝi skribu pri tio al k-do Kanev.

Informoj serĉataj!

Por ellaborado de kroniko pri la Esperanto-movado en Apolda oni serĉas informojn pri jenaj esperantistoj: Arno Liebeskind, Ernst Höhne, Max Wolter, Kurt Hermann, Oberpostsekretär Hahndorf, Stricker Mehlhorn, Kunstmaler Basel.

Eventualajn informojn bv. sendi al: Friedrich Krake, 5320 Apolda, Dr.-Külz-Straße 15.

Organ der MEM „Paco"

Wir rufen auf, das offizielle Organ der Weltfriedens-Esperanto-Bewegung (MEM) „Paco" zu abonnieren. Diese Zeitschrift erscheint mit 6 Nummern (á 16 S, A 4 = 96 S.) in Bulgarien und enthält vielseitiges Material über die Weltfriedensbewegung, über den internationalen Friedenskampf und natürlich über die MEM. Außerdem enthält jedes Heft literarische Beiträge und des öfteren Fachartikel über Esperanto und seine Bewegung. Hinzu kommen jährlich etwa 3 — 4 Sonderhefte aus verschiedenen Ländern, die insgesamt noch einmal ca. 100 S. ausmachen. Das Abonnement kostet 30 M.

Abonnements nimmt ab sofort für 1983 entgegen: Post- und Fernmeldeamt Falkenberg, 7900 Falkenberg, Uebigauer Straße 4.

El GDR

2-a plenkunsido de CE de GDREA

La Centra Estraro de GDREA havis sian duan plenkunsidon la 12an kaj 13an de februaro 1982 en Cottbus. Oni aparte traktis pri la enhavo kaj agadformoj de GDREA en la pacbatalo, pri la plifirmigo de la grupo-bazo de GDREA kaj aŭskultis diversajn raportojn.

3-a plenkunsido de CE de GDREA

La Centra Estraro de GDREA havis sian 3an plenkunsidon la 11an kaj 12an de junio 1982 en Karl-Marx-Stadt.
Menciindas la prelegoj kaj debatoj pri jenaj tagordaj punktoj:
— aktuala politika situacio (H. Heinel)
— akcelado de peresperanta kultura agado en GDR (J. Hamann)
— evoluigado kaj kvalifikado de novaj funkciuloj/kadroj (D. Blanke)
— MEM-agado en GDR (J. Hamann)
— informoj pri la aktuala internacia Esperanto-movado (D. Blanke).

De aparta graveco estis la kunsidoj de tri laborgrupoj: 1. enhavo kaj strukturo de estontaj kvalifikaj seminarioj (laŭ materialo de M. Lennartz), 2. problemoj de la fakgrupoj, 3. spertinterŝanĝo pri distrikta laboro.
Fondiĝis MEM-Komisiono kiel helporgano de CE de GDREA, kiu konsistas el la membroj J. Hamann, I. Schödl, M. Schrage, H.-J. Kelpin, R. Hahlbohm, gvidata de Jürgen Hamann.
La Centra Estraro krome aŭskultis multajn raportojn kaj informojn.

Intensa kurso en Johanngeorgenstadt

De la 19a ĝis 24a de aprilo 1982 28 esperantistoj el ĉiuj distriktoj de GDR kolektiĝis en Johanngeorgenstadt (Erc-montaro) por partopreni intensan kurson, gviditan de la ĉeha Esperanto-instruisto prof. Jaroslav Polensky el Ceské Budêjovice. Dank' al la bonega metodika gvido de la lektoro, la teknika helpo de la geedzoj Eichler el Schwarzenberg kaj la granda entuziasmo de la kursanoj, la kurso fariĝas tre sukcesa. Krom la lecionoj al la programo apartenis ekskursoj, lumbildprelegoj, prelego pri Esperanto en GDR de Hans Heinel (prezidanto de GDREA), kantado kaj kursfina festo. Prof. Polensky gvidos ankoraŭ ĉi-jara duan intensan kurson de 1-a ĝis 7-a de novembro en Dohna (distrikto Dresden). Interesuloj sin anoncu ĉe la Esperanto-Asocio (1080 Berlin, Charlottenstr. 60).

Junulara intensa kurso en Uetz

Jam la duan fojon la konata slovaka junulara aganto, Stano Marĉek, gvidis porjunularan intensan kurson. Ĝi okazis de la 10a ĝis 15a de majo 1982 en Uetz ĉe Potsdam. Partoprenis 30 partoprenantoj.

7-a semajnfina seminario

Jam la 7an semajnfinan seminarion (16.—18. 4. 1982) okazigis la esperantistoj de la distrikto Neubrandenburg. Partoprenis 33 personoj, kiuj ĉiuj intensive partoprenis la tri diversnivelajn konversaciajn kursojn.
Estas nekompreneble, kial ankoraŭ ekzistas distriktaj organizaĵoj kiuj ne sekvas la neubrandenburgan modelon. Pri la maniero prepari kaj okazigi tiajn kursojn Werner Pfennig abunde informis en „der esperantist" 3/1981 (n-ro 107), p. 59—61.

El Stralsund

Kolektantoj de poŝtkartoj fondis grupon en Stralsund kaj kunligas sian interesan hobion kun Esperanto.
Pri spertoj pri tiu nova formo interesigi homojn pri Esperanto volonte informas s-ro Hans-Joachim Borgwardt, 2300 Stralsund, P.-Wessel-Str. 12.

6-a konferenco de la nordaj distriktoj

Ĝi okazis la 15an de majo 1982 en Rostock sur la tradicio-ŝipo de la tipo „Paco", ŝipmuzeo ĉe Rostock. Partoprenis ĉirkaŭ 30 esperantistoj el la nordaj distriktoj Rostock, Schwerin kaj Neubrandenburg. La tri distriktoj prezentis raportojn pri sia agado, el kiuj plej enhavoriĉaj estis tiuj de Rostock kaj Neubrandenburg. Partoprenis ankaŭ d-ro Detlev Blanke, kiu prelegis pri Esperanto en scienco kaj tekniko.

Junulara Konferenco

25 gejunuloj partoprenis junularan konferencon, kiu okazis 19./20. marto 1982 sur la internacia kampadejo Krossinsee.

Rekordo?

En la distrikto Neubrandenburg verŝajne funkcias la plej multaj kursoj en la Popolaj Altlernejoj, nome 6.
Kial ne ĉiuj distriktoj intense preparas tiujn kursojn? Imitu Neubrandenburgon!

Helpo por Pollando

Multaj esperantistoj sendis al siaj personaj polaj amikoj donacojn por helpi iom mildigi la komplikan situacion. La distrikta estraro de GDREA en Neubrandenburg celkonscie organizis tiun interhelpon.

Letervespero 1983

Por letervespero okazonta komence de 1983 la Esperanto-grupo el Wriezen atendas leterojn kaj bildkartojn el la tuta mondo: Esperanto-Asocio, Loka Estraro DDR - 1313 Wriezen, Jägerstr. 12 (Uwe Siebert).

Michael Lennartz

Studado kaj amuzado: niaj Junularaj Seminarioj

Ili estiĝis jam tradiciaj aranĝoj: la Junularaj Seminarioj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Ekde pluraj jaroj la junuloj el Germana Demokratia Respubliko ĉiujare kunvenas por studi kaj amuziĝi, por interŝangi spertojn. Niaj JuSem hodiaŭ reprezentas altvaloran alojon. La edukado de junaj, spertaj funkciuloj estas unu deviga tasko de ĉiuj organizoj. Dua tia tasko estas la disvastigo de bazaj konoj pri lingvo kaj movado al niaj plej novaj, tute senspertaj amikoj. JuSem servas kaj por la unua kaj por la dua taskoj. El tiu kunligo naskiĝas menciinda rezulto: La senpera transdono de la spertoj de longjaraj esperantistoj al komencantoj kaj alidirekte la informado pri motivoj kaj celoj de la konatiĝo kun Esperanto fare de tiuj, kiuj nun lernas la lingvon.
Sekve de tio diskutoj kaj neformalaj interparoloj estigas gravajn punktojn en la programo de JuSem. Sed ili ne anstataŭas (kaj ne povas anstataŭi) prelegojn kaj referaĵojn. Tial al la programeroj apartenas prelegoj pri Esperanto en teorio kaj praktiko, argumentado, nacia kaj internacia junulara E-laboro. La kunlaboron kun Libera Germana Junularo ofte montras referaĵoj de kunlaboranto de la Centra Estraro de nia socialisma junulara movado. Viglaj diskutoj sekvantaj tiujn referaĵojn pruvas la grandan scivolon de la junuloj ankaŭ pri neesperantistaj temoj.
En la unua frazo mi uzis la esprimon: tradicia. Tio ne signifas: rutina. Ĉiu JuSem havas specialan atmosferon, ĉiam ni povas enprogramigi (kelkfoje hazarde) unikajn erojn. Foje tio estis la vizito de Jerzy Grum de Pola Radio, alifoje la projekciado de amatorfilmoj aŭ la pli kaj pli ofta uzado de interesaj sonbendoj.
Ekster tiu riĉa programo troviĝas tempo eĉ por kantado, ekskurso, vesperaj amuzado kaj dancoj.
Iuj eble nomas ĝin dorlotado: Por aliaj ĝi estas memkompreneblaĵo: En mia lando ĝi estas parto de la junulara politiko, ke tiuj seminarioj okazas sub la plej bonaj kondiĉoj, ke la partoprenantoj pagas por tiu unu semajno nur malaltan kotizon, t. e. ĉirkaŭ 5 % de la tutaj kostoj por manĝoj kaj tranoktado, kaj rericevas la vojaĝkostojn.
Ni ne ofte parolas aŭ skribas pri niaj junularaj seminarioj. Sed ili ĉiam meritas esti menciitaj kiel firma elemento de nia esperantista porjunulara laboro.

UN decidis 1983: „Internacia Jaro de Komunikado"

La ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj dum sia kunsido en novembro 1981 proklamis la jaron 1983 „Internacia Jaro de Komunikado" kaj per tiu paŝo agnoskis la daŭre pligrandiĝantan akriĝon de la internacia komunikado problemo.
Certe UN ne vidas unualoke la **lingvan** komunikadon, sed pleje celas la transdonon de informoj (= komunikado) per la amasmedioj. Sed sendube la lingva aspekto de la internacia komunikado pli kaj pli estas vidata. Strange, ke oni devas skribi „pli kaj pli vidata", ĉar fine la lingvo estas la ĉefa rimedo de la komunikado, ĉu nacie ĉu internacie. Sed — kiel ni scias, ankoraŭ ne estas ĉiutaga scio, ke ekzistas internacia lingvo problemo kaj — ties solvo. Jen la ŝanco kaj defio por la esperantistoj en serioza kaj sobra maniero enkadriĝi en la aktivecojn de la UN-jaro. Ni montru la aspektojn de la internacia lingva komunikado kaj informu pri la rezultoj ĉikampe atingitaj per Esperanto.

Libroj el Hungario

La Aventuroj de Tom Sawyer. Mark Twain. Laŭ hungarlingva koncizigo trad. V. Benczik. Budapest 1981, 28 p. Ilustris A. Dargay. Bildstria rakonto. ISNB 963 571 0852.

Ŝako

Sporta Asocio DELTANA (P.O. Box 10, R-8829-Sulina, Rumanio) organizas IIIan eldonon de la perkoresponda DELTA SAKTURNIRO kaj varme invitas partopreni ŝakludantojn el GDR. Enskribo ĝis 15. 10. 1982, senpaga por fremdaj partneroj.

Internacia pacrenkontiĝo

En Pardubice la 21an kaj 22an de majo okazis internacia renkontiĝo de pacdefendantoj, kiun partoprenis 150 esperantistoj inter ili la prezidanto de MEM, d-ro Imre Pethes (Hungario) kaj la ĝenerala sekretario William Gilbert (Francio). La partoprenantoj akceptis malferman leteron al la prezidento de USONO, Reagan.

Ĉeĥa grupo serĉas kontakton

La ĉeĥa Esperanto-grupo el Kolin serĉas kontakton kun esperantista grupo el GDR. La grupo konsistas el 20 personoj kaj apartenas al la urba kultura centro. Interesuloj skribu al la prezidanto de la grupo inĝ. Václav Pekař, Lidická 1061, CS-280 00 Kolin 5.

Tridistrikta renkontiĝo

La esperantistoj de la distriktoj Erfurt, Suhl kaj Gera okazigis la 5-an de septembro 1982 sian Tridistriktan Renkontiĝon. Partoprenis la sekretario de GDREA.



Prospekto pri la koncentrejo Sachsenhausen

La Distrikta Estraro de GDREA Potsdam eldonis esperantlingvan tradukon (E. Starke, L. Schödl) de prospekto pri Sachsenhausen. La prospekto aperis en eldonkvanto de 5000 ekz. kaj kostas M 1,50. Mendojn oni direktu al la Centra Estraro de GDREA, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60.

Informo de Frank C. Danson

Al mia koresponddeziro el „der esperantist" 1/81 mi ricevis respondojn de 40 esperantistoj el multaj landoj. Pro akcidento mi ne povis respondi al la skribintoj kaj pro tio petas pardonon. Sed post resaniĝo mi klopodos respondi.

F. C. Danson

Ostravanoj en Meißen

De 5a ĝis 10a de majo 1982 ĉeĥaj esperantistoj el Ostrava vizitis la grupon en Meißen, migris komune kun dresdenaj esperantistoj tra la bela ĉirkaŭaĵo kaj vizitis muzeojn en Dresdeno.

4-a Kongreso de ČEA

De la 19a ĝis 21a de marto okazis la 4a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Pardubice. Partoprenis ĉ. 180 delegitoj kaj gastoj. El la eksterlando alvenis delegitoj el Bulgario, Finnlando, GDR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Soveta Unio, krome la prezidanto de IFEF s-ro Giesner. La kongreso bilancis la faritan laboron ekde 1979, starigis novajn taskojn kaj akceptis novan statuton. Reelektiĝis kiel prezidanto de ČEA d-ro Jaromir Jermař kaj kiel ĝenerala sekretario Zdenko Křimský. La ĉefan estraron de GDREA reprezentis ties prezidanto Hans Heinel la sekretario d-ro Detlev Blanke kaj la membro de la prezidio Linde Knčschke.

GDR-gastoj en Veliko Târnovo

La 14-an de majo k. j. Esperanto-societo „Lumo" en urbo Veliko Târnovo (Bulgario) okazigis renkontiĝon kun eksterlandaj esperantistoj-gastoj de nia historia urbo. Else Gruhle el Leipzig kaj Willy Hamann el Burkhartshaim rakontis tre emocie pri la historia Leipciga proceso kaj la faŝista teroro, kiun suferis la progresemaj homoj en Germanio. Nin bulgaroj ege impresis la estimo de la germana popolo al nia kuraĝa Georgi Dimitrov, kiu dum tiu ĉi proceso de akuzato estiĝis akuzanto.
La sekvan tagon la loka gazeto „Borba" (Lukto) aperigis artikoleton pri la Esperanto-renkontiĝo sub titolo: „Esperantistoj pri Leipziga proceso".

Olga Cankova

Urbo Belovo serĉas amikojn

La Estraro de UES „G. Dimitrov" dez. kor. kaj subskribi kontrakton kun Esperantisto en en malgranda urbo en GDR. Nia adreso: UES „Georgi Dimitrov", 4470 Belovo, Bul. Osvoboĵdenie 70, Klubo de l'Aktivaj Batalantoj, Bulgario.

20 jaroj „Hungara Vivo"

La altnivela belaspekta kultura revuo „Hungara Vivo" 1981 festis la jubileon de sia 20-jara aperado. Dum la lastaj jaroj la abonanto ricevadas la riĉenhavajn kajerojn kun multega materialo pri Hungario kaj pri la kulturaj aktivecoj de la internacia Esperanto-movado. Oni povas tute bone aserti, ke ĉiu **serioza** esperantisto devas aboni tiun revuon, unikan en la mondo. Akceptas abonojn ĉiu poŝtoficejo en GDR.

Ni kore gratulas al elstaraj hungaroj

— al la konata hungara verkisto kaj iama ĉefredaktoro de „Hungara Vivo", Mihaly Gergely, okaze de lia 60-jariĝo novembre 1981,
— al la konata veterano de la hungara Esperanto-movado kaj kunredaktinto de la Enciklopedio de Esperanto, Lajos Kökenyi el Budapeŝto, kiu fariĝis 85jara.

Gastigantoj?

Esperantistoj el GDR, kiuj pretas gastigi — en necesaj kaj oportunaj kazoj — eksterlandajn esperantistojn. bv tion anonci al la Centra Estraro de GDREA, kiu perus la eventualan gastigpretecon nur post interkonsento kun la gastigonto.

Okaze de la 75a naskiĝtago de Rudi Graetz

La 24an de junio Rudi Graetz, la unua prezidinto de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, estus festinta sian 75an naskiĝtagon. Bedaŭrinde la 1an de oktobro 1977, do antaŭ 5 jaroj, li subite forlasis nin. Tamen, lia spirito ĉiam animis la agadon de la esperantistoj en GDR, por kiuj — konintaj lin, li restas neforgesebla.

Rekonita en eksterlando kaj en sia patrio, kiel fakulo por eksterlanda komerco kaj kiel kulturaganto, kiel esperantisto kaj pacbatalanto, Rudi Graetz metis la solidan fundamenton meze de la 60aj jaroj por la juna nova Esperanto-movado de GDR. Ke la agado evoluis konstante, firme kaj sen krizoj, kun daŭre plialtiĝanta kvalito, tion ni ankaŭ dankas al la ĝustaj principoj de nia agado, kiun kunellaboris Rudi Graetz. D. B.

Ernst Schonert — 1907—1982

La longjara membro de la iama Centra Laborrondo kaj nuna Centra Estraro de GDREA, Ernst Schonert (Hohen-Neuendorf ĉe Berlin), festis la 13an de junio 1982 sian 75an naskiĝtagon.

Ĉi-loke ni fakte volis gratuli al la jubileinto. Sed bedaŭrinde okazis aliel. Ernst Schonert forlasis nin por ĉiam la 13-an de aŭgusto kaj nur restas al ni funebri pri grava perdo.

Ernst Schonert dum multaj jaroj estis prezidanto de la Distrikta Laborrondo Berlin kaj havas meritojn ĉe la evoluigado de la Esperanto-movado en Berlin.

Hans Dietrich — 70jara

La prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA en Schwerin, Hans Dietrich, festis la 23an de aŭgusto 1982 sian 70an naskiĝtagon. La Centra Estraro de GDREA kore gratulas al sia membro.

Gratulation und Dank an Ilse Serowy

Am 19. Oktober 1982 feierte Ilse Serowy ihren 70. Geburtstag. Die Esperantisten der DDR sowie der Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes gratulieren sehr herzlich zu diesem Ehrentag. War doch Kollegin Serowy seit 1965 bis Mitte 1982 unermüdlich als Sekretärin im Büro des ehemaligen Zentralen Arbeitskreises und heutigen Esperanto-Verbandes tätig. Sie war dabei seit der Reorganisierung der Esperanto-Bewegung in der DDR und hat großen persönlichen Anteil bei der Organisierung der Aktivitäten der Esperantisten im Kulturbund der DDR. Wir wünschen ihr für die Zukunft alles Gute und danken für Einsatz und Mitarbeit.

Zentralvorstand
des Esperanto-Verbandes

IFER 1983: Abunda programo

Ankaŭ 1983 denove okazos la jam tradicia Internacia Foira Esperantista Renkontigo, de 11.—13. marto en la foira urbo Leipzig. Ĉi-foje oni traktos en prelegoj kaj diskutoj la laboristmovadajn kaj aliajn progresemajn tradiciojn, aparte la esperantmovadajn, gravajn por la aktuala internacia pacmovado. Elstaran rolon havos la „venkinto de Leipzig", Georgi Dimitrov, kies tribunala proceso 1983 havos la 50-an datrevenon. Krom tio oni traktos pri problemoj de la apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, ofertos riĉan kulturan kaj turisman programon kaj multon alian. Informojn ricevu de: IFER, DDR - 7010 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.

Letervespero

Dum januaro 1983 la Esperanto-grupo de Bernau (ĉe Berlin) organizas internacian letervesperon. Bonvolu sendi salutleterojn kaj ilustritajn poŝtkartojn kiuj, ĉiuj estos respondataj, al Rudolf Jacobi, DDR - 1280 Bernau, Berliner Str. 26.

Blinda esperantistino trovis multajn geamikojn

Kion signifas al mi Esperanto?

1980 mi komencis lerni Esperanton aŭtodidakte. Mi estas tute blinda kaj mi vizitis kelkfoje la popolaltlernejon; sed bedaŭrinde nur malofte, ne regule, ĉar mi ne povis iri sole. Kvankam mi trovis en la instruisto bonan helpanton ,ĉar li donis al mi adresojn kaj mi tre frue komencis korespondi kun vidantaj esperantistoj. Ankaŭ la instruisto rekomendis al mi veturi 1981 eksterlanden al renkonto por uzi la lingvon internacian kaj nun kun lia helpo mi povas viziti kelkfoje la klubvesperojn en nia urbo. Do, mi partoprenis 1981 al Internacia Renkontiĝo Naturamika en Abaliget (Hungario) kiel sola blindulino inter vidantaj esperantistoj el 13 landoj. Tio estis por mi neforgesebla belega evento, ĉar mi konstatis, ke mi jam tre bone komprenis Esperanton kaj ankaŭ povis paroli por interkompreniĝi, kvankam mi ne havis kuraĝon. Mi tute ne sentis min sole, sed mi povis ĝui la tutan programon kaj ĉiam mi trovis helpon kaj kompreniĝon sen multaj vortoj. Pro tio mi kun granda ĝojo en tiu jaro denove partoprenos tiun renkontiĝon.

Nur iom post iom mi trovis kontaktojn kun blindaj esperantistoj, ricevis revuojn en brajla skribo (blindulskribo) kaj mia korespondado kreskas konstante. Mi jam havas amik(in)ojn en multaj landoj. Por mi estas tre interese ekscii el aliaj landoj, kiel vivas tie la homoj kaj la blinduloj. Precipe feliĉa mi estas, ke mi persone povas helpi al aliaj blinduloj, ĉar mi mem ja bezonas multe da helpo de aliaj homoj en la ĉiutaga vivo.

Mi mendis kaj aĉetis librojn kaj revuojn germanlingvajn en nia speciala biblioteko en Leipzig, kiuj nun helpas precipe al sovetaj esperantistoj studi nian lingvon kaj Esperanton.

Ankaŭ mi povis sendi aliajn blindulhelpilojn en diversajn landojn, kaj la dankleteroj signifas por mi la plej grandan feliĉon. Kompreneble ankaŭ mi jam ricevis helpon kaj donacojn, sed tio por mi estas bela, sed ne grava. Amikeco kaj interkompreniĝo kun multaj homoj estas mirinda, kaj helpi, ke ni havos ĉiam pacon en la tuta mondo, estas la plej bela celo.

Ursula Heiden, Rostock

Fachgruppe der Blinden- und Sehschwachen?

Anfang der 70er Jahre gab es zahlreiche Verbindungen zwischen dem damaligen Zentralen Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR und dem Blinden- und Sehschwachenverband der DDR.

Es wurde ein Vertrag über Zusammenarbeit unterzeichnet und die Zeitschrift „Amikeco“ in Blindenschrift herausgegeben. Diese Aktivitäten bestehen leider nicht mehr. Wir wollen daher alle Esperantisten, die Mitglieder des Blinden- und Sehschwachenverbandes sind, aufrufen, sich beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes zu melden. Es besteht die Absicht, wieder eine zentrale Fachgruppe zu bilden.

Marinko Gjivoje (14. 6. 19—31. 5. 82)

Forpasis unu el la plej rimarkindaj teoriistoj kaj aktivuloj de la nuntempa Esperanto-movado, la jugoslavo Marinko Gjivoje. Nepritakseblaj estas la meritoj de Marinko Gjivoje por la jugoslavia kaj la internacia Esperanto-movado. Kvankam malforta kaj malsanema, li verkis kaj laboris por Esperanto ĝis la lasta vivotago.

Marinko Gjivoje ekstudis agronomion, sed poste finstudis arkeologion.

Li estis publicisto, leksikografo, redaktoro de pluraj Esperantaj gazetoj kaj revuoj, kunlaboranto de diversaj internaciaj kaj naciaj revuoj kaj publikaĵoj, organizanto de kunvenoj, kongresoj, prelegoj, gazetarservoj, librostandoj. Unuvorte: homo kies vivocelo estis antaŭenigo de la internacia lingvo.

Ankaŭ la esperantistoj el GDR lin konis kaj alte taksis. Li estis gasto de nia asocio en la jaro 1978, kiam li partoprenis la internacian seminarion „Sciencaj aspektoj de Esperanto“ en Ahrenshoop, kie li tre kompetente prelegis kaj diskutis. Ni tenos lin en digna memoro.

CE de GDREA

Ni funebras

— pro la forpaso de Azra Wagner el Meiningen (26. 5. 1982)

Ni kore gratulas

— al Siegfried Linke, membro de la prezidio de GDREA kaj estro de la Distrikta Estraro de Halle, pro distingo per Johannes R. Becher-Medalo en Arĝento

— al Alfred Kraushaar el Berlin, kiu festis la 3an de marto 1982 sian 80an naskiĝtagon. La jubileulo estis ĝis la likvido de GLEA pree de la faŝistoj ties vicprezidanto kaj ankaŭ en GDR-EA aktive subtenas la agadon de la esperantistoj

— al Werner Plate, kiu ricevis senpagan vojaĝon al Moskvo pro sia poresperanta agado

— al d-ro Till Dahlenburg, kiu distingiĝis per la titolo „Supera instruisto“, i. a. pro lia fakmetodika laboro pri Esperanto.

Pipra kritiko pri „der esperantist“

Kiam mi antaŭtempe abonis Vian ĵurnalon „der esperantist“, ne kredis al miaj geamikoj kaj gesamideanoj lokaj, kiuj avertis min antaŭ tiu ĉi farado, dirante ke el la ĵurnalo mi ne havos ian utilon. Sed nun mi devas konstati, ke ili havis veron.

Via ĵurnalo alvenadas al siajn eksterlandajn legantojn tre malregule: hodiaŭ mi ricevis la n-ro 1/1982 (111). Ĉiuj informoj estas en tiu ĉi numero jam tro oldaj kaj seninteresaj. Laŭ la informoj, kiuj devenas ankoraŭ el la jam longe pasintaj monatoj de jaro 1981 kaj artikoloj pri la eventoj E-aj en 1982j estas malaktualaj, mi pensas, ke Via ĵurnalo pli bone havu la titolon „Historio de E-movado en la pasinta jaro“.

Tio ĉi signifas, ke la laboro de la redakcio ne estas tre bona kaj necesus freŝa vento en la starantaj akvoj. Mi mem jam ne atendos la tempon, kiu estos pli bona en Via redakcio, kaj mian antaŭpagon ĉesas same kiel jam antaŭe miaj geamikoj kaj gesamideanoj la esperantistaro bezonas informojn aktualajn kaj ne informojn pri aferoj kiuj okazis antaŭ longaj monatoj.

Mi deziras plibonigon en Via laboro,

Via sincera Miloslav Blažek,
Ostrava [1])

Komento de la redakcio

Treege malofte estas kritika letero inter la reagoj pri „der esperantist“. Pro tio ni ege ĝojis pri tiu de M. Blažek.

Ni publikigis lian vere tre „pipran“ kritikon pro du kialoj: 1. Li pravas plendante pri la malfrua ricevo de „der esperantist“ kaj 2. li bele montras, ke li aplikas kriteriojn iom dubindajn al la Esperanto-gazetaro ĝenerale kaj al „der esperantist“ aparte.

Ke la ĵurnaleto (verŝajne unu el la plej malmultekostaj, kvankam pure presita) aperas bedaŭrinde ofte malfrue estas vero. Sed pri tio ne kulpas la redakcio sed la presejo kaj la dissenda sistemo. Tion ni ne povas influi. Ĝenerale la esperantista gazetaro suferas je tiu fenomeno, kiel konate. Sed se temas pri la enhavo, oni tamen devas ion diri.

Certe, multaj faktoj estas jam malaktualiĝintaj kiam la leganto legas la revuon. Sed ĉu tiuj faktoj pro tio fariĝas malinteresaj? Verŝajne 1/82 estas la unua kaj sola numero, kiun vidis s-ano Blažek. Sed kie estas perdo de malaktuleco en la artikoloj de Podkaminer (p. 1—2), Piron (p. 7—8), Arnold (p. 9—12), Hußner (p. 13—14)? Kaj la materialoj de SAEST 1981 (p. 15—16), la listo de aperintaj Esperanto-eldonaĵoj (p. 17—18), la lingvaj ekzercoj de D. Berndt (p. 19) kaj, eĉ ili, la koresponddeziroj (p. 24) ne perdas tiel rapide sian aktualecon, kiel ŝajnas al s-ano Blažek.

Sciante, estimata s-ano Blažek, ke apenaŭ eblos eviti la malfruiĝon en la apero, la redakcio klopodos enmeti en ĉiun numeron bazan materialon, kiu ne dependas de priaktualecaj kriterioj. Cetere, parolante pri „Historio de Esperanto-movado . . .“, vi ne tiom malpravas. La redakcio klopodas respeguli la ĉefajn eventojn de la Esperanto-movado kaj tiel ankaŭ fiksas historiajn faktojn, kiuj ebligas — eĉ post jaroj — prijuĝi la antaŭenigon de Esperanto en la mondo kaj en GDR. Kompreneble, kiu nur vivas de tago al tago ne interesiĝante pri procesoj, ne interesiĝos pri tio.

Feliĉe, s-ano Blažek kaj iuj el liaj amikoj el Ostrava, estas la ne tro multaj el 2000 eksterlandaj abonantoj, kiuj „ne havas ian utilon“ el la ĵurnalo. Sed ja — la redakcio tamen plene konscias, ke eblas plibonigi la laboron kaj ĉiam bonvenigas „freŝan venton en la starantaj akvoj“, sed honeste motivitan. Tamen, pardonu la malaktualan komenton, ĉar vi ja ne plu legas „der esperantist“. D. B.

[1]) Nekorektita lingve kaj stile

Wilhelm Busch

Iam

Iam, kiam mi malspertis
kaj modestis sen makuloj,
havis mian altestimon
aliuloj.

Poste sur paŝtejo vidis
mi krom mi aliajn bovojn,
kaj estimas nun finfine
miajn povojn.

trad. Wilfried Hofmann

★

En libro pri Wilhelm Ostwald

Jan-Peter Domschke kaj Peter Lewandrowski aŭtoris la libron „Wilhelm Ostwald. Chemiker, Wissenschaftstheoretiker, Organisator“. Gi aperis 1982 en Urania-Verlag Leipzig-Jena-Berlin (112p.). Sur paĝoj 100—104 estas sufiĉe serioza ĉapitro „Esperanto kaj Ido“ kun foto pri Zamenhof.

Kolektanto

Mi deziras kompletigi miajn kolektojn de Esperanto-revuoj kaj gazetoj. Kiu posedanto de malnovaj E-publikaĵoj estas preta vendi aŭ interŝanĝi ilin? — Ramon Molera, Sta. Joaquina n-ro 13, Moiá (Barcelona), Hispanio

Serĉata

Serĉata parto de vortaro Lindner en la gazeto „Der Morgen“ de A ĝis inkl. R. Rekompenco laŭdezire. Oskar Stolberg, 7010 Leipzig, Auenstr. 14

HISPANA ESPERANTISTA ASOCIO „ANTON BALAGUE“

La hispana E-movado kaj ĝia influo ĉiam dependis de la enlandaj cirkonstancoj, ĉu politikaj, laboraj, ekonomiaj kaj kulturaj. Tiu regulo ankoraŭ hodiaŭ estas valida kaj sendube aplikebla por kiu ajn lando.

Antaŭ la milito sufiĉe brilis la E-Movado en Hispanujo, precipe en la vicoj de la progresemaj organizaĵoj laboristaj kaj en la katolikaj rondoj.

Evidente la civila milito ruinigis la movadon. Ne estis facila ĝia renaskiĝo kaj kompreneble ĝi havis tute alian karakteron ol tiu antaŭmilita. Ne eblis la diskonigo de Esperanto en la laboristaj rondoj, pro la fakto, ke ĉi tiuj organizaĵoj laboraj ne ekzistis. La kulturo, kiel ĉiu alia faceto de la vivo, dum la pasinta diktatora epoko estis severe kontrolita de la koncernaj registaraj organismoj. Timeme kaj malrapide reaperis Esperanto en la hispana vivo. Sed evidente la E-movado ne estis tiu antaŭmilita. Ĝi estis adaptita al la aktualaj enlandaj cirkonstancoj. Tiutempe skribi al la socialismaj landoj povis fariĝi kaŭzo de devigaj klarigoj antaŭ la aŭtoritatoj, sperto travivita de la subskribinto. Al tiu nepre ni aldonu la riskon ricevi iun E-gazeton el la socialismaj landoj.

Iuj de la aktivaj esperantistoj mortis dum la milito, aliaj ekziliĝis kaj tiuj, kiuj estis en la lando, vole aŭ ne vole devis adaptiĝi al la aktualaj vivnormoj. De tiuj, kiuj restis en la lando iuj relaboris por Esperanto sed aliaj ne plu kunlaboris. Tamen. kaj malgraŭ tiu registara kontrolo la hispana E-movado apenaŭ kunlaboris kun la registaro.

Iom post iom formiĝis la grupoj kaj la filozofio de ĉi tiuj grupoj estis la instruado de Esperanto — por amika korespondado —. Akcepti Esperanton kiel instrumenton aplikeblan al la sociaj problemoj, estis io pri kio oni ne povis pensi. Kiam oni petis oficialan permeson por starigo de E-grupo, ĉiam oni menciis kiel celon diskonigon de la turismaj eblecoj de la lando. En ĉi tiuj kondiĉoj disvolviĝis la hispana E-movado dum, almenaŭ tridek jaroj.

Sanĝiĝis la politika situacio en burĝan demokration kaj naskiĝis iuj eblecoj por diskonigi Esperanton, kiel instrumento por plibonigo de la socio. Evidente la burĝaro ankaŭ ne okupiĝas pri Esperanto, nek pri la socio, ili celas unike pligrandigi siajn privilegiojn.

Nu, kie estas la esperantistoj pretaj por organizado de laboristaj E-rondoj? De la antaŭmilitaj aktivuloj iuj mortis kaj aliaj estas tre maljunaj por plia kunlaborado. Nia tutlanda organizaĵo konsistas el homoj bonkoraj kaj sinceraj esperantistoj, kies celo estas uzi la Internacian Lingvon por propraj aferoj. Sed tiuj esperantistoj ne estas la fonto el kiu povus trinki nia Asocio. Tiusence la laboro estas tute farenda. Dum ĉi tiuj kvardek lastaj jaroj la hispana E-movado stagnis, fenomeno ankaŭ okazinta en ĉiuj „eŭropaj okcidentaj landoj“.

En ĉi tiu stadio naskiĝis la Hispana MEM-Sekcio. La tasko ne prezentiĝas facila. La malmulta nombro de esperantistoj kaj la manko de veraj gvidantoj apartenantaj al la laboristaro kaj progresema intelektularo, ne estis favoraj kondiĉoj por la organizado de la Sekcio. Tamen aro de konsciaj esperantistoj starigis la Sekcion kaj leĝe ĝin registris, sub la nomo Hispana Esperantista Asocio „Antón Balagué“, kun rajto aktivi en la tuta lando.

Nia malmulta membraro konsistas el veteranoj, malnovaj batalantoj por la paco, libero kaj homaj rajtoj, el junaj aktivuloj kaj simpatiantoj. Nia unua tasko estas diskonigi la veran celon de nia porpaca movado, inter la hispana esperantistaro. Analizo de la rolo de Esperanto interne de la ceteraj problemoj ekzistantaj en la lando, evidentigas, ke se la krizoj kiuj skuas la socion ne solviĝas, Esperanto neniam progresos. Proponi al senlaborulo la lernadon de Esperanto estas kvazaŭ trinki akvon en seka rivero.

Nia Sekcio estrare aprobis la diskonigon de Esperanto ĉe la progresemaj rondoj, sindikatoj, maldekstraj politikaj organizaĵoj kaj intelektularo. Verdire nia laboro, apenaŭ sukcesis, apenaŭ ĝi havis ĉhon. Ciu politika hispana partio suferas interne seriozajn zigzagojn. Tiuj internaj problemoj forrabas la tempon dediĉatan por la kulturo, kiu apenaŭ estas enprogramita kaj multe malpli realigata. Tio ja estas tre grava flanke de la maldekstraj kompartioj ĉar ĝi signifas, ke kulture la laboristaro ne progresas, kaj nediskuteble tio jam favoras la burĝaron. Kiam en tiuj politikaj organizaĵoj ni proponas la instruadon de Esperanto, ili ridetas kaj petas nin atendi pli favorajn cirkonstancojn. Tio signifas, ke Esperanto ankaŭ estas ligita al la ĉaro de la sociaj problemoj, kaj se ĉi tiuj ne solviĝas nia Asocio kaj Esperanto ne progresos.

Nia hodiaŭa tasko estas, meti la fundamentojn por ke estonte, kiam nia socio pliboniĝos, tion ni jam esperas, niaj kamaradoj trovu organizaĵon sur kiu ili baziĝos sian laboron. La cirkonstancoj ne estas motivo por senkuraĝigi nin. Ni ne laciĝos, ni daŭrigos nian taskon. Pri tio ni jam estas alkutimiĝintaj kaj ne nur pri E-temoj sed pri aliaj multe pli gravaj.

Salutojn kamaradoj.

Luis Serrano Pèrez, Sabadell

Bulgario

Anoj de E-Societo „Georgi Dimitrov“ dez. kor.:

Sekretariino de P. F., 37j.: Maria St. Nenova, 4468 **Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Oficisto en Bulgara Popola Armeo, 40j.: Jordano Angelov Nikolov, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Instruistino, 47j.: Liljana Blagova Marinkova, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Oficistino, 30j.: Stoilka Dim. Duneva, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Instruistino, 47j.: Boĵana Krumova Pavlova, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Kasistino, 32j.: Iliana Georgieva Nikolova, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Laboristo, 34j.: Georgi Petrov Lazarov, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Oficistino, 19 j.: Liljana Nikolova Marinkova, **4468 Momina Klisura,** okr. Pazarĝik

Ĉeĥoslovakio

Juraj Švantner, Ku amfiteatru 1, **080 01 Prešov,** (21j.), dez. kor. tutmonde pri muziko, filmo, turismo, sporto, geografio, fotografio, kol. bk, suvenirojn, gazetojn, gramofondiskojn

Pensiulino, 58j., dez. kor. pri fremdaj lingvoj, kol. bk k. pupojn en naciaj kostumoj: Helena Hrudková, Poŝtova schranka 20, **96 232 Sliač-kúpele**

Dommastrino, 40j., dez. kor. kol. bk: Magda Medve, Zlatý Potok, blok **8, 962 31 Zvolen**

GDR

Komencantino, 16j., dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, lingvoj, kol. bk: Silke Keiling, **2790 Schwerin,** Cottbuser Str. 2/1002

27j. instruisto dez. kor. pri fotografio, filizofio, radiotekniko kun soc. landoj: Uwe Fink, **2600 Güstrow,** PH, Pf. 121

Inĝeniero por terplibonigo, 28j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: M. B. Pries, **2601 Kritzkow,** Ringstr. 6

Lernantino, 16j., dez. kor. tutmonde pri lingvoj, kol. bk .pm: Kristina Brandes, **2794 Schwerin,** Leninallee 168

Virino, 40j., dez. kor. k. esp. el ČSSR, Hungario p. ĉ. t.: Renate Gleiminger, **2830 Boizenburg,** Weg der Jugend 17

Fraŭlino, 21j., dez. kor. k. esp. el ĈSSR, Hungario, Bulgario p. ĉ. t.: Marita Brunswich, **2831 Gallin,** subdistr. Hagenow

Filatelisto serĉas kontaktojn k. samideano el Jugoslavio: Bernd Marr, **6388 Steinbach-Hallenberg,** Hauptstr. 75

Statistikistino, 43j., dez. kor. pri teatro, pentraĵoj, kol. submetaĵojn de glasoj: Jutta Suhr, **2750 Schwerin,** Am Markt 8

Denttekniki stino, 40j., dez. kor. pri vojaĝoj, migrado, muziko, literaturo, teatro: Ilse Schilf, **2754 Schwerin,** Obotritenring 177

Instruistino, 24j., dez. kor. k. amikoj, el soc. landoj pri politiko, etnografio, lingvoj, literaturo, filmoj, muziko, sporto, teatro, vojaĝoj: Sylvia Selent, **2031 Völschow,** Krs. Demmin

Ilse Winzer, **5600 Leinefelde,** O.-Nuschke-Str. 40, (48j.), dez. kor. tutmonde pri literaturo, psikologio, kuirreceptoj, kol. bk.

Elisabeth Siebrandt, **5600 Leinefelde,** E.-Thälmann-Str. 10, (41j.), dez. kor. tutmonde pri literaturo, infanedukado, kuirreceptoj

Gerhard Nieft, **5600 Leinefelde,** Bergstr. 1, (47j.), dez. kor. tutmonde pri fotografado, literaturo, kol. bk.

Soveta Unio

Dentistino, 24j., Galiniene Ruta, **234 900 Saldutiškis,** Utenos raj., dez. kor. tutmonde

Instruistino, 24j., dez. kor. tutmonde: Lapeliene, Regina, Vilnius, **Viršuliškiu gt. 47—26,** Litovio

Instruistino, 26j., dez. kor. tutmonde: Skurdeniene Irena, Panevežys, **Grigo gt. 33—55,** Litovio

Instruistino, 45j., Dulciene Aldona, Kvedarna, **Žalioji gt. 1—10,** Šilales raj., dez. kor. tutmonde

Instruistino, 43j., dez. kor. tutmonde: Balikiene Eleonora, **234 270 Vilkaviškis,** Ruty gt. 4, Litovio

Herausgeber: Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband

Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60

Fernruf: 2 20 29 91

Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke. Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.

Druck: Druckwerkstätte Glauchau

Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 645